

Karlo Markso kaj Frederiko Engelso
Manifesto de la Komunista Partio
en la tradukoj de
Detlev Blanke (1990)
Emil Pfeffer (1923)
Arturo Baker (1908)
(T. Veder [1933])
kaj la germana originalo

**Karlo Markso
kaj
Frederiko Engelso**

Manifesto de la Komunista Partio

**en la tradukoj de
Detlev Blanke (1990)
Emil Pfeffer (1923)
Arturo Baker (1908)
(T. Veder [1933])
kaj la germana originalo**

Monda Asembleo Socia (MAS)

Karlo Markso kaj Frederiko Engelso
Manifesto de la Komunista Partio
en la tradukoj de
Detlev Blanke (1990)
Emil Pfeffer (1923)
Arturo Baker (1908)
(T. Veder [1933])
kaj la germana originalo
komp. Vilhelmo Lutermano
Monda Asembleo Socia (MAS)
2011
ISBN 978-2-918300-45-8

Enhavo

Antaŭparolo de la kompilinto.....	11
Karl Marx kaj Friedrich Engels.....	14
Manifesto de la Komunista Partio	
tradukis Detlev Blanke.....	14
Antaŭparolo al la germana eldono de 1872.....	15
Antaŭparolo al la dua rusa eldono de 1882.....	18
Antaŭparolo al la germana eldono de 1883.....	21
Antaŭparolo al la angla eldono de 1888.....	23
Antaŭparolo al la germana eldono de 1890.....	30
Antaŭparolo al la dua pola eldono de 1892.....	37
Antaŭparolo al la itala eldono de 1893.....	39
MANIFESTO	
DE LA KOMUNISTA PARTIO.....	41
I. Burĝoj kaj proletoj.....	43
II. Proletoj kaj komunistoj.....	58
III. Socialisma kaj komunisma literaturoj.....	69
1. LA REAKCIA SOCIALISMO.....	69
a) La feŭda socialismo.....	69
b) Etburĝa socialismo.....	71
c) La germana aŭ la „vera” socialismo.....	73
2. La konservativa aŭ burĝa socialismo.....	76
3. La kritike-utopiecaj socialismo kaj	
komunismo.....	78
IV. Rilato de la komunistoj al la diversaj opoziciaj	
partioj.....	82
Pri la Esperanta eldono de la „Komunista	
Manifesto”.....	85
I.....	85
II.....	88

III.....	91
IV.....	95
Du tekstoj de T. Veder.....	100
T. Veder: Antaŭparolo al la esperanta eldono.....	100
Antaŭparolo al la „Komunista Manifesto” de Frederiko Engels	
Traduko de T. Veder.....	104
La Komunista Manifesto, traduko de Emil Pfeffer...	111
ANTAŬPAROLO.....	113
La komunista manifesto.....	119
I. Burĝo k proleto.....	120
II. – Proletoj k komunistoj.....	134
III – Socialista k komunista literaturo.....	144
a) La feŭda socialismo.....	144
b) Malgrandburĝa socialismo.....	145
c) La germana aŭ la „vera” socialismo....	147
2. La konservativa aŭ burĝa socialismo.....	150
3. La kritike-utopiista socialismo k komunismo	
.....	152
IV – Rilato de l’komunistoj al la diversaj opoziciaj partioj.....	155
Manifesto de la Komunista Partio	
el angla traduko Esperantigita de Arturo Baker.....	158
Antaŭparolo de la tradukinto.....	159
ANTAŬPAROLO.....	162
MANIFESTO DE LA KOMUNISTA PARTIO.....	168
I	
LA KAPITALISTOJ KAJ LA PROLETARIOJ.....	169
II.	
PROLETARIOJ KAJ KOMUNISTOJ.....	185
III	
SOCIALISTA KAJ KOMUNISTA LITERATURO.	197
1. Reakcia Socialismo.....	197

a. Feŭda Socialismo.....	197
b. Kapitaletula Socialismo.....	199
[c.] Germana aŭ "Vera" Socialismo.....	201
2. Konservativa aŭ Kapitalista Socialismo...	204
3. Kritika-Utopia Socialismo kaj Komunismo	
.....	206
IV	
SINTENADO DE LA KOMUNISTOJ RILATE AL	
LA DIVERSAJ EKZISTANTAJ PARTIOJ OPOZICIAJ	
.....	210
La germanlingva originalo.....	213
Karl Marx/Friedrich Engels.....	215
Vorwort [zum „Manifest der Kommunistischen	
Partei" (deutsche Ausgabe 1872)].....	215
Friedrich Engels.....	218
Vorrede[zum „Manifest der Kommunistischen	
Partei" (englische Ausgabe von 1888)].....	218
Friedrich Engels.....	226
[Vorwort zur vierten deutschen Ausgabe (1890) des	
„Manifests der Kommunistischen Partei"].....	226
Friedrich Engels.....	234
Vorwort [zur zweiten polnischen Ausgabe (1892)	
des „Manifests der Kommunistischen Partei"]....	234
Friedrich Engels.....	237
An den italienischen Leser [Vorwort zur	
italienischen Ausgabe (1893) des „Manifests der	
Kommunistischen Partei"].....	237
Manifest der Kommunistischen Partei.....	240
I.....	241
Bourgeois und Proletarier.....	241
II.....	258
Proletarier und Kommunisten.....	258
III.....	270

Sozialistische und kommunistische Literatur.....	270
1. Der reaktionäre Sozialismus.....	270
a) Der feudale Sozialismus.....	270
b) Kleinbürgerlicher Sozialismus.....	272
c) Der deutsche oder „wahre“ Sozialismus	274
2. Der konservative oder Bourgeoisozialismus	278
3. Der kritisch-utopistische Sozialismus oder Kommunismus.....	280
IV.....	283
Stellung der Kommunisten zu den verschiedenen oppositionellen Parteien.....	283

Antaŭparolo de la kompilinto

Esperantujo disponas ĉi tie pri io unika: la sama teksto en tri diversaj tradukoj – en malpli strikta senco eĉ kvar, vidu malsupre – al la sama lingvo, Esperanto, kun ĉiuj tradukoj en unu libro. Kompreneble la ebleco kompari la *Manifesto-n de la Komunista Partio* – komune kaj familiare nomata la *Komunista Manifesto* – en tri (respektive kvar) versioj, estas interesa por tiuj, kiuj iel aŭ alie okupiĝas pri la evoluo de la socio. Tiu ebleco estas certe plej interesa por lingvistoj kaj lingve interesitaj homoj, kiuj havas tiel antaŭ siaj okuloj la evoluon de nia lingvo tra preskaŭ tuta jarcento, kaj krome ankaŭ certan socielekton, nome la lingvaĵon de la tiama laborista Esperanto-movado, kiun oni povas parte ankoraŭ nuntempe renkonti en la medioj de SAT kaj kiu estas plej videbla en la ortografio de la *Pfeffer*-a teksto: *k* anstataŭ *kaj*, *de l'* (ĉe li eĉ kun – kontraŭ-fundamente – rekta kunmeto de la artikolo kun la sekva vorto) anstataŭ *de la*.

Mi reproduktis – kun la escepto de la traduko de *Blanke* – la tekston fidele, sen eĉ korekto de evidentaj lingvaj eraroj.¹ Mi nur korektis evidentajn tajperarojn, ĉefe en la traduko de *Emil Pfeffer* (ekz-e duoblajn vortojn² aŭ literojn³, la artikolon *le* anstataŭ *la*, *kaptalo* anstataŭ *kapitalo*⁴, ktp). En kelkaj kazoj mi korektis la mistajpitan vorton kaj menciis la originalan, do eraran, formon en piednoto⁵ Ankaŭ la

1 ekz-e la eraran uzon de *si*, en „La burĝaj rilatoj fariĝis tro malvastaj, por ampleksi la de si kreitan riĉaĵon” (p. 20 en la originalo, ĉi tie p. 126.

2 ekz-e en la originalo: p. 17 „... antaŭ ol ili povas povas malmoliĝi”.

3 ekz-e en la originalo: p. 39 „... formojn elkkreskantajn ...”

4 ambaŭ sur p. 55 de la originalo.

5 ekz-e „konstante” anstataŭ „kontante”, p. 22 de la originalo.

Antaŭparolo de la kompilinto

interpunkcion mi lasis tia, kaj ankaŭ en tio mi nur korektis evidentajn tajperarojn, ekz-e kiam aperis apostrofo anstataŭ divid-streketo (ekz-e en la originalo sur p. 12b, 1-a kaj 2-a linioj, mankanta punkto post frazo¹, mankanta spaceto² aŭ erare metitan streketon, ekz-e „sekve- la produktajn rilatojn”³). En la teksto de *Pfeffer* mi lasis senŝanĝe la spacetojn antaŭ ekkri- kaj demando-signo, sed same reproduktis ankaŭ la foreston de tia spaceto. Mi tamen korektis sisteman tipografian eraron: en la originalo de *Pfeffer* la fina citilo post citaĵo estas ĉiam metita post la fina frazo-signo (plej ofte punkto) en situacioj, kie ne tuta frazo estis citita, sed nur frazpartoj, sintagmoj aŭ eĉ nur unuopaj vortoj (ekz-e tiel: ... ol kala „kontanta pago.” – tion mi korektis al: ... ol kala „kontanta pago”).⁴ Krome mi korektis evidentajn

Ĉar oni konsideras prave la tradukon de *Detlev Blanke* la nuntempe plej sukcesinta kaj do kiel la tekston referencindan, mi permesis al mi korekti kelkajn – malmultajn – gramatikajn kaj ortografiajn erarojn, kiuj aperas en la reta versio, tamen ĉiufoje kun koncerna mencio en piednoto. Pri pliaj ŝanĝindaj teksteroj necesus diskuti kun la tradukinto por eventuala estonta reeldono de lia tradukaĵo.

Krome mi enmetis piednote, ĉe tiu tradukaĵo kiel ĉe la aliaj, ĉe fontindikoj referencojn de intertempe aperintaj Esperantlingvaj tradukoj de la menciitaj verkoj. Tiaj kiel aliaj piednotaj rimarkoj estas signifitaj per mia siglo -vl.

Tiu ĉi eldono ja servas por kompari la tekstojn, sed ĉefe

-
- 1 ekz-e en la originalo: p. 39 „... de ekzisto de via klaso [sekvas alineo].
 - 2 ekz-e en la originalo: p. 44 „... elmontras,movas ...”. -vl
 - 3 vd p. 123, en la paragrafo kiu komenciĝas per „La burĝaro ne povas ekzisti ...” en la originalo sur p. 16.
 - 4 Cetere, Baker Esperantigas la anglan „callous” [„senkompata, hardita”] per „kala”, dum la germana originalo estas „gefühllos”, kion Pfeffer kaj Blanke tradukas adekvate per „sensenta” resp. „senanima”.

Antaŭparolo de la kompilinto

ĝi kunigas ĉiujn ĝis nun iam aperintajn tradukojn en ilia tutaĵo, do ekz-e la tutan libron de *Detlev Blanke*, kune kun la finaj rimarkoj pri la traduko de la *Manifesto*. Tiu parto de lia teksto, sub la titolo *Pri la Esperanta eldono de la „Komunista Manifesto“*, estas cetere bonega enkonduko ankaŭ en la historion de la tradukoj de la *Manifesto*. *Detlev Blanke* parolas tie detale pri la ĉi tie prezentitaj tekstoj de *Baker* kaj *Pfeffer*, sed ne mencias la alian ĉi tie prezentitan tekston, nome: Frederiko Engels: Antaŭparolo al la „Komunista Manifesto“¹, en traduko de *T. Veder*. Kvankam tiu teksto ne estas proprasence parto de la *Manifesto* mem, sed antaŭparolo de unu el la du verkintoj, mi pensas ke ĝi ja havas sian lokon en tiu ĉi kadro, kiel ja ankaŭ ĉiuj aliaj antaŭparoloj. Tion konsiderinte, oni povas diri ke ĉi tie troviĝas, almenaŭ parte, kvar tradukoj. Estus interese scii, en kiom da lingvoj fariĝis tiom da tradukoj de la *Manifesto*.

Mi ne reproduktis la anglalingvan version, kiu troviĝas en la libro de *Baker*, sed fine de tiu ĉi libro la germanan originalon. Por kompari la diversajn tradukojn, la germana originalo ŝajnas al mi pli aŭtenta ol la angla traduko, kaj krome tiu versio havas la avantaĝon ke ĝi mencias ĉiujn variaĵojn de la diverstempaj eldonoj.

La traduko de *Detlev Blanke* estas ĝis nun la lasta, kaj – krom ke ĝi ne nur evitis sufiĉe multajn erarojn de la antaŭaj tradukoj kaj esence plibonigis la komprenon de la teksto – klare respegulas la nuntempan staton de nia lingvo. Sed ĉu ĝi restos ankaŭ la lasta? Se oni vidas la evoluon de lingvaj „modoj“ en tiuj ĉi tri ĝis kvar specimenoj en unu sola jarcento, oni rajtas dubi pri tio.

Pedro Betancourt, en januaro 2011

Vilhelmo Lutermano

1 Mi aldonis ankaŭ la antaŭparolon de *Veder* al la eldono de tiu teksto kaj al la komentoj de la tiama usona komunista gvidanto Arnold Petersen.

Karl Marx kaj Friedrich Engels

Manifesto de la Komunista Partio

tradukis Detlev Blanke

Rimarkoj de la kompilinto

La teksto aperis libroforme: Karl Marx kaj Friedrich Engels: Manifesto de la Komunista Partio, Esperanta traduko kaj postparolo de Detlev Blanke, Progreso, Moskvo, 1990, ISBN 5-01-002341-5.

La sama teksto troviĝis – ĝis meze de 2009 – en la reto en la formo de „e-libro”, enpaĝigita de Franko Luin en la jaro 2002 kaj sub la ISBN-numero 91-7303-142-9, tiam libere elŝutebla ĉe <<http://www.omnibus.se/inko/>>.

La sama teksto – do en la formo aranĝita de Franko Luin – troviĝas nun en la retejo de multlingvaj eldonoj de marksaĵ kaj marksismaj verkoj: <<http://www.marxists.org/>>.

La sekva teksto estas reproduktita laŭ tiu versio. La malmultaj korektoj faritaj en ĝi de la kompilinto de tiu ĉi libro estas unuope menciitaj en piednoto kaj signifitaj per lia siglo -vl.

Vilhelmo Lutermano, Pedro Betancourt, januaro 2011

Antaŭparolo al la germana eldono de 1872

La Ligo de Komunistoj, internacia asocio de laboristoj, kiu sub la tiamaj kondiĉoj kompreneble povis esti nur sekreta, komisiis dum la kongreso, okazigita en novembro 1847 en Londono, la subskribintojn verki detalan teorion kaj praktikan parti-programon destinitan por la publiko. Tiel ekestis la sekva „Manifesto”, kies manuskripto migris kelkajn semajnojn antaŭ la Februara Revolucio¹ por preso al Londono. Unue publikigita germane, en tiu lingvo ĝi estis presita en Germanio, Anglio kaj Usono en almenaŭ dek du diversaj eldonoj. La angla teksto unue aperis en la jaro 1850 en Londono en „Red Republican”, tradukita de Miss Helen Macfarlane (Mekfarlejn), kaj krome en 1871 aperis almenaŭ en tri diversaj tradukoj en Usono. La franca teksto unue aperis mallonge antaŭ la Junia Insurekcio 1848² en Parizo, lastatempe en „Le Socialiste” en Nov-Jorko. Novan tradukon oni preparas. Pola versio aperis mallonge post la unua germana eldono. Rusa versio aperis en Ĝenevo dum la sesdekaj jaroj. Ankaŭ en la danan ĝi estis tradukita baldaŭ post sia apero.

Kiom ajn ŝanĝiĝis la cirkonstancoj dum la lastaj dudek kvin jaroj, la ĝeneralaj principoj, evoluigitaj en ĉi tiu „Manifesto” entute restas plene validaj ankaŭ hodiaŭ. Jen kaj jen oni devus plibonigi detalojn. Kiel la „Manifesto” mem klarigas, la praktika apliko de tiuj principoj ĉie kaj ĉiam dependos de la ekzistantaj historiaj kondiĉoj. Pro tio ankaŭ ne estas metita aparta akcento sur la revoluciajn

1 La franca revolucio dum februaro 1848. (*Trad.*)

2 Ribelo de la pariza proletaro de la 23-a ĝis la 26-a de junio 1848, kiu markis la kulminon de la revolucio 1848 – 1849 en Eŭropo. (*Trad.*)

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

intervenajn, proponitajn fine de la ĉapitro II. Tiu parto hodiaŭ aspektus multtrilate alia. Rigarde al la grandega evoluo de la grandindustrio dum la lastaj dudek kvin jaroj kaj la progresinta partia organiziĝo de la laborista klaso, ligita al ĝi, rigarde al la praktikaj spertoj kolektitaj unue dum la Februara Revolucio kaj eĉ multe pli dum la Pariza Komunumo¹, kie unuan fojon la proletaro dum du monatoj havis la politikan potencon, rigarde al tio ĉi tiu programo hodiaŭ kelkaloke estas malnoviĝinta. La Komunumo aparte pruvis, ke „la laborista klaso ne simple povas preni en posedon la pretan ŝtatemekanismon kaj ekfunkciigi ĝin por siaj propraj celoj”. (Vidu „Der Bürgerkrieg in Frankreich. Adresse des Generalraths der Internationalen Arbeiter-Association”², germana eldono, p. 19, kie la temo estas plutraktita). Plue kompreneblas, ke la kritiko pri la socialisma literaturo hodiaŭ estas mankhava, ĉar ĝi nur traktas ĝis 1847; la samo koncernas la rimarkojn pri la rilato de la komunistoj al la diversaj opoziciaj partioj (ĉapitro IV), kvankam ili nuntempe ankoraŭ estas ĝustaj en la bazaj trajtoj, tamen laŭ sia prezento ili hodiaŭ estas malnoviĝintaj jam pro tio, ĉar la politika situacio totale transformiĝis kaj la historia evoluo elmondigis la plej multajn de la tie menciitaj partioj.

Tamen, la „Manifesto” estas historia dokumento, kiun ni ne plu rajtigas nin ŝanĝi. Pli posta eldono eble aperos kun enkonduko, kiu kovros la tempospacon de 1847 ĝis nun. La

-
- 1 Revolucia registaro de la laboristaro, kreita per proleta revolucio la 18-an de marto 1871 en Parizo. La Pariza Komunumo estis la unua provo fari proletan revolucion kaj starigi la diktaturon de la proletaro. Ĝi ekzistis ĝis la 28-a de majo 1871. (*Trad.*)
 - 2 „La civitana milito en Francio. Mesaĝo al la Ĝenerala Konsilantaro de la Internacia Laborista Asocio”. (*Trad.*)
– En Esperanto: Karlo Markso: La interna milito en Francio (1871, La Pariza Komunumo), kun enkonduko de Frederiko Engelso, Mondial, Novjorko, 2005, p. 68. -vl

Antaŭparolo al la germana eldono de 1872

prezentata represo por ni venis tro neatendite, por lasi al ni la tempon por tia enkonduko.

Londono, la 24-a de junio 1872

Karl Marx, Friedrich Engels

Antaŭparolo al la dua rusa eldono de 1882¹

La unua rusa eldono de la „Manifesto de la Komunista Partio”, tradukita de Bakunin, aperis komence de la sesdekaj jaroj² en la presejo de „Kolokol”³. La Okcidento en ĝi (la rusa eldono de la „Manifesto”) tiam nur povis vidi literaturan kuriozaĵon. Tia opinio hodiaŭ estus neebla.

Kiam limigitan kampon la proleta movado ankoraŭ havis tiam (decembro 1847), plej klare montras la fina ĉapitro de la „Manifesto”: „La rilato de la komunistoj al la diversaj opoziciaj partioj” en la diversaj landoj. Tie mankas ĝuste Ruslando kaj la Unuiĝintaj Ŝtatoj. Estis la tempo, kiam Ruslando estis la lasta granda rezervujo de la tuta eŭropa reakcio; kiam la Unuiĝintaj Ŝtatoj absorbis la superfluan proletaran forton de Eŭropo per enmigrado. Ambaŭ landoj provizis Eŭropon per krudmaterialoj kaj samtempe estis merkatoj por la vendo de ĝiaj industriaj varoj. Do tiam ambaŭ landoj tiel aŭ aliel estis kolonoj de la ekzistanta eŭropa ordo.

Kiom malsame estas hodiaŭ! Ĝuste la eleŭropa enmigrado ebligas al Norda Ameriko gigantan agrokulturan produktadon, kies konkurenco ekskuas la fundamentojn de la eŭropa terproprieto, ĉu granda, ĉu malgranda. Krome, tio permesas al la Unuiĝintaj Ŝtatoj ekspluati siajn grandegajn industriajn fontojn per tiom da energio kaj en tia

-
- 1 Ĉi tiu antaŭparolo al la dua rusa eldono de la „Manifesto” estas komune verkita de Marx kaj Engels. (*Trad.*)
 - 2 La unua rusa traduko de la „Manifesto” aperis en 1869 en Ĝenevo, en la eldonejo „Volnaja russkaja tipografija”. (*Trad.*)
 - 3 La rusa ĵurnalo „Kolokol” (sonorilo) havis demokratian kaj revolucion tendencan kaj estis eldonita de 1857 ĝis 1867 de la demokrataj revoluciuloj Aleksandr Herzen (1812 – 1870) kaj Nikolaj Ogarjov (1813 – 1877). (*Trad.*)

Antaŭparolo al la dua rusa eldono de 18821

skalo, ke post malmulta tempo ili devas rompi la ĝisnunan industrimonopolon de okcidenta Eŭropo, aparte tiun de Anglio. Ambaŭ cirkonstancoj reefikas revoluciige al Ameriko mem. La malgranda kaj meza terproprietajoj de la farmantoj, la bazo de la tuta politika konstitucio, iom post iom estas venkitaj de la konkurenco de la grandaj farmbieno. En la industriaj distriktoj samtempe unuan fojon disvolviĝadas amasa proletaro kaj okazas neimagebla koncentriĝo de kapitaloj.

Kaj nun Ruslando! Dum la revolucio de 1848/49 ne nur la eŭropaj princoj sed ankaŭ la eŭropaj burĝoj vidis en la rusa enmiksiĝo la solan savon kontraŭ la ĵus vekiginta proletaro. La caro estis proklamita ĉefo de la eŭropa reakcio. Hodiaŭ li estas militkaptito de la revolucio en Gatĉina¹, kaj Ruslando formas la avangardon de la revolucia agado en Eŭropo.

La „Komunista Manifesto” havis la taskon proklami la neeviteble antaŭstarantan dissolviĝon de la moderna burĝa proprieto. Sed en Rusio ni trovas, krom rapide ekfloranta kapitalisma trompo kaj nur ĵus evoluanta burĝa terproprieto, la duonon de la tero kiel komunan proprieton de la kamparanoj. Ekestas la demando: Ĉu la rusa *obŝĉina*, formo de la malnovega komuna proprieto je tero, kvankam forte subfosita, povos senpere transiri al la pli alta formo de komunisma komuna proprieto? Aŭ, ĉu inverse, ĝi devas antaŭe trairi la saman procezon de dissolviĝo, kiu karakterizas la historian evoluon de la Okcidento?

La hodiaŭ sole ebla respondo pri tio estas: Se la rusa revolucio fariĝos la signalo de proleta revolucio en la Okcidento, tiel, ke unu kompletigas la alian, tiam la nuna rusa komuna proprieto je tero povas servi kiel elirpunkto de

1 Post la mortigo de la caro Aleksandro la Dua fare de membroj de la sekreta organizaĵo „Narodniki” (popolamikoj) dum marto 1881, la posteulo Aleksandro la Tria kaŝiĝis en la Kastelo Gatĉina proksime de Sankt-Peterburgo. (*Trad.*)

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

komunisma evoluo

Londono, la 21-a de januaro 1882

Karl Marx, Friedrich Engels

Antaŭparolo al la germana eldono de 1883

La antaŭparolon al la prezentata eldono mi bedaŭrinde devas subskribi sole. Marx, la homo, al kiu la tuta laborista klaso de Eŭropo kaj Ameriko dankas pli multe ol al iu ajn alia – Marx ripozas en la tombejo de Highgate¹, kaj super lia tombo jam kreskas la unua herbo. Depost lia morto entute ne plu povas temi pri prilaboro aŭ kompletigo de la „Manifesto”. Des pli necesas laŭ mi esprimi ĉi tie ankoraŭfoje jenon.

La baza penso trairanta la tutan „Manifeston”: ke la ekonomia produktado kaj la socia strukturiĝo de ĉiu historia epoko, necese sekvanta el tiu produktado, formas la fundamenton por la politika kaj intelekta historio de tiu epoko; ke sekve (ekde la dissolviĝo de la praa komuna terproprietio) la tuta historio estis historio de klasbataloj, bataloj inter ekspluatataj kaj ekspluatantaj, regataj kaj regantaj klasoj sur diversaj ŝtupoj de la historia evoluo; sed ke tiu batalo nun atingis ŝtupon, kie la ekspluatata kaj subpremata klaso (la proletaro) ne plu povas liberigi sin de la klaso (burĝaro) ekspluatanta kaj subpremanta ĝin, sen samtempe liberigi la tutan socion por ĉiam de ekspluatado, subpremado kaj klasbataloj – tiu fundamenta penso sole kaj ekskluzive apartenas al Marx.²

- 1 Karl Marx mortis la 14-an de marto 1883 kaj estis entombigita en la tombejo Highgate (Hajgit) en Londono. (*Trad.*)
- 2 „Al tiu penso”, – mi diras en la antaŭparolo al la angla traduko, – kiu laŭ mia opinio kapablas doni al la historiscienco la saman progreson kiel la teorio de Darwin al la naturscienco – al tiu penso ni ambaŭ estis malrapide alproksimiĝintaj jam kelkajn jarojn antaŭ 1845. Kiom memstare mi mem estis progresinta en tiu direkto, plej bone montras mia laboro „Lage der arbeitenden Klasse in England” (La situacio de la laboranta klaso en Anglio). Sed kiam mi renkontiĝis kun Marx printempe de

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

Mi tion jam ofte esprimis; sed ĝuste nun necesas, ke tio ankaŭ estu legebla antaŭ la „Manifesto” mem.

Londono, la 28-a de junio 1993

F. Engels

1845 en Bruselo, li estis komplete ellaborinta tiun penson kaj metis ĝin al mi per preskaŭ same klaraj vortoj, kiel mi resumis ĝin supre. (*Noto de Engels al la germana eldono de 1890*)

Antaŭparolo al la angla eldono de 1888

La „Manifesto” estis publikigita kiel platformo de la Ligo de Komunistoj, komence ekskluzive germana, pli poste internacia, kiu por la politikaj cirkonstancoj de la eŭropa kontinento antaŭ 1848 estis neeviteble sekreta organizaĵo. Dum la Kongreso de la Ligo, kiu okazis en novembro 1847 en Londono, Marx kaj Engels estis komisiitaj, prepari kompletan teorion kaj praktikan partian programon. Verkita en germana lingvo, la manuskripto estis sendita al Londono por preso en januaro 1848, kelkajn semajnojn antaŭ la revolucio de la 24-a de februaro. Franca traduko aperis en Parizo, mallonge antaŭ la Junia Insurekcio de 1848. La unua angla traduko, farita de Miss Helen Macfarlane, aperis 1850 en „Red Republican” de George Julian Hamey (Ĥami) en Londono. Ankaŭ dana kaj pola eldonoj estis publikigitaj.

La sufoko de la Pariza Junia Insurekcio de 1848 – tiu unua granda batalo inter proletaro kaj burĝaro – portempe premis en la fonon la socialajn kaj politikajn strebadojn de la laborista klaso de Eŭropo. Ekde tiam la potencbatalo okazis denove sole inter la diversaj grupoj de la posedanta klaso, kiel en la tempo antaŭ la Februara Revolucio. La laborista klaso estis limigita je batalo pri politika kubut-libereco kaj je la pozicio de ekstreme maldekstra alo de la radikala burĝaro. Kie memstaraj proletaj movadoj daŭrigis doni vivsignojn pri si, ili estis senkomplete frakasitaj. La prusa polico ekzemple elspionis la centran administrezon de la Ligo de Komunistoj, kiu siatempe havis sian sidejon en Kolonjo. La membroj estis arestitaj kaj dum oktobro 1852 kondukita antaŭ la tribunalon, post dekok-monata aresto. Tiu fama „Kolonja komunista proceso” daŭris de la 4-a de

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

oktobro ĝis 12-a de novembro; sep de la arestitoj estis kondamnitaj je mallibero en fortikaĵo por la daŭro de tri ĝis ses jaroj. Tuj post la juĝo la Ligo estis formale malfondita flanke de la ankoraŭ restintaj membroj. Koncerne al la „Manifesto” ŝajnis, ke ĝi ekde tiam estis kondamnita al forgeso.

Post kiam la eŭropa laborista klaso estis kolektinta denove sufiĉe da forto por nova atako kontraŭ la reganta klaso, fondiĝis la Internacia Laborista Asocio. Sed tiu asocio, kiu estis fondita ekskluzive por la celo kunfandi la tutan batalpretan proletaron de Eŭropo kaj Ameriko al unu sola korpo, ne tuj povis proklami la principojn fiksitaĵojn en la „Manifesto”. La Internacio devis havi programon sufiĉe larĝan, por esti akceptebla por la anglaj sindikatoj, por la francaj, belgaj, italaj kaj hispanaj adeptoj de Proudhon¹ kaj por la Lassalle-anoj² en Germanio. Marx, kiu verkis tiun programon je la kontento de ĉiuj partioj, plene fidis al la intelekta evoluo de la laborista klaso, evoluo, kiu necese devis rezulti el la unuigita agado kaj komuna diskutado. La eventoj kaj sortoŝanĝoj en la batalo kontraŭ la kapitalo, pli multe la malvenkoj ol la venkoj, ne povis ne helpi konsciiĝi la homojn pri la nesufiĉeco de iliaj diversaj favoritaj ĉarlatanaĵoj, ebenigante la vojon al kompleta kompreno pri la veraj antaŭkondiĉoj por la emancipiĝo de la laborista klaso. Kaj Marx pravis. Kiam disfalis en la jaro 1874 la Internacio, ĝi postlasis la laboristojn jam en tute alia stato ol ĝi trovis ilin ĉe sia fondo en la jaro 1864. La Proudhon-ismo en Francio, la Lassalle-ismo en Germanio estis mortontaj, kaj

-
- 1 Proudhon, Pierre Joseph (1809-1865), franca ekonomikisto kaj sociologo, publicisto, ideologo de la etburĝaro, unu el la fondintoj de la anarkiismo. (*Trad.*) [en la reta versio: anarkismo. -vl]
 - 2 Lassalle al mi persone konfesis sin disĉiplo de Marx kaj kiel tiu staris sur la fundamento de la „Manifesto”. Tamen, en sia publika agitado dum la jaroj 1862 – 1864 li nur restis ĉe la postuloj de produktadaj kooperativoj kun ŝtata kredito. (*Noto de Engels*)

Antaŭparolo al la angla eldono de 1888

ankaŭ la konservativaj anglaj sindikatoj, kvankam en sia plimulto ili jam longe estis rompintaj la ligojn al la Internacio, alproksimiĝis malrapide al la punkto, kie ilia prezidanto lastjare en Swansea en ilia nomo povis deklari: „La kontinenta socialismo por ni perdis sian terurecon”¹. Vere: La principoj de la „Manifesto” faris konsiderindan progreson inter la laboristoj de ĉiuj landoj.

Tiamaniere la „Manifesto” mem denove fariĝis pli aktuala. La germana teksto ekde 1850 estis kelkfoje represita en Svisio, Anglio kaj en Ameriko. En la jaro 1872 ĝi estis tradukita en la anglan, nome en Nov-Jorko, kie la traduko aperis en „Woodhull and Claflin’s Weekly”. Surbaze de tiu angla versio aperis ankaŭ franca en „Le Socialiste” en Nov-Jorko. Post tio en Ameriko aperis ankoraŭ almenaŭ du anglaj tradukoj, pli malpli fuŝitaj, de kiuj unu estis represita en Anglio. La unua rusa traduko, farita de Bakunin, estas eldonita ĉirkaŭ la jaro 1863 en la presejo „Kolokol” de Herzen en Ĝenevo, dua, same en Ĝenevo, de la heroa Vera Zasuliĉ², en la jaro 1882. Nova dana eldono troviĝas en la „Socialdemokratisk Bibliotek”, Kopenhago 1885; nova franca traduko aperis en „Le Socialiste”, 1886 en Parizo. Laŭ ĉi lasta oni preparis hispanan tradukon kaj publikigis ĝin en 1886 en Madrido. La nombro de germanaj represoj ne estas precize indikebla, estis entute almenaŭ dek du. Armena traduko, kiu devintus aperi antaŭ kelkaj monatoj en Konstantinopolo, ne povis enmondiĝi, ĉar, kiel oni komunik-

-
- 1 Engels aludas al la parolado de Bevan, la prezidanto de la „Trade Unions” (angla sindikato) de la urbo Swansea, kiun tiu estis farinta en la jaro 1887 kadre de la jarkongreso de la Trade-Unions. (*Trad.*)
 - 2 Vera Ivanovna Zasuliĉ (1849 – 1919), rusa revoluciulino. En sia postparolo, kiun Engels en 1894 verkis al la artikolo „Socialaĵoj en Ruslando”, li mencias kiel verkinton de la citita traduko G. V. Pleĥanov. Ankaŭ Pleĥanov atentigis en 1900 en pli posta eldono de la „Manifesto”, ke la menciita traduko estas de li. (*Trad.*)

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

is al mi, la eldonisto ne kuraĝis aperigi libron, sur kiu estas menciita la nomo Marx, dum la tradukisto rifuzis prezenti ĝin kiel sian propran verkon. Pri pluaj tradukoj en aliajn lingvojn mi ja aŭdis sed ilin ne vidis. Tiel la historio de la „Manifesto” altgrade spegulas la historion de la moderna laborista movado; nuntempe ĝi sendube estas la plej vaste disvastigita, plej internacia verko de la tuta socialisma literaturo, komuna programo, akceptita de milionoj da laboristoj de Siberio ĝis Kalifornio.

Kiam ni estis skribintaj ĝin, ni tamen ne estus povintaj ĝin titoli **socialista** manifesto. Sub socialistoj en 1847 oni komprenis unuflanke la adeptojn de diversaj utopiecaj sistemoj: la Owen-istoj¹ en Anglio, la Fourier-istoj² en Francio, ambaŭ jam ŝrumpiĝintaj al malrapide formortantaj sektoj; aliflanke la plej multespecajn „socialajn” ĉarlatan-ojn, kiuj promesis forigi la sociajn mankojn per ĉiuspeca flikado, sen ajna danĝero por kapitalo kaj profito – en ambaŭ kazoj temas pri homoj starintaj ekster la laborista movado kaj prefere serĉintaj subtenon ĉe la „kleraj” klasoj. Tiu parto de la laborista klaso, kiu estis konvinkiĝinta pri la nesufiĉeco de nuraj politikaj reformoj kaj postulinta totalan rekonstruon de la socio, tiu parto siatempe sin nomis komunista. Temis ankoraŭ pri kruda, nerabotita, pure instinkta speco de komunismo; sed ĝi trafis la kardinalan punkton kaj estis sufiĉe potenca en la laborista movado, por krei la utopiecan komunismon, tiun de Cabet en Francio, tiun de Weitling en Germanio. Pro tio do en la jaro 1847 la socialismo estis movado de la meza klaso, la komunismo – movado de la laborista klaso. La socialismo estis „salon-akceptebla”, almenaŭ sur la kontinento; la komunismo estis la rekta kontraŭo. Kaj ĉar ekde la komenco ni opiniis, ke „la

1 Adeptoj de Robert Owen (Oŭen) (1771 – 1858), angla utopieca komunisto. (*Trad.*)

2 Adeptoj de François Marie Charles Fourier (Furje) (1772 – 1837), franca utopieca socialisto. (*Trad.*)

Antaŭparolo al la angla eldono de 1888

emancipado de la laborista klaso devas esti la faro de la laborista klaso mem", ne povis esti dubo pri tio, kiun el la du nomoj ni elektos. Eĉ pli, ekde tiam ni neniam pensis malkonfesi ĝin.

Kvankam la „Manifesto” estas nia komuna laboro, mi sentas min tamen devigita konstati, ke la fundamenta penso, kiu formas la kernon, apartenas al Marx. Tiu penso estas jena: ke en ĉiu historia epoko la reganta ekonomio kun sia maniero de produktado kaj interŝanĝado kaj la el tio neeviteble rezultanta socia strukturiĝo formas la fundamenton sur kiu konstruiĝas la politika kaj la intelekta historio de tiu epoko kaj kiu estas klarigebla nur surbaze de tiu fundamento; ke sekve la tuta historio de la homaro (ekde la malapero de la primitiva genta socio kun sia komuna terproprieto) estis historio de klasbatalo, de bataloj inter ekspluatantaj kaj ekspluatataj, regantaj kaj subpremataj klasoj; ke la historio de tiuj klasbataloj formas evoluvicon, en kiu oni nuntempe atingis ŝtupon, kie la ekspluatata kaj subpremata klaso – la proletaro – ne povas atingi sian liberiĝon el sub la jugo de la ekspluatanta kaj reganta klaso – la burĝaro, – sen samtempe unu fojon por ĉiam liberiĝi la tutan socion de ĉiu ekspluatado kaj subpremado, de ĉiuj klasdiferencoj kaj klasbataloj.

Al tiu penso, kiu laŭ mia opinio kapablas doni al la histori-scienco la saman progreson kiel la teorio de Darwin al la naturscienco – al tiu penso ni ambaŭ estis malrapide alproksimiĝintaj jam kelkajn jarojn antaŭ 1845. Kiom memstare mi mem estis progresinta en tiu direkto plej bone montras mia laboraĵo „La situacio de la laboranta klaso en Anglio”¹. Sed kiam mi rerenkontiĝis kun Marx printempe de 1845 en Bruselo, li estis komplete ellaborinta tiun penson

1 „The Condition of the Working Class in England in 1844”. By Frederick Engels. Translated by Florence K. Wisohnewetzky, New York. Lovell, London, [en la reta versio: LovellLondon, -v1] W. Reeves, 1888. (*Noto de Engels*)

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

kaj metis ĝin al mi per preskaŭ same klaraj vortoj, kiel mi resumis ĝin supre.

El nia komuna antaŭparolo al la germana eldono de 1872 mi citas jenon:

„Kiom ajn ŝanĝiĝis la cirkonstancoj dum la lastaj dudek kvin jaroj, la ĝeneralaj principoj, evoluigitaj en ĉi tiu „Manifesto“, entute restas plene validaj ankaŭ hodiaŭ. Jen kaj jen oni devus plibonigi detalojn. Kiel la „Manifesto“ mem klarigas, la praktika apliko de tiuj principoj ĉie kaj ĉiam dependas de la ekzistantaj historiaj kondiĉoj. Pro tio ankaŭ ne estas metita aparta akcento sur la revoluciajn intervenojn, proponitajn fine de la ĉapitro II. Tiu parto hodiaŭ aspektus multrilate alia. Rigarde al la grandega evoluo de la grandindustrio ekde 1848 kaj la plibonigita kaj progresinta partia organiziĝo de la laborista klaso, akompaninta ĝin, rigarde al la praktikaj spertoj kolektitaj unue dum la Februara Revolucio kaj eĉ multe pli dum la Pariza Komunumo, kie unuan fojon la proletaro dum du monatoj havis la politikan potencon, rigarde al tio ĉi tiu programo hodiaŭ kelkaloke estas malnoviĝinta. La Komunumo aparte pruvis, ke ‘la laborista klaso ne simple povas preni en posedon la pretan ŝtatemekanismon kaj ekfunkciigi ĝin por siaj propraj celoj’ (Vidu ‘The Civil War in France. Address to the General Council of the International Working-Men’s Association’ London, Truelove, 1871, p. 15¹, kie la temo estas plutraktita). Plue kompreneblas, ke la kritiko pri la socialisma literaturo hodiaŭ estas mankhava, ĉar ĝi nur traktas ĝis 1847; la samo koncernas la rimarkojn pri la rilato de la komunistoj al la diversaj opoziciaj partioj (ĉapitro IV), kvankam ili nuntempe ankoraŭ estas ĝustaj en la bazaj trajtoj, tamen en sia prezento ili hodiaŭ estas malnoviĝintaj jam pro tio, ĉar la politika situacio totale transformiĝis kaj la historia evoluo elmondigis la plej

1 En Esperanto: Karlo Markso: La interna milito en Francio, v.c., p. 68. -vl

Antaŭparolo al la angla eldono de 1888

multajn de la tie menciitaj partioj.

Tamen, la 'Manifesto' estas historia dokumento, kiun ni ne plu rajtigas nin ŝanĝi."

La prezentata traduko devenas de s-ro Samuel Moore, la tradukinto de la plej granda parto de la „Kapitalo” de Marx. Ni komune trarigardis ĝin, kaj mi aldonis kelkajn notojn por klarigi historiajn aludojn.

Londono, la 30-a de januaro 1888

Friedrich Engels

Antaŭparolo al la germana eldono de 1890

Post kiam la supra¹ estis skribita, denove nova germana eldono de la „Manifesto” fariĝis necesa kaj ankaŭ multo okazis kun la „Manifesto”, kio estas ĉi tie mencienda.

Dua rusa traduko – de Vera Zasuliĉ – aperis en 1882 en Ĝenevo. La antaŭparolon al tio verkis Marx kaj mi. Bedaŭrinde mi perdis la germanan originalan manuskripton, mi do devas retraduki el la rusa, per kio la laboraĵo tute ne pliboniĝas². Ĝi tekstas:

„La unua rusa eldono de la ‘Manifesto de la Komunista Partio’ en la traduko de Bakunin, aperis komence de la 60-aj jaroj en la presejo de ‘Kolokol’. Tiam la rusa eldono de tiu verko por la okcidento maksimume havis la signifon de literatura kuriozaĵo. Tia opinio hodiaŭ ne plu estus ebla. Kiom limigita estis la kampo de disvastigiteco de la proleta movado dum la tempo de la unua publikigo de la ‘Manifesto’ (januaro 1948), plej bone montras la lasta ĉapitro: ‘Rilato de la komunistoj al la diversaj opoziciaj partioj’. Tie antaŭ ĉio mankas Ruslando kaj la Unuiĝintaj Ŝtatoj. Estis la tempo, kiam Ruslando estis la lasta granda rezervujo de la tuta eŭropa reakcio; kiam la elmigrado al la Unuiĝintaj Ŝtatoj absorbis la superflujajn fortojn de la eŭropa proletaro. Ambaŭ landoj provizis Eŭropon per krudmaterialoj kaj samtempe servis kiel merkatoj por la vendo de ĝiaj industriaj varoj. Do tiam ambaŭ landoj tiel aŭ aliel estis kolonoj de la ekzistanta eŭropa ordo.

1 Engels aludas je la antaŭparolo al la germana eldono de 1882. (*Trad.*)

2 La germana originalo, kiun Engels kredis perdita, estis tamen retrovita kaj iĝis la bazo de la esperantigo de la antaŭparolo al la dua rusa eldono de 1882. (*Trad.*)

Antaŭparolo al la germana eldono de 1890

Kiom ĉio ĉi hodiaŭ ŝanĝiĝis! Ĝuste la eleŭropa enmigrado ebligis la kolosan evoluon de la nordamerika agrikulturo, kies konkurenco ekskuas la fundamentojn de la granda same kiel de la malgranda terproprietato en Eŭropo. Samtempe tio donis al la Unuiĝintaj Ŝtatoj la eblecon komenci la ekspluatadon de siaj riĉaj industriaj fontoj, kaj fari tion per tia energio kaj en tia skalo, ke tio certe finos post mallonga tempo la industrimonopolon de okcidenta Eŭropo. Kaj ambaŭ tiuj cirkonstancoj reefikas revoluciige al Ameriko mem. La malgranda kaj meza terproprietatoj de la memlaborantaj farmantoj, la bazo de la tuta politika ordo de Ameriko, estas pli kaj pli venkita per la konkurenco de la grandaj farmbienoj. En la industriaj regionoj samtempe unuan fojon disvolviĝadas amasa proletaro apud neimag-ebla koncentriĝo de kapitaloj.

Kaj nun Ruslando! Dum la revolucio de 1848/49 ne nur la eŭropaj monarkoj sed ankaŭ la eŭropaj burĝoj vidis en la rusa interveno la solan savon kontraŭ la proletaro, kiu ĵus konsciiĝadas pri siaj fortoj. Ili proklamis la caron ĉefo de la eŭropa reakcio. Hodiaŭ li sidas kiel militkaptito de la revolucio en Gatĉina¹, kaj Rusio formas la avangardon de la revolucia movado en Eŭropo.

Estis la tasko de la „Komunista Manifesto“ proklami la neeviteble antaŭstarantan pereon de la moderna burĝa proprieto. Sed en Ruslando ni trovas, krom la hastege evoluanta kapitalisma ordo kaj la nur ĵus evoluanta burĝa terproprietato, la duonon de la tero kiel komunan proprieton de la kamparanoj.

Nun la demando: Ĉu la rusa kamparana komunumo, tiu tamen jam tre degenerita formo de origina komuna propri-

1 Post la mortigo de la caro Aleksandro la Dua fare de membroj de la sekreta organizaĵo „Narodniki“ (popolamikoj) dum marto 1881, la posteulo Aleksandro la Tria kaŝiĝis en la Kastelo Gatĉina proksime de Sankt-Peterburgo. (*Trad.*)

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

eto je tero, povas transiri al la pli alta komunisma formo de la terproprieto, aŭ ĉu ĝi antaŭe devas trairi la saman procezon de dissolviĝo, kiu karakterizas la historian evoluon de la Okcidento?

La hodiaŭ sole ebla respondo al tiu demando estas la sekva. Se la rusa revolucio fariĝos la signalo por laborista revolucio en la Okcidento, tiel ke ambaŭ kompletigos unu la alian, tiam la hodiaŭa rusa komuna proprieto povas servi kiel elirpunkto de komunisma evoluo.”

Londono, la 21-a de januaro 1882

Nova pola traduko aperis proksimume samtempe en Ĝenevo: „Manifest Komunistyczny”.

Krome aperis nova dana traduko en „Socialdemokratisk Bibliotek”, Kopenhago 1885. Ĝi bedaŭrinde ne estas tute kompleta. Kelkaj esencaj partoj mankas, kiuj por la tradukinto ŝajne estis malfacilaj, kaj krome jen kaj jen rimarkeblas spuroj de suprajeco, kiuj estas malagrable rimarkeblaj, des pli ĉar oni vidas en la laboro, ke la tradukinto kun iom pli da zorgemo povintus fari bonegan tradukon.

En la jaro 1886 aperis nova franca traduko en „Le Socialiste”, Parizo; ĝi estas la ĝis nun plej bona, kiu aperis.

Post ĝi samjare aperis hispana traduko, unue en la Madrida „El Socialista” kaj poste kiel broŝuro: „Manifesto del Partido Comunista” por Carlos Marx y F. Engels, Madrid, Administración de „El Socialista”, Hernán Cortes 8.

Kiel kuriozaĵon mi ankoraŭ mencias, ke en 1887 oni ofertis al konstantinopola eldonisto la manuskripton de armena traduko. La bonulo tamen ne kuraĝis presi ion, sur kiu aperas la nomo Marx kaj opiniis, ke pli bone la tradukinto mem aperu kiel verkinto, kion tiu tamen rifuzis.

Post kiam en Anglio plurfoje estis represita foje tiu foje

Antaŭparolo al la germana eldono de 1890

alia pli aŭ malpli erara amerika traduko, fine aperis aŭtentika traduko en la jaro 1888. Ĝi devenas de mia amiko Samuel Moore kaj antaŭ la preso estas ankoraŭfoje komune trarigardita de ni ambaŭ. La titolo estas: „Manifesto of the Communist Party”, by Karl Marx and Frederick Engels, 1888, London, William Reeves, 185 Fleet st. E.C. Kelkajn notojn de tiu eldono mi transprenis en la ĉi tie prezentitan.

La „Manifesto” havis propran biografion. En la momento de la apero entuziasme bonvenigita de la tiam ankoraŭ malgranda avangardo de la scienca socialismo (kiel pruvas la tradukoj menciitaj en la unua antaŭparolo), ĝi baldaŭ estis premita de la reakcio en la malantaŭon post la malvenko de la parizaj laboristoj en junio 1848 kaj fine „laŭleĝe” proskribita per la kondamno kontraŭ la kolonjaj komunistoj, en novembro 1852¹. Kiam la laborista movado, kalkulita ekde la Februara Revolucio, malaperis de la publika scenejo, ankaŭ la „Manifesto” malaperis en la fono.

Kiam la eŭropa laborista klaso denove estis sufiĉe refortiĝinta por nova atako kontraŭ la potenco de la regantaj klasoj, kreiĝis la Internacia Laborista Asocio. Ĝi havis la celon kunfandi en **unu** grandan armean korpon la tutan batalpretan laboristaron de Eŭropo kaj Ameriko. Pro tio ĝi ne povis **eliri** de la principoj prezentitaj en la „Manifesto”. Ĝi devis havi programon, kiu ne fermu la pordon al la anglaj sindikatoj, la francaj, belgaj, italaj kaj hispanaj Proudhonistoj kaj al la germanaj Lassalle-anoj². Tiu programo – la

1 En la kolonja proceso kontraŭ komunistoj (3.10 – 12. 12. 1852) oni akuzis 12 membrojn de la Ligo de Komunistoj (1847 – 1852) pro ŝtatperfido. La akuzo baziĝis sur „protokolibro” pri la centra administrejo de la Ligo, fabrikaĵo de la prusa polico kaj sur aliaj falsajĵoj. En sia verko „Malkaŝigoj pri la kolonja proceso kontraŭ komunistoj” Marks prezentis la verajn kaŭzojn de la proceso kaj senmaskigis la prusan policismon. (*Trad.*)

2 Lassalle al mi persone ĉiam konfesis sin „disĉiplo” de Marx kaj kiel tiu kompreneble staris sur la fundamento de la „Manifes-

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

enkonduko al la statuto de la Internacio – estis skizita de Marx kun majstreco, kiun eĉ Bakunin kaj la anarkistoj agnoskis. Laŭ Marx la finfina venko de la principoj fiksitaĵoj en la „Manifesto” venos sole el la intelekta evoluo de la laborista klaso, kiu necese rezultas el la unuigitaj agoj kaj diskutadoj. La eventoj kaj sortoŝanĝoj en la batalo kontraŭ la kapitalo, pli la malvenkoj ol la venkoj, ne povis malhelpi montri al la batalintoj la nesufiĉecon de iliaj ĝisnunaj ĉiopovaj rimedoj kaj malfermi iliajn kapojn por pli profunda kompreno de la veraj kondiĉoj por la laborista emancipado. Kaj Marx pravis. La laborista klaso de 1874, kiam la Internacio estis malfondita, estis tute alia ol tiu de 1864, kiam ĝi estis fondita. La Proudhon-ismo en la romanlingvaj landoj, la specifa Lassalle-ismo en Germanio estis mortantaj kaj eĉ la sisteme konservativegaj anglaj sindikatoj malrapide atingis la punkton, kiam en la jaro 1887 la prezidanto de ilia kongreso en Swansea povis deklari en ilia nomo: „La kontinenta socialismo por ni perdis sian terurecon”. La kontinenta socialismo – sed tio jam en 1887 estis nur la teorio prezentita en la „Manifesto”. Kaj tiel certgrade la historio de la „Manifesto” spegulas la historion de la moderna laborista movado ekde 1848. Nuntempe ĝi sendube estas la plej disvastigita, la plej internacia produkto de la tuta socialisma literaturo, la komuna programo de multaj milionoj de laboristoj ĉiulandaj de Siberio ĝis Kalifornio.

Kaj tamen, kiam ĝi aperis, ni ne estus rajtintaj nomi ĝin socialista manifesto. Sub socialistoj en 1847 oni komprenis du specojn da homoj. Unuflanke temis pri adeptoj de diversaj utopiecaj sistemoj, speciale la Owen-istoj en Anglio kaj la Fourier-istoj en Francio, ambaŭ jam tiam ŝrumpiĝintaj al nuraj malrapide formortantaj sektoj. Aliflanke la plej

to”. Alia afero estis kun tiuj liaj adeptoj, kiuj restis ĉe la postuloj de produktadaj kooperativoj kun ŝtata kredo kaj kiuj dividis la tutan laboristan klason en ŝtathelpantojn kaj memhelpantojn. (*Noto de Engels*)

Antaŭparolo al la germana eldono de 1890

multspecaj sociaj ĉarlatanoj, kiuj per siaj ĉiopovaj medicin-aĵoj kaj per ĉiaspeca flikado volis helpi forigi la sociajn mankojn, sen ajna danĝero por la kapitalo kaj profito. En ambaŭ kazoj temas pri homoj starintaj ekster la laborista movado kaj prefere serĉintaj subtenon ĉe la „kleraj” klasoj. Tamen tiu parto de la laboristaro, kiu estis konvinkita pri la nesufiĉeco de nuraj politikaj reformoj kaj postulis totalan rekonstruon de la socio, tiu parto siatempe sin nomis **komunista**. Estis nur malglate ellaborita, nur instinkta, foje iom kruda komunismo; sed ĝi estis sufiĉe potenca, por krei du sistemojn de la utopieca komunismo, en Francio la „ikarian” de Cabet, en Germanio tion de Weitling. Socialismo en 1847 estas burĝa movado, komunismo estas laborista movado. La socialismo, almenaŭ sur la kontinento, estis salonakceptebla, la komunismo estis la rekta kontraŭo. Kaj ĉar ni jam tiam tre firme opiniis, ke „la emancipado de la laborista klaso devas esti la faro de la laborista klaso mem”, dum neniuj momento povis ekesti dubo, kiun el la du nomoj ni elektos. Ankaŭ poste neniam venis al ni la penso refuti ĝin.

„Proletoj el ĉiuj landoj, unuiĝu!” – Nur malmultaj voĉoj respondis, kiam ni vokis tiujn vortojn en la mondon, antaŭ nun jam 42 jaroj, ĉe la antaŭtago de la unua pariza revolucio, kiam la proletaro aperis kun siaj propraj postuloj. Sed la 28-an de septembro 1864 la proletoj de la plej multaj okcident-eŭropaj landoj unuiĝis en la Internacia Laborista Asocio, glormemore. Tamen, la Internacio mem nur vivis naŭ jarojn. Sed ke ankoraŭ vivas la de ĝi fondita eterna ligo de la proletoj el ĉiuj landoj, pli forte vivas ol iam ajn, por tio ne ekzistas pli bona atestanto ol la hodiaŭa tago. Ĉar hodiaŭ, kiam mi skribas ĉi tiujn liniojn, la eŭropa kaj amerika proletaroj unuan fojon inspektas siajn batalfortojn, mobiliz-itajn kiel **unu** armeo, sub **unu** flago kaj por **unu** proksima celo: por la okhora leĝe garantienda normala labortago, proklamita jam de la Ĝeneva Kongreso de la Internacio en

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

1866 kaj denove de la Pariza Laborista Kongreso en 1889¹. Kaj la spektaklo de la hodiaŭa tago malfermos la okulojn al la kapitalistoj kaj terposedantoj de ĉiuj landoj pri tio, ke vere hodiaŭ la proletoj el ĉiuj landoj unuiĝis.

Se nur Marx ankoraŭ starus apud mi, por tion vidi prop-
raokule!

Londono, la 1-a de majo 1890

F. Engels

1 La unua kongreso de la Internacia Laborista Asocio okazis de la 3-a ĝis la 8-a de septembro 1866 en Genevo. La plej gravaj decidoj de la kongreso baziĝas sur la de Marx ellaboritaj „instrukcioj por la delegitoj de la Provizora Centra Konsilantaro pri la unuopaj demandoj”. La kongreso akceptis i. a. ses el la entute naŭ de Marx verkitaj punktoj, inter ili rezolucion pri limigo de la taga labortempo. La Internacia Socialista Kongreso en Parizo, kiu fariĝis la fondokongreso de la 2-a Internacio, okazis de la 14-a ĝis 20-a de julio 1889. La kongreso ellaboris la bazon por internaciaj leĝoj por gardi la rajtojn de la laboristoj. La decido de la kongreso, je la 1-a de majo 1890 en ĉiuj landoj organizi manifestaciojn por la okhora labortago kaj internacia solidareco, fariĝis la naskiĝa horo de la bataltago de la laborista klaso. (*Trad.*)

Antaŭparolo al la dua pola eldono de 1892

La fakto, ke fariĝis necesa nova pola eldono de la „Komunista Manifesto”, donas motivon por diversaj konsideroj.

Unue estas rimarkinde, ke lastatempe la „Manifesto” fariĝis kriterio por la evoluo de la grandindustrio sur la eŭropa kontinento. Tiom, kiom en difinita lando la grandindustrio plivastiĝas, tiom ankaŭ kreskas inter la laboristoj de la sama lando la postulo je klarigoj pri ilia pozicio kiel laborista klaso rilate al la posedantaj klasoj, disvastiĝas inter ili la socialista movado kaj kreskas la akirbezono al la „Manifesto”. Tiel ne nur la stato de la laborista movado sed ankaŭ la evolustato de la grandindustrio en ĉiu lando povas esti sufiĉe precize mezurata per la nombro da ekzempleroj de la „Manifesto”, disvastigita en la lingvo de la lando.

Laŭ tio la pola eldono indikas decidan progreson de la pola industrio. Kaj ke tiu progreso ekde la lasta eldono, aperinta antaŭ dek jaroj, vere okazis, pri tio ne povas esti dubo. La Rusia Pollando, Kongreso-Pollando¹ fariĝis la granda industridistrikto de la rusia regno. Dum la rusia grandindustrio estas sporade dissemita – unu parto ĉe la Finna Golfo, alia parto en la Centro (Moskvo kaj Vladimir), tria parto ĉe la Nigra kaj Azova Maroj, ankoraŭ aliaj dissemitaj, – la pola industrio estas kunpremita sur relative eta teritorio kaj ĝuas la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de tiu koncentriĝo. La avantaĝojn rekonis la konkurantaj rusaj fabrikantoj, kiam ili postulis protektajn importdoganojn kontraŭ Pollando, malgraŭ sia arda deziro transformi la

1 Kongreso-Pollando oni nomis tiun parton de Pollando, kiu fariĝis parto de Ruslando sub la oficiala nomo Reĝa Regno Pollando. Tio okazis surbaze de la decidoj de la Kongreso en Vieno en la jaroj 1814/1815. (*Trad.*)

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

polojn en rusojn. La malavantaĝoj – por la polaj fabrikantoj kaj por la rusa registaro – montriĝis en la rapida disvastiĝo de socialistaj ideoj inter la polaj laboristoj kaj en la kreskanta akirbezono pri la „Manifesto”.

Sed la rapida evoluo de la pola industrio, superinta la rusan, estas siavice nova pruvo por la neestingebla vivoforto de la pola popolo kaj nova garantio por ĝia antaŭstaranta nacia restarigo. Sed la restarigo de sendependa forta Pollando estas afero koncernanta ne nur la polojn sed nin ĉiujn. Sincera internacia kunagado de la eŭropaj nacioj nur eblas, se ĉiu el tiuj nacioj estos plene aŭtonoma en sia propra domo. La revolucio de 1848, sub proleta flago, igis la proletajn batalintojn nur fari la laboron de la burĝaro, se ankaŭ ties testamento-realigintoj Louis Bonaparte kaj Bismarck¹ atingigis la sendependecon de Italio, Germanio, Hungario; sed Pollandon, kiu ekde 1792 estis farinta pli multe por la revolucio ol ĉiuj tri landoj kune, Pollandon oni lasis al sia propra sorto, kiam ĝi en 1863 malvenkis pro la dekobla rusa superforto². La sendependecon de Pollando la nobelaro nek povis konservi nek reakiri; al la burĝaro ĝi hodiaŭ almenaŭ estas indiferenta. Kaj tamen ĝi estas neceso por la harmonia kunagado de la eŭropaj nacioj. Nur la juna pola proletaro povas elbatali ĝin, kaj en ties manoj ĝi estas sekura. Nome, la laboristoj de la tuta cetera Eŭropo same bezonas la sendependecon de Pollando kiel la polaj laboristoj mem.

Londono, la 10-a de februaro 1892

F. Engels

-
- 1 Otto von Bismarck (1815 – 1898), prusa politikisto kaj diplomato, ludis en 1871 gravan rolon ĉe la unuigo de Germanio sub prusa egido. Li estis kanceliero de la imperiestra Germanio de 1871 – 1890. (*Trad.*)
 - 2 Aludo al la nacia ribelo, kiu komenciĝis en januaro 1863 sur pola tero (sed parto de la rusa imperio) kaj estis kruele sufokita per la caraj trupoj. (*Trad.*)

Antaŭparolo al la itala eldono de 1893

Al la itala leganto

La publikigo de la „Manifesto de la Komunista Partio” samtempis precize preskaŭ je la tago kun la 18-a de marto 1848, kiam okazis la revolucioj de Milano kaj Berlin, kiam en la centro de la eŭropa kontinento unuflanke kaj de la Mediteraneo aliflanke leviĝis du nacioj, kiuj ĝis tiam estis malfortigitaj pro teritoria dishakiteco kaj internaj kvereloj kaj pro tio subiĝintaj sub fremda regado. Dum Italio estis subigita al la imperiestro de Aŭstrio, Germanio devis porti, se ankaŭ ne tiel rekte, la ne malpli pezan jugon de la caro de ĉiuj rusoj. La efikoj de la 18-a de marto 1848 liberigis Italion kaj Germanion el tiu honto. Se ambaŭ grandaj nacioj estis restarigitaj kaj certgrade redonitaj al si mem en la tempo inter 1848 ĝis 1871, tiam, kiel diris Karl Marx, tio okazis pro tio, ĉar la samaj homoj, kiuj sufokis la revolucion de 1848, fariĝis kontraŭvole ties testamento-realigantoj.

La revolucio estis tiam ĉie la faro de la laborista klaso. Estis la laborista klaso, kiu starigis la barikadojn pagante per sia vivo. Nur la laboristoj de Parizo, kiam ili faligis la registaron, havis la deklaritan celon, faligi la burĝan reĝimon. Sed kiom ajn ili konsciis la neeviteblan antagonismon, ekzistintan inter ilia propra klaso kaj la burĝaro, nek la ekonomia progreso de la lando nek la spirita evoluo de la francaj laboristaj amasoj estis atinginta tiun gradon, kiu estus ebliginta reorganizon de la socio. Pro tio fine la fruktojn de la revolucio enpoŝigis la kapitalista klaso. En la aliaj landoj, kiel Italio, Germanio, Aŭstrio, Hungario, la laboristoj ekde la komenco faris nenion alian ol helpi al la burĝaro akiri la potencon. Tamen en neniu lando estas ebla la regado de la burĝaro sen nacia sendependeco. Tial la revolucio de 1848 devis sekvigi la unuecon kaj sendepend-

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

econ de la nacioj, kiuj ĝis tiam ne havis ilin: Italio, Germanio, Hungario, Pollando sekvos siatempe.

Kvankam la revolucio de 1848 ne estis socialista revolucio, ĝi tamen ebenigis la vojon al tia, pretigis al ĝi la terenon. Kun la evoluo de la grandindustrio en ĉiuj landoj la burĝa reĝimo dum la lastaj 45 jaroj estis kreinta multnombra, koncentritan kaj fortan proletaron, estis produktinta – por uzi esprimon el la „Manifesto” – sian propran tombofosiston. Sen restarigo de la sendependeco kaj sen unueco de ĉiu eŭropa nacio estus realigita nek la internacia unuiĝo de la proletaro nek trankvila komprenema kunagado de tiuj nacioj por atingi komunajn celojn. Oni nur imagu komunan internacian agadon de italaj, hungaraj, germanaj, polaj, rusaj laboristoj sub la politikaj cirkonstancoj antaŭ 1848!

La batalegoj de 1848 do ne estis vanaj, ankaŭ ne vanaj la 45 jaroj, kiuj disigas nin de tiu revolucia etapo. La fruktoj ekmaturiĝas, kaj mi nur deziras, ke la publikigo de ĉi tiu itala traduko de la „Manifesto” estu bona antaŭsigno por la venko de la itala proletaro, tiel, kiel tio estis la publikigo de la originalo por la internacia revolucio.

La „Manifesto” juste akceptas la revolucion rolon, kiun ludis la kapitalismo dum la pasinteco. La unua kapitalisma nacio estis Italio. La fino de la feŭda mezepoko kaj la komenco de la moderna kapitalisma epoko estas markitaj per granda figuro – per la italo Dante, kiu samtempe estis la lasta poeto de la mezepoko kaj la unua poeto de la moderna tempo. Hodiaŭ, same kiel ĉirkaŭ la jaro 1300, komenciĝas nova historia epoko. Ĉu Italio donacos la novan Dante, kiu proklamos la naskiĝhoron de la proleta epoko?

Londono, la 1-a de februaro 1893

Friedrich Engels

MANIFESTO DE LA KOMUNISTA PARTIO

Fantomo hantas en Eŭropo – la fantomo de komunismo. Ĉiuj potencoj de la malnova Eŭropo alianciĝis por sankta ĉaskampanjo kontraŭ tiu fantomo: la Papo¹ kaj la Caro², Metternich³ kaj Guizot⁴, francaj radikaluloj kaj germanaj policistoj.

Kie estas tiu opozicia partio, kiu de siaj regantaj kontraŭuloj ne estas misfamigita kiel komunista? Kie estas la opozicia partio, kiu ne estis reĵetinta la stigmatizan riproĉon de komunismo kaj al la pli progresintaj opoziciuloj kaj al siaj reakciaj kontraŭuloj?

Du aferoj sekvas el tiu fakto.

La komunismo jam estas agnoskita mem kiel potenco de ĉiuj eŭropaj potencoj.

Estas urĝa tempo, ke la komunistoj antaŭ la tuta mondo malkaŝe prezentu siajn vidpunktojn, siajn celojn, siajn tendencojn kontraŭmetante al la fantomfabelo pri la komunismo manifeston de la partio mem.

Por tiu celo komunistoj de plej diversaj nacioj kunvenis en Londono kaj skizis la sekvan Manifeston, publikigotan en

- 1 Temas pri la papo Pius la IX-a (1792 – 1878). (*Trad.*)
- 2 Temas pri la caro Nikolao la Unua (1796 – 1855), nomita „ĝendarmo de Eŭropo”. (*Trad.*)
- 3 Klemens Lothar Wenzel (Vencel), princo de Metternich (1773 – 1859), aŭstra politikisto, malamiko de ĉiuj liberalaj aŭ naciaj movadoj, kiu provis kunteni la habsburgan monarkion per absolutisma polica reĝimo. (*Trad.*)
- 4 François Pierre Guillaume Guizot (Gizo) (1787 – 1874), franca liberala politikisto, faligita per la Februara Revolucio 1848. (*Trad.*)

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke
la lingvoj angla, franca, germana, itala, flandra kaj dana.

I. Burĝoj kaj proletoj¹

La historio de la tuta ĝisnuna socio² estas la historio de klasbataloj.

Liberulo kaj sklavo, patricio kaj plebano, barono kaj servutulo, gildano kaj submajstro, unuvorte, subpremantoj kaj subprematoj, staris unu kontraŭ la alia en daŭra opozi-

1 Sub burĝaro estas komprenata la klaso de modernaj kapitalistoj, kiuj estas posedantoj de sociaj produktado-rimedoĵoj kaj eluzas dungan laboron. Proletaro estas la klaso de la modernaj dungolaboristoj, kiuj, ĉar neposedantoj de propraj produktado-rimedoĵoj, estas devigitaj vendi sian laborforton por povi vivi. (*Noto de Engels al la angla eldono de 1888*)

2 Tio signifas, precize dirite, la **skribita** historio. En 1847 la antaŭhistorio de la socio, la socia organiziĝo, kiu antaŭiris ĉiun skribitan historion, estis preskaŭ nekonata. Ekde tio Haxthausen* malkovris la komunan proprieton je tero en Rusio. Maurer** pruvis, ke ĝi estis la socia bazo, de kiu historie eliris ĉiuj germanaj triboj. Kaj iom post iom oni komprenis, ke la vilaĝa komunumo kun komuna terposedaĵo estis la praformo de la socio, de Hindio ĝis Irlando. Per sia glora malkovro de la vera naturo de gento kaj de ĝia pozicio en la tribo Morgan*** fine klarigis la internan organiziĝon de tiu praa komunisma socio en sia tipa formo. Per la disvolviĝo de tiu origina komunumo komenciĝas la disiĝo de la socio en apartaj kaj fine antagonismaj klasoj. (*Noto de Engels al la angla eldono de 1888 kaj al la germana eldono de 1890*)

Mi provis sekvi tiun procezon de disvolviĝo en „La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato“, dua eldono, Stuttgart 1886. (*Noto de Engels al la angla eldono de 1888*)

– En Esperanto: Frederiko Engelso: La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2010. -vl

* August Haxthausen (1792 – 1866), prusa barono, kiu studis en Ruslando (1843 – 1844) la agrikulturon kaj kamparanan vivon. (*Trad.*)

** Georg Ludwig Maurer (1790 – 1872), germana historiisto, kiu

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

cio, havis seninterrompan batalon, foje kaŝe – foje malkaŝe, batalon, kiu ĉiufoje finiĝis per revolucia transformo de la tuta socio aŭ per komuna pereco de la batalintaj klasoj.

En la antaŭaj epokoj de la historio ni preskaŭ ĉie trovas kompletan strukturiĝon de la socio en diversajn klasojn, multspecan gradigon de la sociaj rangoj. En la antikva Romo ni havas patriciojn, kavalirojn, plebanojn, sklavojn; en la Mezepoko – feŭdajn sinjorojn, vasalojn, gildanojn, submajstrojn, servutulojn, kaj aldone al tio specifajn rango-gradigojn en preskaŭ ĉiu el tiuj klasoj.

La moderna burĝa socio, elirinta el la ruinoj de la feŭda socio, ne forigis la klasajn antagonismojn. Ĝi nur metis novajn klasojn, novajn subpremkondiĉojn, novajn batalformojn sur la lokon de la malnovaj.

Sed nia epoko, la epoko de la burĝaro, distingiĝas per tio, ke ĝi simpligis la klasajn antagonismojn. La tuta socio pli kaj pli fendiĝas en du grandajn malamikajn kampojn, en du grandajn klasojn, unu al la alia rekte kontraŭa: burĝaro kaj proletaro.

El la servutuloj de la Mezepoko fariĝis la palisburĝoj¹ de la unuaj urboj; el ĉi tiu palisburĝaro evoluis la unuaj elementoj de la burĝaro.

La malkovro de Ameriko, la ĉirkaŭnavigado de Afriko kreis al la estiĝanta burĝaro novan agadterenon. La orienthinda kaj ĉina merkatoj, la koloniigo de Ameriko, la

studis la mezepokon. (*Trad.*)

*** Lewis Henry Morgan (1818 – 1881), usona etnografo, arkeologo kaj historiisto. (*Trad.*)

- 1 En la germana originalo „Pfahlbürger” (palisburĝoj). Temas pri civitanoj de la feŭda Mezepoko, loĝintaj ekster la limpalisoj de urbo, kiuj ricevis burĝajn rajtojn, i. a. liberigo el la servuteco, pro ilia kunhelpo en la protekto de la urbo (kastelo, burgo). En figura senco: mallarĝhorizonta homo, filistro, ankaŭ etburĝo. La aŭtoroj de la Manifesto uzas ambaŭ signifojn. (*Trad.*)

MANIFESTODE LA KOMUNISTA PARTIO

kojmerco kun la kolonioj, entute la multiĝo de interŝanĝaĵoj kaj varoj donis al la komercado, al la navigado, al la industrio prosperon antaŭe nekonatan kaj per tio rapidan disvolvon al la revolucia elemento en la disfalanta feŭda socio.

La ĝisnuna feŭda aŭ gilda funkciado de la industrio ne plu sufiĉis por la bezonoj kreskintaj kun la novaj merkatoj. La manufakturo anstataŭis ĝin. La gildestrojn forpuŝis la industria meza klaso; la labordivido inter la diversaj kooperacioj malaperis antaŭ la labordivido en la unuopa laborejo mem.

Sed daŭre kreskis merkatoj, daŭre kreskis la bezono. Ankaŭ la manufakturo ne plu sufiĉis. Do la vaporo kaj la maŝinaro revoluciigis la industrian produktadon. Sur la lokon de la manufakturo venis la moderna grandindustrio, sur la lokon de la industria meza klaso venis la industri-milionuloj, la ĉefoj de kompletaj industriaj armeoj, la modernaj burĝoj.

La grandindustrio estis establinta la mondan merkaton, kiun preparis la malkovro de Ameriko. La monda merkato donis nemezureblan evoluon al la komerco, al la navigado, al la landaj komunikligoj. Tiu evoluo siavice reefikis pli ampleksige al la industrio, kaj same kiom etendiĝis industrio, komerco, navigado, fervojoj, same tiom la burĝaro disvolviĝis multigante siajn kapitalojn, puŝante en la fonon ĉiujn klasojn hereditajn el la Mezepoko.

Ni do vidas, kiel la moderna burĝaro mem estas produkto de longa evoluvojo, de vico da revolucioj en la sferoj de produktado kaj interŝanĝo.

Ĉiu paŝo de tiu evoluo de la burĝaro estis akompanata de konforma politika progreso. Subpremita klaso dum la feŭd-sinjora regado, armita kaj sin memadministrinta

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

asocio en la mezepoka komunumo¹, jen sendependa urba respubliko, jen tria impostodeva klaso de la monarkio, poste dum la tempo de la manufakturo kontraŭpezo al la nobelaro en la duonfeŭda aŭ en la absoluta monarkio, entute ĉefa bazo de la grandaj monarkioj, finfine ĝi batalakiris la ekskluzivan politikan potencon en moderna reprezenta ŝtato² ekde la establo de la grandindustrio kaj de la monda merkato. La moderna ŝtatpovo nur estas komitato administranta la komunajn aferojn de la tuta burĝa klaso.

La burĝaro ludis en la historio altgrade revolucionan rolon. Kie la burĝaro akiris la potencon, ĝi detruis ĉiujn feŭdajn, patriarkajn idiliajn rilatojn. Ĝi senkomplete disŝiris la buntajn feŭdajn ligilojn, kiuj ligis la homon al sia natura superulo, kaj lasis neniun alian ligilon inter homo kaj homo krom la nuda memintereso, krom la senanima „kontanta monopago”. Ĝi dronigis en la glacian akvon de la egoisma kalkulado la sanktajn tremojn de pia ekstazo, de kavalira entuziasmo, de filistra sentimentaleco. Ĝi dissolvis la personan dignon en la interŝanĝvaloron kaj metis sur la lokon de sennombraj leĝe garantiitaj kaj bone akiritaj liberecoj la unusolan senskrupulan agadliberecon. Unuvorte, sur la lokon de ekspluatado, vualitan per religiaj kaj politikaj iluzioj, ĝi metis la ekspluatadon malkaŝan, imperti-

1 „Komunumo” nomiĝis la en Francio evoluantaj urboj, eĉ antaŭ ol ili kapablis kiel „tria klaso” devigi siajn feŭdajn sinjorojn kaj mastrojn permesi lokajn memadministratojn kaj politikajn rajtojn. Generale dirite, ni ĉi tie mencias kiel la tipan landon por la ekonomia evoluo de la burĝaro Anglion, por la politika evoluo Francion. (*Noto de Engels al la angla eldono de 1888*)

Tiel la urbanoj de Italio kaj Francio nomis sian urban kunvivadon, post kiam ili estis aĉetintaj aŭ eldevigintaj de siaj feŭdaj sinjoroj la unuajn memadministratajn rajtojn. (*Noto de Engels al la germana eldono de 1890*)

2 Ekz. ŝtato kun parlamento aŭ alia formo, en kiu estas reprezentataj sociaj klasoj kaj tavoloj. (*Trad.*)

MANIFESTODE LA KOMUNISTA PARTIO

nentan, rektan, brutalan.

La burĝaro senigis de ĝia aŭreolo ĉiujn agojn ĝis nun honorindajn kaj rigarditaj per pia timideco. Ĝi transformis la kuraciston, la juriston, la pastron, la poeton, la scienculon al siaj pagitaj dungaj laboristoj.

La burĝaro forŝiris de la familiaj rilatoj ties kortuŝe sentimentalan vualon kaj reduktis ĝin al pura monrilato.

La burĝaro malkaŝis, kiel la brutala fortomontro de la reakcio tiom admirita ĉe la Mezepoko, trovis sian konvenan kompletigon en la plej inerta maldiligentado. Ĝi estis la unua, kiu pruvis, kiom kapablas fari la agado de la homo. Ĝi realigis mirindaĵojn, kiuj superas la egiptajn piramidojn, romiajn akvoduktojn kaj gotikajn katedralojn. Ĝi faris ekspediciojn multe pli grandajn ol la popolmigradoj kaj krucmilitoj¹.

La burĝaro ne povas ekzisti sen revoluciigi seninterrompe la produktado-instrumentojn, do sekve la produktado-rilatojn, do ĉiujn sociajn rilatojn. Sed, kontraŭe al tio, neŝanĝita konservado de la malnovaj produktado-manieroj estis la plej grava ekzistokondiĉo de ĉiuj antaŭaj industriaj klasoj. La konstanta revoluciigo de la produktado, la seninterrompa skuado de ĉiuj sociaj statoj, la eternaj necerteco kaj moviĝo distingas la epokon de la burĝaro disde ĉiuj aliaj antaŭaj. Ĉiuj fikse enrustiĝintaj rilatoj kun sia postsekvo de malnove honorindaj imagoj kaj vidpunktoj estas dissolvataj, ĉiuj nove formiĝintaj malnoviĝas antaŭ ol ili povas rigidiĝi. Ĉio solida kaj daŭra forvapiĝas, ĉio sankta estas profanata, kaj la homoj finfine estas devigataj rigardi per sobraj okuloj sian vivpozicion, siajn reciprokajn rilatojn.

1 La krucmilitoj estis militaj kaj koloniigaj ekspedicioj dum la 11-a ĝis la 13-a jarcentoj, entreprenitaj de kristanaj eŭropaj feŭdistoj kaj kavaliroj kontraŭ nekristanaj popoloj por pliampleksigi aŭ reakiri la potencon de la kristanaj feŭdistoj. (*Trad.*)

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

La bezono al daŭre pli etendita merkato por siaj varoj pelas la burĝaron ĉirkaŭ la tutan terglobon. Ĉie ĝi devas ennestiĝi, ĉie kultivadi, ĉie starigi interligojn.

Per sia ekspluatado de la monda merkato la burĝaro donis al la produktado kaj konsumado en ĉiu lando kosmopolitan karakteron. Je la granda bedaŭro de la reakciuloj ĝi fortiris la nacian grundon el sub la piedoj de la industrio. La ege malnovaj naciaj industrioj estas detruitaj kaj ankoraŭ estas detruataj ĉiutage. Ili estas forpuŝataj per novaj industrioj, kies enkonduko fariĝas vivodecida por ĉiuj civilizitaj nacioj; per industrioj prilaborantaj ne plu enlandajn krudmaterialojn, sed krudmaterialojn, kiuj venas el plej foraj regionoj kaj kies produktoj ne nur estas konsumataj en la lando mem, sed samtempe en ĉiuj mondpartoj. Sur la lokon de la malnovaj bezonoj, kontentigitaj per la enlandaj produktoj, venas novaj, kiuj postulas por sia kontentigo produktaĵojn de la plej foraj landoj kaj klimatoj. La malnovan lokan kaj nacian memsufiĉon kaj izolitecon anstataŭas ĉien-direkta komunikado, ĉiufanka interdependeco de la nacioj. Kaj kiel en la materia tiel ankaŭ en la spirita produktado. La spiritaĵoj de la unuopaj nacioj fariĝas komuna posedo. La nacia unuflankeco kaj limigiteco pli kaj pli¹ fariĝas neebla, kaj el la multaj naciaj kaj lokaj literaturoj elformiĝas monda literaturo.

La burĝaro tiras ĉiujn naciojn, ankaŭ la plej barbarajn, en la civilizacion per la rapida plibonigo de ĉiuj produktado-instrumentoj, per la senfine plifaciligita komunikado. La malaltaj prezoj de ĝiaj varoj estas la peza artilerio, per kiu ĝi teren disbatas ĉiujn ĉinajn murojn, per kiu ĝi devigas al kapitulaco la plej obstinan kontraŭfremdulan malamon de la barbaroj. Ĝi devigas ĉiujn naciojn alproprigi al si la produktadomanieron de la burĝaro, se ili ne volas pereji; ĝi devigas ilin, enkonduki ĉe si mem la tiel nomatan civilizacion, t. e. fariĝi burĝo. Unuvorte, ĝi kreas al si mondon laŭ

1 En la reta versio mankas la dua „pli”. -vl

MANIFESTODE LA KOMUNISTA PARTIO

sia propra imago.

La burĝaro subigis la kamparon al la regado de la urbo. ĝi kreis grandegajn urbojn, ĝi altgrade pligrandigis la nombron de la urba loĝantaro kompare al la kampara, tiel elŝirinte konsiderindan parton de la loĝantaro el la idioteco de la kampara vivo. Kiel ĝi faris dependa la kamparon de la urbo, tiel ĝi faris dependaj la barbarajn kaj duonbarbarajn landojn de la civilizitaj, la kamparanajn popolojn – de la burĝaj popoloj, la orienton de la okcidento.

La burĝaro pli kaj pli nuligas la displitiĝon de la produktadorimedoĵoj, de la posedaĵo kaj de la loĝantaro. Ĝi amase kunigis la loĝantaron, centralizis la produktadorimedoĵojn kaj koncentris la proprieton en malmultajn manojn. La necesa sekvo de tio estis la politika centralizo. Sendependaj, aŭ nur malfirme ligitaj provincoj kun malsamaj interesoj, leĝoj, registaroj kaj dogansistemoj estis kunpremitaj en unu nacion, kun unu registaro, unu leĝaro, unu nacia klasintereso, unu donganlimo.

Dum sia apenaŭ centjara klasa regado la burĝaro kreis pli da amasaj kaj pli da kolosaj produktado-fortoj ol ĉiuj antaŭaj generacioj kune. Subjugigo de naturfortoj al la homo, maŝinaro, aplikado de la kemio por industrio kaj agrokulturo, vaporŝipado, fervojoj, elektraj telegrafoj, kultivado de kompletaj mondpartoj, navigebligo de riveroj, tutaj loĝantaroj kvazaŭ elpremitaj el la tero – kiu antaŭa jarcento antaŭsentis, ke tiaj produktado-fortoj dormetis en la sino de la socia laboro?

Ni do vidis: La produktado-rimedoĵoj kaj la rimedoĵoj de interkomunikado surbaze de kiuj formiĝis la burĝaro, estis kreitaj en la feŭda socio. Dum certa evoluŝtupo de ĉi tiuj rimedoĵoj de produktado kaj interkomunikado la cirkonstancoj, sub kiuj la feŭda socio produktis kaj interŝanĝis, la feŭda organizado de la agrikulturo kaj manufakturo, unuvorte, la feŭdaj proprieto-rilatoj, ne plu respondis al la jam evoluintaj

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

produktivaj fortoj. Ili malhelpis la produktadon anstataŭ ĝin akceli. Ili ŝanĝiĝis al same multaj katenoj. Ili devis esti rompitaĵ, ili estis rompitaĵ.

Sur ilian lokon venis la libera konkurenco kun politika kaj socia konstitucioj adaptitaj al ĝi, kun la ekonomia kaj politika regadoj de la burĝa klaso.

Antaŭ niaj okuloj okazas simila moviĝo. La moderna burĝa socio kun siaj rilatoj de produktado, interŝanĝado kaj proprieto, do socio, kiu elsorĉis tiajn gigantajn rimedojn de produktado kaj interŝanĝado, similas al la magiisto, kiu ne plu kapablas regi la inferajn potencojn, kiujn li elvokis. Ekde jardekoj la historio de la industrio kaj de la komerco estas nur la historio de ribelado de la modernaj produktivaj fortoj kontraŭ la modernaj produktado-rilatoj, kontraŭ la proprieto-rilatoj, kiuj estas la ekzistokondiĉoj de la burĝaro kaj de ĝia regado. Sufiĉas mencii la komerckrizojn, kiuj, periode revenantaj, ĉiam pli minace dubindigas la ekziston de la tuta burĝa socio. Dum la komerckrizoj regule estas detruata ne nur granda parto de la produktitaj varoj, sed ankaŭ de la jam kreitaj produktivaj fortoj. Dum tiuj eksplodas socia epidemio, kiu al ĉiuj antaŭaj epokoj estus ŝajninta absurdaĵo – la epidemio de la troproduktado. Subite la socio sin trovas repuŝita al stato de pormomenta barbareco; ŝajnas al ĝi, kvazaŭ malsatmizero, ĉion neniiga milito estas fortranĉinta de ĝi ĉiujn nutraĵojn; ŝajnas neniigitaj la industrio, la komerco. Kaj kial? Ĉar ĝi posedas tro da civilizacio, tro da nutraĵoj, tro da industrio, tro da komerco. La al ĝi disponeblaj produktivaj fortoj ne plu servas al la disvolviĝo de la burĝaj proprieto-rilatoj; kontraŭe, ili fariĝis por tiuj rilatoj tro gigantaj kaj estas bremsataj per ili; kaj kiam tiuj produktivaj fortoj venkas ĉi tiun malhelpaĵon, ili malordigas la tutan burĝan socion, minacas la ekziston de la burĝa proprieto. La burĝaj rilatoj fariĝis tro malvastaj por enteni la de ĝi kreitan riĉaĵon. – Per kio la burĝaro venkas la krizojn? Unuflanke per la devigita detruo de amaso da

MANIFESTODE LA KOMUNISTA PARTIO

produktivaj fortoj; aliflanke per la konkero de novaj merkatoj kaj la ĝisfunda ekspluatado de malnovaj merkatoj. Do per tio? Per tio, ke ĝi preparas pli kompleksajn kaj pli gigantajn krizojn reduktante la rimedojn por preventi la krizojn.

La armiloj, per kiuj la burĝaro faligis la feŭdismon, nun direktiĝas kontraŭ la burĝaro mem.

Sed la burĝaro ne nur forĝis la armilojn, kiuj portos al ĝi la morton; ĝi ankaŭ generis la homojn, kiuj uzos tiujn armilojn – la modernajn laboristojn, la proletojn.

Same kiom disvolviĝas la burĝaro, t. e. la kapitalo, same tiom disvolviĝas la proletaro, la klaso de la modernaj laboristoj, kiuj vivos nur tiom longe kiom ili trovos laboron, kaj kiuj trovos laboron nur tiom longe kiom ilia laboro kreskigas la kapitalon. Tiuj laboristoj, kiuj devas vendi sin popece, estas varoj kiel ĉiu alia komerca artiklo kaj tial regule elmetataj al ĉiuj ŝanĝiĝoj de la konkurenco, al ĉiuj ŝanceliĝadoj de la merkato.

La laboro de la proletoj perdis ĉiun memstaran karakteron kaj per tio ĉiun allogon por la laboristoj pro la plivastiĝanta uzado de maŝinoj kaj la labordivido. Ili fariĝis nura aldonajo de la maŝino, de kiu estas postulata nur la plej simpla, plej monotona, plej facile lernebla manmovado. La kostoj, kiujn kaŭzas la laboristo, limiĝas pro tio preskaŭ nur al la nutraĵoj, kiujn li bezonas por sia vivteno kaj por la generado de sia raso. La prezo de varo, sekve ankaŭ de la laboro, egalas al ties produkto-kostoj. Same kiom kreskadas la malagrableco de la laboro, same tiom malkreskas la salajro. Ankoraŭ pli, same kiom kreskadas la maŝinaro kaj labordivido, same tiom ankaŭ kreskadas la laborkvanto, ĉu pro plimultiĝo de laboro postulata dum fiksita tempo, ĉu pro plialtigita rapideco de maŝinoj ktp.

La moderna industrio transformis la malgrandan meti-

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

ejon de la patriarka majstro en la grandan fabrikon de industria kapitalisto. Laboristaj amasoj, kunpremitaj en la fabriko, estas organizitaj kiel soldatoj. Kiel simplaj industri-soldatoj ili estas metitaj sub la komandon de kompleta hierarkio de suboficiroj kaj oficiroj. Ili ne nur estas sklavoj de la burĝa klaso, en la burĝa ŝtato, ili estas ĉiutage kaj ĉiuhore sklavigataj de la maŝino, de la kontrolisto kaj antaŭ ĉio de la unuopaj fabrikantaj burĝoj mem. Ju pli malkaŝe ĝi proklamas la gajnon kiel sian celon, des pli pedanta, malica, fanatika estas tiu despoteco.

Ju malpli la manlaboro bezonas lertecon kaj forton, t. e. ju pli la moderna industrio evoluas, des pli la laboro de la viroj estas forpuŝata per la laboro de la virinoj. Diferencoj laŭ sekso kaj aĝo ne plu havas socian valoron por la laborista klaso. Ĉiuj estas laborinstrumentoj, kiuj kaŭzas malsamajn kostojn laŭ aĝo kaj sekso.

Apenaŭ la ekspluatado de la laboristo fare de la fabrikposedanto atingis tiun punkton, ke li ricevas sian salajron en kontanta mono, tuj atakas lin la aliaj partoj de la burĝaro: la domposedanto, la vendejestro, la lombardisto ktp.

La ĝisnunaj subaj tavoloj de la meza klaso, la etindustriistoj, komercistoj kaj rentuloj, la metiistoj kaj kamparanoj, ĉiuj ĉi klasoj sinkas en la proletaron, parte pro tio, ĉar venkita en la konkurenco kun la pli grandaj kapitalistoj, ilia eta kapitalo ne sufiĉas por la funkciigado de granda industrio, parte pro tio, ĉar ilia lerteco fariĝas senvalora pro novaj produktado-manieroj. Tial la proletaro devenas el ĉiuj klasoj de la loĝantaro.

La proletaro trairas diversajn evoluŝtupojn. Ĝia batalo kontraŭ la burĝaro komenciĝas kun ĝia¹ ekzisto.

Komence batalis unuopaj laboristoj, poste la laboristoj de unu fabriko, poste la laboristoj de profesiobranĉo en unu

1 en la reta versio: „sia”. -vl

MANIFESTODE LA KOMUNISTA PARTIO

loko kontraŭ tiu individua burĝo, kiu rekte ekspluatas ilin. Ili direktas siajn atakojn ne nur kontraŭ la burĝaj produktado-kondiĉoj, sed ankaŭ kontraŭ la produktado-instrumentoj mem; ili detruas la fremdajn konkurencajn varojn, ili disbatas la maŝinojn, bruligas la fabrikojn, ili provas reakiri la malaperintan pozicion de la mezepoka laborulo.

Sur tiu ŝtupo la laboristoj formas amason dissemitan tra la tuta lando kaj dissplitigitan per la konkurenco. Amasa solidareco de la laboristoj ankoraŭ ne estas sekvo de ilia propra unuiĝo, sed sekvo de unuiĝo de la burĝaro, kiu devas movi kaj provizore ankaŭ povas movi la proletaron por atingi siajn proprajn politikajn celojn. Sur ĉi tiu ŝtupo la proletoj do ne batalas kontraŭ siaj malamikoj, sed kontraŭ la malamikoj de siaj malamikoj, kontraŭ la restaĵoj de la absoluta monarkio, la terposedantoj, la neindustriaj burĝoj, la etburĝoj. Tiel la tuta historia movado estas koncentrita en la manoj de la burĝaro; ĉiu tiel akirita venko estas venko de la burĝaro.

Sed kun la disvolviĝo de la industrio ne nur plimultiĝas la proletaro; ĝi estas koncentrata en pli grandajn amasojn, kreskas ĝi forto, kiun ĝi pli sentas. Interne de la proletaro la interesoj, la vivsitacioj pli kaj pli interegaliĝas, ĉar la maŝinaro pli kaj pli forviŝas la diferencojn de la laboro preskaŭ ĉie suben premanta la salajron sur same malaltan nivelon. – La kreskanta konkurenco de la burĝaro inter si kaj la komerckrizoj rezultantaj el tio faras la salajron de la laboristoj ĉiam pli malstabila. La ĉiam pli rapide progresanta senĉesa pliboniĝo de la maŝinaro ĉiam pli malcertigas ilian tutan vivsituation. La kolizioj inter la unuopa laboristo kaj la unuopa burĝo ĉiam pli ekhavas la karakteron de kolizio inter du klasoj. La laboristoj komencas fondi koaliciojn kontraŭ la burĝoj; ili kuniĝas por defendi sian salajron. Ili mem fondas konstantajn asociojn, por provianti sin por okazaj ribeloj. Kelkaloke la bataloj fariĝas ribeloj.

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

De tempo al tempo la laboristoj venkas, sed nur provizo-re. La propra rezulto de iliaj bataloj ne estas la senpera sukceso, sed la daŭre etendiĝanta unuiĝo de la laboristoj. Tion helpas la kreskantaj rimedoj de komunikado, produktataj de la grandindustrio kaj kunligantaj la diverslokajn laboristojn. Nur necesas kunligo, por centralizi la multajn ĉie samkarakterajn lokajn batalojn al nacia batalo. Kaj la unuiĝon, por kies atingo la burĝoj de la mezepoko kun siaj mizeraj ŝoseoj bezonis jarcentojn, la modernaj proletoj per la fervojoj realigos dum malmultaj jaroj.

Ĉi tiu organiziĝo de la proletaro al klaso, kaj per tio al politika partio, ĉiumomente estas denove rompata per la konkurenco inter la laboristoj mem. Sed ĉiam denove ĝi rekreiĝas, pli forte, pli firme, pli potence. Ĝi eldevigas la rekonon de iuj interesoj de la laboristoj en leĝa formo, eluzante la skismojn de la burĝaro inter si. Ekzemplo estas la leĝo pri dekhora labortago en Anglio.

Entute la kolizioj de la malnova socio multrilate akcelas la evoluon de la proletaro. La burĝaro troviĝas en konstanta batalo: Unue kontraŭ *la aristokratio*; poste kontraŭ tiuj partoj de la burĝaro mem, kies interesoj fariĝas kontraŭaj al la progreso de la industrio; daŭre kontraŭ la burĝaro de eksterlando. Dum ĉiuj ĉi bataloj ĝi sentas sin devigita apelacii al la proletaro, uzante ties helpon kaj tiel entirante ĝin en la politikan movadon. Ĝi mem do tiel disponigas al la proletaro siajn proprajn elementojn de politika kaj ĝenerala klereco, alivorte, ĝi donas al la proletaro la armilojn por batalo kontraŭ la burĝaro.

Plie, kiel ni vidis, per la progreso de la industrio tutaj partoj de la reganta klaso estas suben ĵetataj en la proletaron aŭ almenaŭ minacataj en siaj ekzistokondiĉoj. Ankaŭ ili provizas la proletaron per amaso da klerigaj elementoj.

Dum la tempoj, fine, kiam la klasbatalo proksimiĝas al decido, la procezo de dissolviĝo interne de la reganta klaso,

MANIFESTODE LA KOMUNISTA PARTIO

interne de la tuta malnova socio fariĝas tiel impeta, akra, ke eta parto de la reganta klaso forlasas sian klason kaj aliĝas al la revolucia klaso, al la klaso portanta en siaj manoj la estontecon. Same kiel antaŭe parto de la nobelaro transiris al la burĝaro, tiel nun parto de la burĝaro transiras al la proletaro, kaj aparte parto de la burĝaj ideologoj, kiuj atingis per studado la teorian komprenon de la tuta historia movado.

De ĉiuj klasoj starantaj hodiaŭ vidalvide al la burĝaro, nur la proletaro estas vere revolucia klaso. La aliaj klasoj degeneras kaj malaperas kun la grandindustrio, kies plej esenca produkto estas la proletaro.

La mezaj klasoj, la etindustriisto, la etkomercisto, la metiisto, la kamparano – ili ĉiuj batalas kontraŭ la burĝaro, por savi sian ekziston kiel mezaj klasoj antaŭ la pereco. Sekve ili ne estas revoluciaj sed konservativaj. Eĉ pli, ili estas reakciaj, ili klopodas retroturni la radon de la historio. Se ili estas revoluciaj, tiam nur rilate la por ili antaŭstarantan transiron al la proletaro. Pro tio ili defendas ne siajn aktualajn sed siajn estontajn interesojn, tiel forlasante sian propran starpunkton por transiri al tiu de la proletaro.

La ĉifonproletaro¹, tiu pasiva putraĵo de la plej malaltaj tavoloj de la malnova socio, estas parte entirata en la movadon per la proleta revolucio. Laŭ sia tuta vivsituaĵo ĝi inklinos esti subaĉetebla por reakciaj intrigoj.

En la vivkondiĉoj de la proletaro jam estas detruitaj la vivkondiĉoj de la malnova socio. La proleto estas sen posed-

1 En la germana originalo „Lumpenproletariat” ĉifonproletaro. Unu el la plej subaj sociaj tavoloj en kapitalismaj landoj (almozuloj, vagabondoj, krimuloj, prostituitinoj k. s.). Pro la konstanta senlaboreco kaj ruinigado de etburĝoj daŭre aperas tiu tavolo, el kiu la reakciularo facile prenas strikrompulojn, spionojn, provokistojn k. s. La ĉifonproletaro estas nekapabla organizi sin por politika batalo. (*Trad.*)

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

aĵo; lia rilato al edzino kaj infanoj ne plu havas ion komunan kun la burĝa familia rilato. La moderna industria laboro, la moderna subjugigo sub la kapitalon, sama en Anglio kiel en Francio, en Ameriko kiel en Germanio, senigis lin de ĉiu nacia karaktero. Por li la leĝoj, la moralo, la religio nur estas multaj burĝaj antaŭjuĝoj, malantaŭ kiuj sin kaŝas same multaj burĝaj interesoj.

Ĉiuj antaŭaj klasoj, kiuj estis konkerintaj por si la regadon, klopodis sekurigi al si la jam akiritan vivstatuson submetinte la tutan socion sub la kondiĉojn de sia alproprigo. La proletoj povas konkeri la sociajn produktivajn fortojn nur, se ili neniigos sian propran ĝisnunon, kaj tiel la tutan ĝisnunon manieron de alproprigo. La proletoj havas nenion propran por sekurigi, ili devas detrui ĉiujn ĝisnunajn sekurecojn kaj asekuojn de la privata proprieto.

Ĉiuj ĝisnunaj movadoj estis movadoj de minoritatoj aŭ en la intereso de minoritatoj. La proletara movado estas la memstara movado de la grandega majoritato en la intereso de la grandega majoritato. La proletaro, la plej malsupra tavolo de la nuna socio, ne povas leviĝi, nek ekstari, sen ke estu eksplodigita la tuta superstrukturo de la tavoloj, formantaj la oficialan socion.

Laŭ la formo, kvankam ne laŭ enhavo, la batalo de la proletaro kontraŭ la burĝaro estas komence nacia batalo. La proletaro de ĉiu lando kompreneble unue devas reguligi siajn aferojn kun la propra burĝaro.

Desegnante la plej ĝeneralajn evolufazojn de la proletaro, ni sekvis la pli aŭ malpli kaŝitan civitanan militon interne de ekzistanta socio ĝis tiu punkto, kie ĝi eksplodos kiel malkaŝa revolucio kaj la proletaro establas sian regadon per la perforta detronigo de la burĝaro.

Kiel ni vidis, ĉiu ĝisnuna socio baziĝis je la antagonismo inter subpreminta kaj subpremita klasoj. Sed por povi

MANIFESTODE LA KOMUNISTA PARTIO

subpremi klason, tiu¹ devas havi tiajn sekurigitajn kondiĉojn, en kies kadro ĝi almenaŭ povas elteni sian sklavecan ekzistadon. La servutulo perlaboris la statuson de membro de la servuteka komunumo, same kiel la etburĝo evoluis al burĝo sub la jugo de la feŭda absolutismo. Kontraŭe, la moderna laboristaro, anstataŭ suprenleviĝi per la industria progreso, sinkas ĉiam pli kaj pli profunden sub la kondiĉojn de sia propra klaso. La laboristo fariĝas malriĉegulo, kaj la paŭperismo evoluadas pli rapide ol la loĝantaro kaj riĉeco. Per tio klare evidentiĝas, ke la burĝaro estas malkapabla ankoraŭ pli longe resti la reganta klaso de la socio, altrudante al la socio la vivkondiĉojn de sia klaso kiel ĉionregula leĝo. Ĝi estas malkapabla regi, ĉar ĝi malkapablas sekurigi la ekzistadon al sia sklavo eĉ interne de ties sklaveco, ĉar ĝi estas devigita lasi sinki lin en situacion, kie ĝi devas nutri lin anstataŭ esti nutrata de li. La socio ne plu povas vivi sub tia burĝaro, t.e. ĝia vivo ne plu estas akordigebla kun la socio.

La esenca kondiĉo por la ekzistado kaj por la regado de la burĝa klaso estas la amasigo de riĉaĵoj en la manoj de privatuloj, la kreado kaj kreskado de la kapitalo; la kondiĉo por la kapitalo estas la dunga laboro. La dunga laboro ekskluzive baziĝas je la konkurenco de la laboristoj inter si. La progreso de la industrio, kies senvola kaj senkontraŭstara portanto estas la burĝaro, metas sur la lokon de la izoliĝo de la laboristoj per la konkurenco ĝian² revolucion unuiĝon per la asociiĝo. Do la evoluo de la grandindustrio eltiras sub la piedoj de la burĝaro la bazon mem, sur kiu ĝi produktas kaj alproprigas al si la produktojn. Ĝi produktas antaŭ ĉio sian propran tombofosiston. Ĝia pereado kaj la venko de la proletaro estas same neeviteblaj.

1 en la reta versio: ĝi. -vl

2 en la reta versio: sian. -vl

II. Proletoj kaj komunistoj

Kia estas la rilato de la komunistoj al la proletoj kiel tuto? La komunistoj ne estas aparta partio kontraŭ la aliaj laboristaj partioj.

Ili ne havas interesojn apartajn de la tuta proletaro.

Ili starigas neniujn sektecajn principojn, laŭ kiuj ili volas fasoni la proletan movadon.

La komunistoj distingiĝas de la aliaj proletaj partioj nur per tio:

1. En la diversaj naciaj bataloj de la proletoj ili elstarigas kaj respektigas la komunajn interesojn de la tuta proletaro, sendependajn de la nacieco.

2. En la diversaj evoluŝtupoj, kiujn trapasas la batalo inter proletaro kaj burĝaro, ili ĉiam reprezentas la interesojn de la tuta movado.

Do, la komunistoj praktike estas la plej energia, ĉiam antaŭenpuŝa parto de la laboristaj partioj de ĉiuj landoj; ilia avantaĝo rilate la alian amason de la proletaro estas, ke ili disponas ekkonojn pri la kondiĉoj, la marŝlinio kaj la ĝeneralaj rezultoj de la proleta movado.

La plej proksima celo de la komunistoj estas la sama kiel ĉe ĉiuj aliaj proletaj partioj: formado de la proletaro al klaso, faligo de la burĝara regado, konkero de la politika potenco flanke de la proletaro.

La teoriaj konceptoj de la komunistoj tute ne baziĝas je ideoj aŭ principoj inventitaj aŭ malkovritaj de tiu aŭ alia mondreformanto.

Ili nur estas ĝeneralaj esprimoj de realaj kondiĉoj de

MANIFESTODE LA KOMUNISTA PARTIO

ekzistanta klasbatalo, de historia movado okazanta antaŭ niaj okuloj. La forigo de ĝisnunaj proprieto-rilatoj ne estas aparta trajto distinganta la komunismon.

Ĉiuj proprieto-rilatoj estis subjekto de daŭra historia ŝanĝo, de daŭra historia transformiĝo.

La Franca Revolucio ekzemple forigis la feŭdan proprieton favore al la burĝa.

Kio distingas la komunismon, ne estas la ĝenerala forigo de la proprieto, sed la forigo de la burĝa proprieto.

Sed la moderna burĝa privata proprieto estas la lasta kaj plej perfekta esprimo de sistemo de kreado kaj alproprigo de produktoj, kiu baziĝas sur klasaj antagonismoj, sur la ekspluatado de unuj fare de la aliaj.

Ĉi-sence la komunistoj povas resumi sian teorion per jena sola frazo: forigo de la privata proprieto.

Oni riproĉis al ni, komunistoj, ke ni volas forigi la persone akiritan mem perlaboritan proprietajon. La proprietajon, kiu formas la bazon de ĉiuj personaj libereco, agado kaj memstareco.

Perlaborita, akirita, memgajnita proprietajo! Ĉu vi parolas pri la etburĝa, etkampana proprietajo, kiu antaŭiris la burĝan proprietajon? Ni ne devas forigi ĝin, la evoluo de la industrio forigis ĝin kaj ĝin forigadas ĉiutage.

Aŭ ĉu vi parolas pri la moderna burĝa privata proprietajo?

Sed ĉu la dunga laboro, la laboro de la proleto havigas al li proprietajon? Neniel. Ĝi kreas la kapitalon, t.e. tiun proprietajon, kiu ekspluatas la dungan laboron. Kaj tiu nur kreskas, kondiĉe, ke ĝi produktas novan dungan laboron por povi denove ekspluati tiun dungan laboron. La proprietajo en sia nuntempa formo baziĝas sur la antagonismo inter

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

kapitalo kaj dunga laboro. Ni rigardu ambaŭ flankojn de tiu antagonismo.

Esti kapitalisto ne nur signifas havi pure peronan sed socian statuson en la produktado. La kapitalo estas kolektiva produkto kaj povas esti ekmovigita nur per komuna agado de multaj membroj, ja finfine nur per la komuna agado de ĉiuj membroj de la socio.

La kapitalo do ne estas persona, ĝi estas socia potenco.

Se do la kapitalo estas transformata en komunan proprietaĵon, apartenantan al ĉiuj membroj de la socio, tiam persona proprietaĵo ne transformiĝas en socian. Nur la socia karaktero de la proprietaĵo transformiĝas. Ĝi perdas sian klasan karakteron.

Ni prenu la dungan laboron.

La meza prezo de la dunga laboro estas la minimumo de la salajro, t.e. la kvanto de nutraĵoj, necesaj por vivteni la laboriston kiel laboristo. Sekve, kion la dungito alproprigas al si per sia laboro, nur sufiĉas por reprodukti sian nuran vivon. Ni tute ne volas forigi tiun peronan alproprigon de la laborproduktoj por reproduktado de la nura vivo, alproprigo ne postlasanta iun surpluson, kiu povus doni regpovon pri fremda laboro. Ni volas nur nuligi la mizeran karakteron de tiu alproprigo, ĉe kiu la laboristo nur vivas por kreskigi la kapitalon, nur vivas tiom, kiom tion necesigas la intereso de la reganta klaso.

En la burĝa socio la viva laboro nur estas rimedo, por multigi la akumulitan laboron. En la komunisma socio la akumulita laboro nur estas rimedo por plivastigi la vivprocezon de la laboristoj, por riĉigi kaj akceli ĝin.

En la burĝa socio la pasinteco do regas super la nuntempo; en la komunisma socio la nuntempo regas super la pasinteco. En la burĝa socio la kapitalo estas memstara kaj

MANIFESTODE LA KOMUNISTA PARTIO

havas individuecon, dum la aganta persono estas dependa kaj ne havas individuecon.

Kaj la forigon de tiu situacio la burĝaro nomas forigo de la individueco kaj libereco! Kaj prave. Sed ja temas pri la forigo de la burĝaj individueco, memstareco kaj libereco.

En la nunaj burĝaj produktado-kondiĉoj sub libereco oni komprenas la liberan komercon, la liberajn aĉeton kaj vendon.

Sed se malaperos la negocado, ankaŭ malaperos la libera negocado. La grandaj vortoj pri la libera negocado, same kiel ĉiuj aliaj fanfaronadoj de nia burĝaro pri libereco, nur havas sencon, se entute, rilate la limigitan negocadon, rilate la sklavigitan burĝon de la mezepoko, sed ne rilate la komunistan forigon de la negocado, de la burĝaj produktado-rilatoj kaj de la burĝaro mem.

Vi teruriĝas, ke ni volas forigi la privatan proprietaĵon. Sed en via ekzistanta socio la privata proprietaĵo estas forigita por naŭ dekonoj de la membroj, ĝi ĝuste tial ekzistas, ĉar por naŭ dekonoj ĝi ne ekzistas. Vi do riproĉas al ni, ke ni volas forigi proprietaĵon por kies ekzisto la necesa kondiĉo estas la neekzisto de iu ajn proprietaĵo por la grandega majoritato de la socio.

Unuvorte, vi riproĉas al ni, ke ni volas forigi vian proprietaĵon. Ĝuste tiel, tion ni volas.

Ekde tiu momento, kiam laboro ne plu estas transformebla en kapitalon, monon, terrenton, tio signifas, ne plu estas transformebla en monopoligeblan socian potencon, do, ekde tiu momento, kiam la persona proprietaĵo ne plu povas transformiĝi en burĝan, ekde tiu momento vi deklaras, ke la individuo estas neniigita.

Vi do konfesas, ke sub individuo vi celas neniun alian personon ol la burĝon, la burĝan proprietulon. Kaj, vere,

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

tiun personon ni ja volas neniigi.

La komunismo forprenas de neniu la potencon alproprigi al si sociajn produktojn, ĝi nur forprenas la potencon subjugigi fremdan laboron per tiu alproprigo.

Oni kontraŭargumentis, ke per la forigo de la privata proprietaĵo ĉesos ĉiu agado kaj disvastiĝos ĝenerala mal-laboremo.

Laŭ tio la burĝa socio jam longe devus esti pereinta pro inerteco, ĝuste tiuj, kiuj laboras en ĝi, nenion gajnas, kaj tiuj, kiuj gajnas, ne laboras. La tuta pripenso sekvigas la taŭtologion: ne plu povas ekzisti dunga laboro se ne plu ekzistas kapitalo.

Ĉiuj objetoj direktitaj kontraŭ la maniero de la komunismaj alproprigo kaj produktado de la materiaj produktoj estas same direktitaj kontraŭ la alproprigo kaj produktado de la intelektaj produktoj. Same kiel por la burĝo la mal-aperero de la klasa proprietaĵo signifas la malaperon de la produktado mem, same por li malaperero de la klasa klereco identas kun la malaperero de la klereco entute.

La klereco, kies perdon li bedaŭras, por la granda majoritato estas la klerigo agi kiel maŝino.

Sed ne disputu kun ni aplikante viajn burĝajn konceptojn pri libereco, klereco, rajtoj ktp al nia koncepto pri la forigo de la burĝa proprietaĵo. Viaj ideoj mem estas kreaĵoj de la burĝaj kondiĉoj de produktado kaj proprieto, same kiel via juro nur estas la leĝigita volo de via klaso, volo, kies enhavo baziĝas sur la materialaj vivkondiĉoj de via klaso.

La egoisma koncepto, laŭ kiu vi ŝanĝas en eternajn leĝojn de la naturo kaj produktado viajn produktado-manierojn kaj proprieto-kondiĉojn – historiaj rilatoj, venkantaj kaj malaperantaj dum la paso de la produktado, – tiun koncepton vi havas komuna kun ĉiuj aliaj malaperintaj

MANIFESTODE LA KOMUNISTA PARTIO

regintaj klasoj. Kion vi konceptas kiel antikvan proprieton, kion vi konceptas kiel feŭdan proprieton, vi ne plu rajtas koncepti por la burĝa proprieto.

Forigo de la familio! Eĉ la plej radikalaj ekscitiĝas pri tiu fia intenco de la komunistoj.

Sur kio baziĝas la nuntempa, la burĝa familio? Sur la kapitalo, sur la privata gajno. Plene disvolvita tiu familio nur ekzistas por la burĝaro. Sed ĝi trovas sian kompletigon en la eldevigita senfamileco de la proletoj kaj en la publika prostituado.

La familio de la burĝo kompreneble malaperos kun la malapero de tiu kompletigo, kaj ambaŭ malaperos kun la malapero de la kapitalo.

Ĉu vi riproĉas al ni, ke ni volas forigi la ekspluatadon de la infanoj flanke de iliaj gepatroj? Ni konfesas tiun krimon.

Sed, vi diros, ni detruas la plej intimajn rilatojn anstataŭ-ante la hejman edukadon per la socia.

Kaj, ĉu ne ankaŭ via edukado estas determinita per la socio? Per la sociaj rilatoj, sub kiuj vi edukadas, per la rekta aŭ nereakta enmiksiĝo de la socio, pere de lernejo ktp? La komunistoj ne inventis la efikon de la socio al la edukado; ili nur ŝanĝas ties karakteron, ili tiras la edukadon el la influo de la reganta klaso.

La burĝaj sensencaj frazoj pri familio kaj edukado, pri la intima rilato inter gepatroj kaj infanoj, fariĝas des pli naŭzaj ju pli multe ĉiuj familiaj ligoj de la proletoj disŝiriĝas pro la grandindustrio kaj la infanoj transformiĝas al simplaj komercaj varoj kaj laboriloj.

Sed vi komunistoj volas enkonduki la komunan posedon pri virinoj, krias al ni korse la burĝaro.

La burĝo vidas en sia edzino nuran produktado-instu-

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

menton. Li aŭdas, ke la produktado-instrumentoj estu komune ekspluatataj, kaj kompreneble li nur povas veni al la konkludo, ke la sorto de la komuna sociigo same trafos la virinojn.

Li ne suspektas, ke ĝuste necesas forigi la pozicion de la virinoj kiel nuraj produktado-instrumentoj.

Cetere, nenio estas pli ridinda ol la moralega ŝoko de niaj burĝoj pri la laŭdire oficiala komuna posedo pri virinoj ĉe la komunistoj. La komunistoj ne devas enkonduki la komunan posedon pri virinoj, ĝi preskaŭ ĉiam ekzistis.

Niaj burĝoj, ne kontentaj ke al ilia dispono estas la virinoj kaj filinoj de iliaj proletoj – ne parolante pri la oficiala prostituado – trovas grandan plezuron en la reciproka delogado de siaj edzinoj.

La burĝa geedzeco en vero estas komuna posedo pri edzinoj. Maksimume oni povus riproĉi al la komunistoj, ke ili volas enkonduki oficialan, malkaŝan komunan posedon pri virinoj anstataŭe al la hipokrite kaŝita. Cetere estas memkompreneble, ke kun la forigo de la nunaj produktadorilatoj ankaŭ malaperos la el tio deveninta komuna posedo pri virinoj, t.s. la oficiala kaj neoficiala prostituadoj.

Al la komunistoj oni krome riproĉis, ke ili volas forigi la patrujon, la naciecon.

La laboristoj ne havas patrujon. Oni ne povas de ili preni, kion ili ne posedas. Devante unue konkeri la politikan potencon, evolui al nacia klaso, mem konstituiĝi al nacio, la proleto mem ankoraŭ estas nacia, eĉ se tute ne en la senco de la burĝaro.

La naciaj diferencoj kaj antagonismoj inter la popoloj malaperas pli kaj pli jam pro la evoluo de la burĝaro, la libereco de la komerco, la monda merkato, la monotoneco de la industria produktado kaj pro la vivkondiĉoj respond-

MANIFESTODE LA KOMUNISTA PARTIO

antaj al ĝi.

La regado de la proletaro malaperigos ilin ankoraŭ pli. Unuigitaj agadoj, almenaŭ flanke de la civilizitaj landoj, estas unu el la plej gravaj kondiĉoj de ĝia emancipiĝo.

Same tiom, kiom estas forigita la ekspluatado de unu individuo per alia, same tiom finiĝos la ekspluatado de unu nacio per alia.

Lige al la malapero de klasaj antagonismoj interne de la nacio malaperos la malamikeco inter la nacioj.

La akuzoj kontraŭ la komunismo, levitaj el religiaj, filozofiaj kaj ĝenerale ideologiaj vidpunktoj, ne meritas detalan pritrakton.

Ĉu necesas profundaj ekkonoj por kompreni, ke la konceptoj, opinioj kaj nocioj de la homoj, unuvorte, ilia konscio, ŝanĝiĝas kun iliaj sociaj rilatoj, ilia socia vivo?

Kion alian pruvas la historio de ideoj ol tion, ke la intelekta produktado transformiĝas kune kun la materia? La regantaj ideoj de epoko ĉiam estis nur la ideoj de la reganta klaso.

Parolante pri ideoj, kiuj revoluciigas tutan socion, oni nur esprimas la fakton, ke interne de la malnova socio kreiĝis la elementoj de nova, ke al la disfalo de la malnovaj vivkondiĉoj paralelas sampaŝe la disfalo de la malnovaj ideoj.

Kiam la antikva mondo estis pereanta, la antikvajn religiojn venkis la kristanismo. Kiam la kristanismaj ideoj dum la 18-a jarcento estis venkitaj de la ideoj de la racionalismo, la feŭda socio batalis agonie kontraŭ la siatempe revolucia burĝaro. La ideoj pri libereco de pensado kaj religio nur esprimis la regadon de la libera konkurenco sur la kampo de scioj.

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

„Kompreneble”, oni diros, – „religiaj, moralaj, filozofiaj, politikaj, prijuraj ideoj k.s. ja modifiĝis dum la paso de la historia evoluo. Sed religio, moralo, filozofio, politiko, juro daŭre postvivis tiun ŝanĝon.

Krom tio ekzistas eternaj veroj, kiel libereco, justeco ktp, kiuj komunas al ĉiuj sociaj statoj. Sed la komunismo forigos tiujn eternajn verojn, ĝi forigos la religion, la moralon, anstataŭ renovigi ilin. La komunismo do agas kontraŭ ĉiuj ĝisnunaj historiaj spertoj”.

Al kio redukteblas ĉi tiu akuzo? La historio de la tuta ĝisnuna socio moviĝas inter klasaj antagonismoj, dum la diversaj epokoj diverse formitaj.

Kian ajn formon ili havis, la ekspluatado de unu parto de la socio fare de la alia estas komuna fakto al ĉiuj pasintaj jarcentoj. Pro tio estas neniu miraklo, ke la socia konscio de ĉiuj jarcentoj, spite al ĉiu multeco kaj diverseco, moviĝis en certaj komunaj formoj aŭ ĝeneralaj ideoj, kiuj plene dissolvigis nur kun la kompleta malapero de la klasaj antagonismoj.

La komunista revolucio estas la plej radikala rompo kun la tradiciaj proprieto-rilatoj, ne mirinde, ke ĝia evoluo inkludas plej radikalan rompon kun la tradiciaj ideoj.

Sed ni lasu la objetojn de la burĝaro kontraŭ la komunismo.

Ni jam supre vidis, ke la unua paŝo en la laborista revoklucio estas la leviĝo de la proletaro al reganta klaso, la elbatalo de la demokratio.

La proletaro uzos sian politikan regadon por iom post iom eltiri el la burĝaro la tutan kapitalon, por centralizi ĉiujn produktado-instrumentojn en la manon de la ŝtato – tio signifas la proletaro, organizita kiel reganta klaso – kaj por multigi kiom eble rapide la produktado-fortojn.

MANIFESTODE LA KOMUNISTA PARTIO

Tio kompreneble povos okazi komence nur pere de despotaj intervenoj en la rajton je proprieto kaj en la burĝajn produktado-rilatojn, do pere de intervenoj, kiuj ŝajnas ekonomie nesufiĉaj kaj neteneblaj, sed kiuj dum la evoluo de la movado superos sin mem, fariĝantaj neeviteblaj kiel rimedoj de la revoluciigo de la tuta produktadomaniero.

Tiuj intervenoj nature estos malsamaj laŭ la diversaj landoj. Por la plej progresintaj landoj jenaj intervenoj estos aplikataj relative ĝenerale:

1. Senproprieto de la tero kaj utiligo de la terrento por ŝtataj elspezoj.

2. Imposto forte laŭgrada.

3. Forigo de la heredorajto.

4. Konfiskado de la proprietaĵo de ĉiuj elmigrintoj kaj ribeluloj.

5. Centralizo de la kredito en la manojn de la ŝtato pere de nacia banko kun ŝtata kapitalo kaj ekskluziva monopolo.

6. Centralizo de la transportaj aferoj en la manojn de la ŝtato.

7. Plimultigo de ŝtatproprietaj fabrikoj, de produktado-instrumentoj, kultivado kaj plibonigado de la terposedaĵoj laŭ komuna plano.

8. Sama labordevo por ĉiuj, kreo de industriaj armeoj, aparte por la agrikulturo.

9. Kunigo de agrikulturo kun industrio, laŭgrada iom-post-ioma forigo de la diferenco inter urbo kaj vilaĝo.

10. Publika kaj senpaga edukado de ĉiuj infanoj. Forigo de la fabriklaboro de infanoj en la nuna formo. Kunligo de la edukado kun la materiala produktado ktp.

Se la klasaj diferencoj estos malaperintaj dum la paso de

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

la evoluo, kaj se ĉiu produktado estos koncentrita en la manojn de la unuiĝintaj individuoj, la publika forto perdas la politikan karakteron. La politika forto en sia propra signifo estas la organizita forto de unu klaso por la subpremado de alia. Se en la batalo kontraŭ la burĝaro la proletaro necese unuiĝas kiel klaso, per revolucio, fariĝas reganta klaso kaj perforte detruas la malnovajn produktado-cirkonstancojn, tiam ĝi detruas per tiuj produktado-cirkonstancoj la ekzisto-kondiĉojn de la klasa antagonismo, entute detruos la klasojn kaj tiel sian propran regadon kiel klaso.

Sur la loko de la malnova burĝa socio kun ĝiaj¹ klasoj kaj klasaj antagonismoj ni havos asocion, kie la libera evoluo de ĉiu estas la kondiĉo por la libera evoluo de ĉiuj.

1 en la reta versio: siaj. v.

III. Socialisma kaj komunisma literaturoj

1. LA REAKCIA SOCIALISMO

a) La feŭda socialismo

Laŭ sia historia pozicio la franca kaj la angla aristokrati-oj estis kompetentaj verki pamfletojn kontraŭ la moderna burĝa socio. En la franca Julia Revolucio de 1830 kaj en la angla reformmovado¹ ili denove estis venkitaj de la mal-amata parvenuo. Ne plu eblis paroli pri serioza politika batalo. Restis nur la batalo per rimedoj de la literaturo. Sed ankaŭ sur la kampo de la literaturo fariĝis neakcepteblaj la malnovaj paroloj de la restaŭra periodo². Por gajni simpatio-n, la aristokratio devis laŭŝajne malatenti siajn interesojn por povi formuli en la intereso de la ekspluatata laborista klaso sian akuzon kontraŭ la burĝaro. Tiel la aristokratio sin venĝis kantante mokkantojn pri sia nova reganto kaj frustrante en ties orelojn pli malpli katastrofajn profetaĵojn.

Tiel formiĝis la feŭdisma socialismo, duone plendkanto, duone pamfleteto, duone eĥo pri la pasinteco, duone minaco de la estonteco, foje vundinte la koron de la burĝaro per amara, sprite detrua juĝo, ĉiam impresante komika pro la kompleta nekapableco kompreni la iron de la moderna historio.

Por gajni por si la popolon, la aristokratio flirtigis kiel

1 Temas pri movado por reformoj de la balotrajto en Anglio. (*Trad.*)

2 Ne temas pri la angla restaŭra periodo de 1660 – 1689 sed pri la franca de 1814 – 1830. (*Noto de Engels al la angla eldono de 1888*)

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

flagon la proletan almozulsakon. Sed kiom ajn la popolo sekvis la aristokration, ĝi ekvidis sur ties postaĵo la malnovajn feŭdajn blazonojn kaj diskuris ridaĉante laŭte kaj senrespekte.

Parto de la francaj legitimistoj¹ kaj la „Juna Anglio”² surscenigis tiun spektaklon.

Pruvante, ke ilia ekspluatmaniero estas alia ol tiu de la burĝoj, la feŭdistoj nur forgesas, ke ili ekspluatas sub tute aliaj kaj hodiaŭ antikviĝintaj cirkonstancoj kaj kondiĉoj. Montrante, ke dum ilia regado ne ekzistis la moderna proletaro, la feŭdistoj nur forgesas, ke ĝuste la moderna burĝaro estis neevitebla ido de ilia sociordo.

Cetere, ili tiom malmulte kaŝas la reakcian karakteron de sia kritiko, ke ilia ĉefa akuzo kontraŭ la burĝaro estas, ke sub ties reĝimo evoluas klaso, krevigonta la tutan malnovan sociordon.

Plie, ili riproĉas al la burĝaro ne tiom ke ĝi kreas proletaron, sed ke ĝi kreas revolucion proletaron.

En la politika praktiko pro tio ili partoprenas ĉiujn perfortojn kontraŭ la laborista klaso. Kaj en la ordinara vivo, spite al siaj bombastaj frazoj, ili klopodas pluki la orajn pomojn desur la arbo de la industrio, ŝakrante fidelecon, amon kaj honoron kontraŭ ŝaflano, furaĝbetoj kaj brando³.

1 Legitimistoj nomiĝis adeptoj de la dinastio de la Burbonoj, kiu regis en Francio de 1589 – 1793 kaj dum la restaŭra periodo de 1814 – 1830. (*Trad.*)

2 La grupo „Juna Anglio” fondiĝis komence de la 40-aj jaroj de la 19-a jarcento. En ĝi membris anglaj politikistoj kaj literaturistoj, kiuj apartenis al la Tory-partio. (*Trad.*)

3 Tio ĉefe koncernas Germanion, kie la kampara nobelaro kaj la junkraro proprakoste mastrumigas pere de siaj administrantoj grandan parton de siaj bienoj kaj samtempe ankaŭ estas grandproduktantoj de betsukero kaj terpoma brando. La pli riĉaj

MANIFESTODE LA KOMUNISTA PARTIO

Kiel iris la pastro ĉiam man-en-mane kun la feŭdistoj, tiel faras la pastra socialismo kun la feŭda.

Nenio pli facila, ol doni socialisman koloron al la kristana asketismo. Ĉu ne ankaŭ la kristanismo agitis kontraŭ la privata proprieto, kontraŭ geedzeco, kontraŭ la ŝtato? Ĉu ĝi ne predikis, ke sur ties lokon venu bonfaremo kaj malriĉeco, celibato kaj voluptomortigo, vivo en monaĥ(in)ejo kaj eklezio? La kristana socialismo nur estas la sankta akvo, per kiu la pastro benas la ĉagrenon de la aristokratoj.

b) Etburĝa socialismo

La feŭda aristokratio ne estas la sola klaso, kiun detronigis la burĝaro, kies vivkondiĉoj degeneris kaj formortis en la moderna burĝa socio. La mezepoka palisburĝaro kaj la etkampanaro estis la antaŭuloj de la moderna burĝaro. En la industrie kaj komerce malpli evoluintaj landoj tiu klaso ankoraŭ plu vegetadas apud la leviĝanta burĝaro.

En la landoj, kie disvolviĝis moderna civilizacio, kreiĝis nova etburĝaro, ŝvebanta inter proletaro kaj burĝaro kaj daŭre rekreiĝanta kiel kompletiga parto de la burĝa socio. Sed ties membroj pro la konkurenco estas daŭre subenĵetataj al la proletaro. Pro la evoluo de la grandindustrio ili vidas alproksimiĝi momenton, kiam ili komplete malaperos kiel memstara parto de la moderna socio kaj en la komerco, manufakturoj kaj agrikulturo estos anstataŭigataj per laborkontrolistoj kaj servistoj.

En landoj kiel Francio, kie la kampana klaso konstituas multe pli ol la duonon de la loĝantaro, estis nature, ke verkistoj, kiuj pledis por la proletaro kaj kontraŭ la burĝaro,

anglaj aristokratoj ankoraŭ ne tiom degeneris; sed ankaŭ ili scias, kiel egaligi la falon de la rento per la disponigo de sia nomo al pli malpli dubindaj fondintoj de akciaj societoj. (*Noto de Engels al la angla eldono de 1888*)

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

kritikis la burĝaran reĝimon laŭ etburĝaj kaj etkampanaj kriterioj, tiel subtenante la starpunkton de la laboristoj laŭ la starpunkto de la etburĝaro. Do tiel kreigis la etburĝa socialismo. La ĉefrepresentanto de ĉi tiu literaturo, ne nur por Francio sed ankaŭ en Anglio, estas Sismondi¹.

Tiu socialismo-skolo sekciis tre sagace la kontraŭdirojn en la modernaj produktado-kondiĉoj. Ĝi senmaskigis la hipokritajn apologiojn de la ekonomiistoj. Ĝi nekontesteble pruvis la detruajn efikojn de la maŝinaro kaj de la labordivido, la koncentradon de la kapitaloj kaj de la terproprietato, de la troproduktado kaj krizoj, la neeviteblan pereon de la etburĝoj kaj etkampanoj, la mizeron de la proletaro, la anarkion en la produktado, la kriaajn misproporciojn en la disdivido de la riĉaĵoj, la industrian detrumilon inter la nacioj, la dissolviĝon de la malnovaj moroj, de la familiaj rilatoj, de la malnovaj naciecoj.

Laŭ sia pozitiva celo, tamen, tiu socialismo aŭ volas restarigi la malnovajn rimedojn de produktado kaj interŝanĝo kaj per tio la malnovajn proprieto-rilatojn kaj la malnovan socion, aŭ ĝi volas perforte enŝlosi la modernajn rimedojn de produktado kaj interŝanĝo en la kadron de la malnovaj proprieto-rilatoj, kiuj estis krevigitaj per tiuj rimedoj, devis esti krevigitaj. En ambaŭ kazoj ĝi estas samtempe reakcia kaj utopieca.

Ĝiaj lastaj vortoj estas: gildaro en la manufakturo kaj patriarkaj rilatoj sur la kamparo.

Finfine tiu formo de socialismo dum sia plua evoluo malaperis en mizera nenieco.

1 Jean Charles Léonard Simonde de Sismondi (1773 – 1842), svisa historiisto, ekonomikisto. (*Trad.*)

MANIFESTODE LA KOMUNISTA PARTIO

c) La germana aŭ la „vera” socialismo

La socialisma kaj komunisma literaturoj de Francio, kiuj estiĝis sub la premo de reganta burĝaro, literatura esprimo de la batalo kontraŭ tiu regado, estis enkondukitaj en Germanion dum tempo, kiam la burĝaro ĵus komencis sian batalon kontraŭ la feŭda absolutismo.

Germanaj filozofoj, duonfilozofoj kaj belartemuloj avide ekkaptis tiun literaturon, nur forgesante, ke dum ĝia alveno el Francio ne venis samtempe al Germanio la francaj vivkondiĉoj. En la kontakto kun la germanaj cirkonstancoj la franca literaturo perdis ĉiun senpere praktikan signifon kaj alprenis pure literaturan aspekton. Ĝi devis aspekti kiel superflua spekulativo pri la realigo de la homa naturo. Tiel do por la germanaj filozofoj de la 18-a jarcento la postuloj de la unua franca revolucio nur estis postuloj de la „praktika prudento” en ĝenerala senco, kaj la volesprimoj de la revolucia franca burĝaro en ilia kompreno estis la leĝoj de la pura volo, de la volo, kia ĝi devas esti, de la vere homa volo.

La germanaj literaturistoj laboris sole por akordigi la novajn francajn ideojn kun sia malnova filozofia konscio aŭ, plue, alproprigi al si la francajn ideojn el sia propra filozofia vidpunkto.

Tiu alproprigo okazis same kiel oni entute alproprigas al si fremdan lingvon, nome per tradukado.

Estas konate, kiel monaĥoj skribis banalajn katolikajn historietojn pri sanktuloj sur manuskriptojn, sur kiuj estis skribitaj la klasikaj verkoj el la antikva pagana epoko. Rilate la profanan francan literaturon la germanaj literaturistoj inversigis tiun procezon. Sian filozofian stultaĵon ili skribis sub la francan originalon. Ekz. sub la francan kritikon kontraŭ la ekonomia funkcio de la mono ili skribis „fremdiĝo de la humaneco”, sub la francan kritikon kontraŭ la

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

burĝa ŝtato ili skribis „neniigo de regado de la abstrakte ĝenerala”, ktp.

La subŝovon de tiaj filozofiaj frazoj sub la francajn esprimojn ili baptis „filozofio de la ago”, „vera socialismo”, „germana scienco pri socialismo”, „filozofia motivigo de la socialismo” ktp.

Tiel oni komplete kastris la socialisman-komunisman francan literaturon. Kaj ĉar en la mano de la germano ĝi ĉesis esprimi la batalon de unu klaso kontraŭ alia, la germano sentis la konscion, ke li superis la „francan unuflankecon”, reprezentante la bezonon de la vero anstataŭ veraj bezonoj, la interesojn de la homa naturo kaj entute de la homo, anstataŭ la interesoj de la proletaro, reprezentante la homon, apartenantan al neniu klaso, entute ne apartenantan al la realeco sed nur al la mistera nebulo de la filozofia fantazio.

Tiu ĉi germana socialismo, kiu prenis tiel serioze kaj solene siajn mallertajn lernejkunabajn ekzercojn, distrumpetante ilin tiel reklamece, perdis dume iom post iom sian pedantan naivecon.

La batalo de la germana, aparte de la prusa burĝaro kontraŭ la feŭdistoj kaj la absoluta reĝismo, unuvorte la liberala movado, pliserioziĝis.

Tiel doniĝis al la „vera” socialismo la dezirita okazo, kontraŭmeti la socialistajn postulojn al la politika movado, ĵeti la tradiciajn anatemojn kontraŭ liberalismo, kontraŭ la reprezentantoj-ŝtatoj, kontraŭ burĝa konkurenco, burĝa gazetar-libereco, burĝa juro, burĝa libereco kaj egaleco, predikante al la popolamaso, ke nenion ĝi povus gajni ĉe ĉi tiu burĝa movado, sed kontraŭe, ĉion povos perdi. La germana socialismo ĝustatempe forgesis, ke la franca kritiko, kies sensprita eĥo ĝi estis, antaŭkondiĉas la modernan burĝan socion kun siaj konformaj materiaj vivkondiĉoj

MANIFESTODE LA KOMUNISTA PARTIO

kaj konvena politika konstitucio, ĉio estis antaŭkondiĉoj, pri kies atingo oni ankoraŭ batalis en Germanio.

Al la germanaj absolutaj registaroj kun ilia postsekvantaro el pastroj, instruistoj¹, junkroj kaj burokratoj ĝi servis kiel bonvena birdotimigilo kontraŭ la minace leviĝanta burĝaro.

Ĝi fariĝis la dolĉeta deserto por la amaraj vipadoj kaj kugloj, per kiuj la samaj registaroj traktadis la germanajn laboristajn ribelojn.

Tiel fariĝinte armilo en la mano de la registaroj kontraŭ la germana burĝaro, la „vera” socialismo ankaŭ senpere reprezentis reakcian intereson, la intereson de la germana etburĝa filistraro. En Germanio la etburĝaro, devenante el la 16-a jarcento kaj ekde tiu tempo diversforme daŭre reaparanta, formis la veran socian bazon por la ekzistantaj cirkonstancoj.

Konservadi tiun klason signifas konservadi la ekzistantajn germanajn cirkonstancojn. De la industria kaj politika regadoj de la burĝaro la etburĝaro timas sian certan pereon, unuflanke pro la koncentrado de la kapitalo, aliflanke pro la ekestiĝo de revolucia proletaro. Al ĝi ŝajnis, ke la „vera” socialismo mortigos ambaŭ muŝojn per unu frapo. Ĝi disvastiĝis kiel epidemio.

La robo, teksita el spekulativa aranea ŝpinaĵo, brodita per belanimaj parolfloroj, saturita per amsufoka roso de sentimentaleco, tiu ekzaltita robo, en kiun la germanaj socialistoj envolvis siajn kelkajn sekajn „eternajn verojn”, nur kreskigis la vendon de sia varo ĉe tia publiko.

La germana socialismo siaflanke ĉiam pli komprenis, kiel sian destinon, esti la bombasta reprezentanto de tiu etburĝa filistraro.

1 En la reta versio: instuistoj. -vl

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

Ĝi proklamis la germanan nacion modela nacio kaj la germanan filistron tipa homo. Al ĉiu ajn fiago de tiu modela homo ĝi donis kaŝitan, altan, socialisman signifon, ekzakte la kontraŭon de ĝia vera signifo. Ĝi tiris la lastajn konsekvencojn, pledante rekte kontraŭ la „krude detrua” direkto de la komunismo kaj deklarante sian nepartiecan superecon super ĉiuj klasbataloj. Kun tre malmultaj esceptoj ĉiuj laŭaserte socialismaj kaj komunismaj verkaĵoj, cirkulantaj en Germanio, apartenas al tiu kota „nervodetrua literaturo”¹.

2. La konservativa aŭ burĝa socialismo

Parto de la burĝaro deziras forigi la socialajn mankojn por sekurigi la ekziston de la burĝa socio.

Al tio apartenas: ekonomiistoj, filantropoj, humanuloj, plibonigantoj de la situacio de la laborantaj klasoj, organizantoj de bonfarado, kontraŭuloj de bestoturmentado, fanatikuloj por modereco, pseŭdoreformuloj de plej dubinda speco. Tiu burĝa socialismo ankaŭ estis disvolvita al kompletaj sistemoj.

Kiel ekzemplon ni mencias „Philosophie de la misère” de Proudhon.²

La socialistaj burĝoj deziras la vivkondiĉojn de la moder-

1 La revolucia ŝtormo de 1848 forbalais tiun tutan aĉan direkton, prenante de iliaj reprezentantoj la emon daŭrigi la socialismumadon. Ĉefa reprezentanto kaj klasika tipo de tiu direkto estas sinjoro Karl Grün*. (*Noto de Engels al la germana eldono de 1890*)

* Karl Grün (1817 – 1887), etburĝa germana publicisto. (*Trad.*)

2 En Esperanto: Karlo Markso: La mizero de la filozofio. Respondo al Prudono: „Filozofio de la mizero”. Kun antaŭparoloj de Frederiko Engelso kaj de Henri Mougin; Pri J. P. Prudono (Letero al J. B. v. Schweitzer), tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), Embres-et-Castelmaure, 2009. -vl

MANIFESTODE LA KOMUNISTA PARTIO

na socio, sed sen bataloj kaj danĝeroj neeviteble rezultantaj el tiuj kondiĉoj. Ili deziras la ekzistantan socian staton sen la elementoj revoluciantaj kaj dissolvantaj ilin mem. Ili deziras la burĝaron sen la proletaro. Kompreneble la burĝaro imagas tiun mondon, en kiu ĝi regas, la plej bona mondo. La burĝa socialismo ellaboras tiun konsolan imagon al duona aŭ kompleta sistemo. Alvokante la proletaron realigi tiajn sistemojn kaj rekte marŝi en la Novan Jerusalemon¹, ĝi fakte nur postulas, ke la proletaro restu en la limoj de la nuna socio, sed forĵetu siajn malicajn imagojn pri la burĝaro.

Dua, malpli sistema kaj nur pli praktika formo de tiu socialismo klopodis malŝatigi al la laborista klaso ĉiun revolucion movadon, montrante, ke al ĝi utilis ne tiu aŭ alia politika ŝanĝo de la materialaj vivkondiĉoj, de la ekonomiaj kondiĉoj. Sub ŝanĝo de materialaj vivkondiĉoj tiu socialismo tamen tute ne komprenas la forigon de la burĝaj produktado-rilatoj, kio eblus nur per revolucio, sed celas administrajn plibonigojn, okazantajn sur la bazo de ĉi tiuj produktado-rilatoj, do nenion ŝanĝas ĉe la rilato inter kapitalo kaj dunga laboro, sed plejbonokaze por la burĝaro reduktas la kostojn de ĝia regado kaj plisimpligas ĝian ŝtatan buĝeton.

Sian adekvatan esprimon la burĝa socialismo atingas nur tie, kie ĝi fariĝas nura oratoraĵo.

Liberan komercon: por la avantaĝo de la laboranta klaso! Protektajn limimpostojn: por la avantaĝo de la laboranta klaso! Reformon de la prizonoj: por la avantaĝo de la laboranta klaso! Tio estas la lasta, la sola sincera vorto de la burĝa socialismo.

La socialismo de la burĝaro ja ĝuste resumeblas en la aserto: burĝoj estas burĝoj – por la avantaĝo de la laboranta klaso.

1 Metaforo por la ideala kristana socio de la estonto. (*Trad.*)

3. La kritike-utopiecaj socialismo kaj komunismo

Ni ne parolas ĉi tie pri tiu literaturo, kiu dum ĉiuj grandaj modernaj revolucioj esprimis la postulojn de la proletaro (kiel la verkoj de Babeuf¹ kaj aliaj).

La unuaj provoj de la proletaro rekte akceptigi sian propran klasan intereson, dum tempo de ĝenerala ekscitiĝo, dum periodo de la renverso de la feŭda socio, neeviteble fiaskis pro la subevoluinta stato de la proletaro kaj pro la manko de materialaj kondiĉoj de ĝia liberigo, kiuj ja nur estos la produkto de la burĝa epoko. La revolucia literaturo, akompananta la unuajn movojn de la proletaro, laŭ enhavo estas neeviteble reakcia. Ĝi instruas ĝeneralan asketismon kaj krudan socian samniveligon.

La propre tiel nomataj socialismaj kaj komunismaj sistemoj, la sistemoj de St. Simon, Fourier, Owen k.a., aperas dum la unua neevoluinta fazo de la batalo inter proletaro kaj burĝaro, kiun ni supre priskribis (Vidu ĉapitron I „Burĝaro kaj proletaro”).

Kvankam la fondintoj de tiuj sistemoj vidas la klasajn antagonismojn, same kiel ankaŭ la efikon de la malligaj elementoj en la reganta socio mem, ili tamen ne vidas ĉe la proletaro historian iniciaton kaj memstaran politikan movadon.

Ĉar la evoluo de la klasa antagonismo sampaŝas kun la evoluo de la industrio, ili same ne vidas la materialajn kondiĉojn por la liberigo de la proletaro kaj serĉas socian sciencon, sociajn leĝojn, por krei tiujn kondiĉojn.

Socia agado devas cedi al ilia persona inventa agado. Historiaj kondiĉoj de liberigo cedas al fantaziaj kondiĉoj. Sur la lokon de iom post ioma organiziĝo de la proletaro al

1 François Noel Babeuf, nomita Gracchus Babeuf (1760 – 1797), franca revolucia utopieca komunisto. Ekzekutita pro partopreno en ribelo por daŭrigi la francan revolucion. (*Trad.*)

MANIFESTODE LA KOMUNISTA PARTIO

klaso ili metas aparte elpensitan organizon de la socio. La estonta monda historio reduktiĝas por ili al propagandado kaj praktika realigado de iliaj prisociaj planoj.

Ili ja konscias pri la neceso zorgi en siaj planoj ĉefe pri la interesoj de la laboranta klaso kiel pleje suferanta klaso. Por ili la proletaro nur ekzistas kiel la pleje suferanta klaso.

La neevoluinta formo de la klasbatalo same kiel iliaj propraj vivkondiĉoj faras, ke tiaj socialistoj kredas sin sendependaj de tiu klasa antagonismo. Ili volas plibonigi la vivkondiĉojn de ĉiuj membroj de la socio, ankaŭ de la plej bonstataj. Pro tio ili daŭre apelacias al la tuta socio, sen iu distingo, ja prefere al la reganta klaso. Oni ja nur devus kompreni ilian sistemon, por rekoni ĝin kiel la plej bonan planon de la plej bona socio.

Pro tio ili malakceptas ĉiujn politikajn, aparte ĉiujn revoluciajn agojn. Ili volas atingi sian celon per pacaj rimedoj, klopodante malfermi vojojn al la nova socia evangelio per la forto de la ekzemplo per etaj, kompreneble fiaskantaj eksperimentoj.

Dum tempo, kiam la proletaro estas ankoraŭ ege neevoluinta, do mem ankoraŭ fantazie interpretas sian propran pozicion, tia fantazia priskribo de la estonta socio kongruas kun la unua antaŭsenta instinkto de tiu klaso pri ĝenerala rekonstruo de la socio.

Sed la socialismaj kaj komunismaj publikaĵoj¹ ankaŭ enhavas kritikajn elementojn. Ili atakas ĉiujn principojn de la ekzistanta socio. Pro tio ili liveris plej valoran materialon por la klerigo de la laboristoj. Iliaj pozitivaj proponoj pri la estonta socio, ekz. pri la forigo de la kontraŭeco inter urbo kaj vilaĝo, de la familio, de la privata alproprigo, de la dunga laboro, la proklamo de la socia harmonio, la transformo de la ŝtato en nuran administracion de la produktado

1 en la reta versio: publikaĵoj. -vl

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

– ĉiuj ĉi proponoj nur esprimas la malaperon de la klasa antagonismo, kiu nur ĵus komencas evolui, kiu en tiuj publikaĵoj estas videbla nur en sia unua nedefinita formo. Pro tio tiuj proponoj ankoraŭ havas pure utopiecan karakteron.

La signifo de la kritike-utopieca socialismo kaj komunismo troviĝas en inversa rilato al la historia evoluo. Same kiom evoluas kaj elformiĝas la klasbatalo, same tiom tiu fantazia leviĝo super ĝi, tiu fantazia batalo kontraŭ ĝi perdas ĉiun praktikan valoron, ĉiujn teoriajn pravigojn. Kvankam la fondintoj de tiuj sistemoj estis multtrilate revoluciaj, iliaj disĉiploj tamen ĉiuforte fondis reakciajn sektojn. Ili konservas la malnovajn konceptojn de la majstroj, ignorante la historian evoluon de la proletaro. Pro tio ili konsekvence klopodas malakrigi la klasbatalon kaj kompromisi inter la antagonismoj. Ili ankoraŭ revas pri la eksperimenta realigo de siaj sociaj utopioj, fondo de unuopaj falansteroj, fondo de Hejm-Kolonioj, kreo de Malgranda Ikario¹, miniatura eldono de la Nova Jerusalemo, – kaj por konstrui tiujn aerkastelojn ili devas apelacii al la filantropio de la burĝaj koroj kaj monuoj.

Iom post iom ili sinkas en la kategorion de la supre priskribitaj reakciaj aŭ konservativaj socialistoj kaj distingĝas de tiuj nur per ankoraŭ pli da sistema pedanteco, per fanatika superstiĉa kredo al la miraklaj efikoj de sia socia scienco.

Pro tio ili fanatike² agas kontraŭ ĉiu politika movado de

1 Falansteroj nomiĝis la socialistaj kolonioj planitaj de Charles Fourier. Cabet nomis sian utopion Ikario kaj tiel pli poste sian komunisman kolonion en Ameriko. (*Noto de Engels al la angla eldono de 1888*) Home-Colonies (kolonioj enlandaj) Owen nomas siajn komunismajn modelsocietojn. Falansteroj estis la nomo de sociaj palacoj, planitaj de Fourier. Ikario nomiĝis la utopia lando de fantazio, kies komunismajn instituciojn priskribas Cabet. (*Noto de Engels al la germana eldono de 1890*)

2 en la reta versio: fantastike. -vl

MANIFESTODE LA KOMUNISTA PARTIO

laboristoj, kiu, laŭ ili, povis ekestiĝi nur pro blinda ignoro de la nova evangelio.

La Owen-istoj en Anglio, la Fourier-istoj en Francio jen agas kontraŭ la ĉartistoj¹, jen kontraŭ la adeptoj de la reformistoj².

-
- 1 Memstara politika movado de la angla proletaro meze de la 19-a jarcento ekde 1832 ĝis 1854. Nomata laŭ ĝia baza dokumento (People's Charter, popola ĉarto), la „unua laborista partio de nia tempo” (Engels). (*Trad.*)
 - 2 La reformistoj, adeptoj de la pariza gazeto „La Réforme”, agitis por starigo de respubliko kaj la apliko de demokratiaj kaj socialaj reformoj. (*Trad.*)

IV. Rilato de la komunistoj al la diversaj opoziciaj partioj

Post ĉapitro II kompreniĝas de si mem la rilato de la komunistoj al la jam konstituiĝintaj laboristaj partioj, sekve al la ĉartistoj en Anglio kaj al la agroreformistoj en Norda Ameriko.

La komunistoj batalas por realigi la senpere aktualajn celojn kaj interesojn de la laborista klaso, sed en sia aktuala movado ili samtempe reprezentas la estontecon de la movado. En Francio la komunistoj aliĝas al la socialista-demokratia partio¹ kontraŭ la konservativa kaj radikala burĝaro, ne rezignante la rajton rilati kritike al sensencaj frazoj kaj iluzioj, devenantaj el la revolucia tradicio.

En Svisio ili apogas la radikalulojn, ne forgesante, ke tiu partio konsistas el kontraŭdiraj elementoj, parte el demokratiaj socialistoj laŭ la franca senco, parte el radikala burĝaro.

En Pollando la komunistoj apogas la partion por kiu la

1 Temas pri la partio, kiu siatempe estis reprezentita en la parlamento de Ledru-Rollin*, en la literaturo de Louis Blanc** kaj en la taga gazetaro per la ĵurnalo „Reforme”. La nomo „socialdemokratio” signifis ĉe ĝiaj inventintoj sekcio de la demokratia aŭ respublikana partio kun pli aŭ malpli da socialisma koloro. (*Noto de Engels al la angla eldono de 1888*).

La partio en Francio, siatempe nominta sin social-demokrata estis politike reprezentita per Ledru-Rollin kaj literaturo per Louis Blanc; ĝi do estis abisme malsama al la hodiaŭa germana socialdemokratio. (*Noto de Engels al la germana eldono de 1890*)

* Alexandre-Auguste Ledru-Rollin (Ledri-Rolen) (1807 – 1874) , franca publicisto, unu el la ĉefoj de la demokrata etburĝaro, estis redaktoro de la ĵurnalo „La Reforme”, en 1848 membro de la provizora registaro. (*Trad.*)

MANIFESTODE LA KOMUNISTA PARTIO

agrara revolucio estas kondiĉo de la nacia liberigo. Temas pri tiu sama partio, kiu iniciatis la Insurekcion de Krakovo en 1846¹.

En Germanio ĉiam kiam la burĝaro sekvas revolucion vojon, la Komunista Partio batalas komune kun ĝi kontraŭ la absoluta monarkio, kontraŭ la feŭda terproprieto kaj etburĝaro.

Sed eĉ por momento ĝi neniam ĉesas elformi ĉe la laboristoj kiom eble klaran konscion pri la malamika antagonismo inter burĝaro kaj proletaro, por ke la germanaj laboristoj tuj povu direkti kontraŭ la burĝaro kiel armilojn tiujn sociajn kaj politikajn kondiĉojn, kiujn neeviteble estigos la burĝaro per sia regado, por ke tuj povu komenciĝi la batalo kontraŭ la burĝaro mem post la faligo de la reakciaj klasoj en Germanio.

La komunistoj turnas sian ĉefan atenton al Germanio, ĉar Germanio troviĝas ĉe la antaŭkomenco de burĝa revolucio kaj ĉar ĝi realigas tiun revolucion sub plej progresintaj kondiĉoj de la eŭropa civilizacio entute, kaj kun multe pli evoluinta proletaro ol en Anglio en la 17-a kaj en Francio en la 18-a jarcentoj. Pro tio la germana burĝa revolucio nur povas esti la senpera preludo al proletara revolucio.

Unuvorte, la komunistoj ĉie subtenas ĉiun ajn revolucion movadon kontraŭ la ekzistantaj sociaj kaj politikaj cirkonstancoj.

En ĉiuj ĉi movadoj ili elstarigas la demandojn pri la proprieto kiel la bazan demandojn de la movado, en kiu ajn pli aŭ malpli evoluinta formo aperis tiu demando.

1 Dum la nacia liberiga batalo en Pollando* la ribeluloj sukcesis la 22-an de februaro 1846 konstitui en Krakovo Nacian Asembleon. La ribelo en Krakovo estis komence de marto 1846 disbatita de aŭstroj, prusaj kaj rusaj trupoj. (*Trad.*)

* en la reta versio: Polando. -vl

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

Fine, la komunistoj laboras ĉie por la unuiĝo kaj interkompreniĝo de la demokrataj partioj de ĉiuj landoj.

La komunistoj malŝatas kaŝi siajn konceptojn kaj intencojn. Ili malkaŝe deklaras, ke iliaj celoj povas esti atingitaj nur per perforta renverso de ĉiu ĝisnuna sociordo. Timtremu la regantaj klasoj pro komunista revolucio. La proletoj per ĝi povas perdi nenion, krom siaj ĉenoj. Ili povas gajni mondon.

Proletoj el ĉiuj landoj, unuiĝu!

Pri la Esperanta eldono de la „Komunista Manifesto”

I

La „Manifesto de la Komunista Partio” apartenas al la plej multe tradukitaj verkoj de la politika literaturo. „Nuntempe ĝi sendube estas la plej disvastigita, la plej internacia produkto de la tuta socialisma literaturo, la komuna programo de multaj milionoj da laboristoj ĉiulandaj de Siberio ĝis Kalifornio”, skribis Engels jam en la jaro 1890.

Ĝi estas tradukita en pli ol 120 lingvojn. Aperis pli ol 1200 eldonoj.

Tiu ankaŭ hodiaŭ fascina malmultpaĝa dokumento de la komunismo, kiu „samvaloras kiel kompletaj volumoj” (Lenin), estis tradukita ankaŭ en Esperanton. Aperis du tradukoj kaj 6 eldonoj.

1. En la jaro 1908 en Ĉikago ĉe la eldonejo „Charles H. Herr and Company” publikiĝis traduko de Arthur Baker: „Manifesto de la Komunista Partio de Karolo Marks kaj Frederiko Engels. El la Aŭtoritata Angla Traduko, Redaktita kaj Alnotita de Frederiko Engels. Tradukita Esperanten (de) Arturo Baker. Verkinto de „The American Esperanto Book”. Redaktoro de „Amerika Esperantisto” “. La 65-paĝa libreto ankaŭ entenis la anglan tradukon de Samuel Moore kun antaŭparolo kaj notoj de Friedrich Engels.

En sia anglalingva antaŭparolo, karakterizante la tutmondiĝon de la batalo inter la organizita laboristaro kaj la posedantoj de la produktadorimedo, Baker skribis: „En la

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

disvolviĝo de tiu mondvasta batalo la internacia lingvo Esperanto devas ludi gravan rolon. Ĝuste kiel la telegrafoj, la fervojoj kaj la vaporŝipoj ebligas al la modernaj nacioj rapide decidi pri la rezulto de la milito inter la Rusa Kapitalo kaj la Japana Kapitalo, tiel Esperanto post multaj jaroj plirapidigos la rezulton de la lukto inter la Tuta Laboro kaj la Tuta Kapitalo.”

La Manifeston li nomis „the fundamento of the great political and economic struggle” (la fundamento de la granda politika kaj ekonomia batalo).

La ideo de Baker, presi paralele al la Esperanta traduko la anglan version, estas tre bonvena, ĉar oni povas taksi la anglan tradukon de Moore kvazaŭ dua originalo, pro la fakto, ke Engels trarigardis, korektis kaj redaktis ĝin kaj pro tio sendube garantiis altgradan fidelecon al la de li kaj Marx verkita germana originalo.

Kiu estis Baker? Laŭ la Enciklopedio de Esperanto (L. Kókény/V. Bleier 1933, p. 37) Arthur Brooks Baker (Bejkr) estis usona prelegisto kaj ĵurnalisto, naskita en 1877. Li fondis la unuan Esperanto-gazeton en Usono („La Amerika Esperantisto”) kaj verkis broŝurojn kaj lernolibrojn pri Esperanto, eldonitajn en grandaj eldonkvantoj.

2. La dua provo traduki la Manifeston estas de Emil Pfeffer. En la volumo „Dokumentoj de Komunismo” (Leipzig: SAT 1923, 132 p.) aperis la 48-paĝa Manifesto. La aŭstro Pfeffer (naskita en 1891) publikigis beletrajn kaj sciencajn tradukojn, verkis lernilojn kaj redaktis kelkajn revuojn.

En la organo de „Arbeiter-Esperanto-Bund für das deutsche Sprachgebiet” (Laborista Esperanto-Asocio por la germanlingvaj regionoj), „Der Arbeiter-Esperantist” („La Laborista Esperantisto” n-ro 11/12 1923, p. 58) ni trovas koncizan informon pri la libro el la plumo de la redaktoro

Pri la Esperanta eldono de la „Komunista Manifesto”

Adolf Sproeck, kiu kritikis la tradukon de Pfeffer skribante, ke „la stilo ... tro multe respegulas germanan stilon, kiu tute ne povas pretendi esti internacia”.

Tiu kritiko estas rimarkinda, ĉar Pfeffer starigis al si altan celon. En lia antaŭparolo ni legas: „Alpaŝante al la esperantigo de la Komunista Manifesto la Tradukanto estis gvidata de la intenco, doni al la Esperantistaro tradukon, kiu pli fidele respegulas la originalon ol la ĝis nun aperintaj tradukoj nacilingvaj. Kaj se malgraŭ la precizeco de la traduko la verko esperantigita surprizas per sia facila legebleco, tiu ĉi fakto estu konsiderata kiel plua pruvo de la mirinda taŭgeco de Esperanto por preciza redono de la scienca literaturo, kiel nova stimulo kaj firmigo por la Esperantistaj kamaradoj fervore daŭrigi sian gloran, nuntempe tiom urĝan laboron: enkonduki Esperanton en servon de l'tutmonda socialismo”. (p. 5/6)

3. Aperis dua eldono en la jaro 1924, ankaŭ ĉe SAT.

4./5. De la unua eldono aperis post la milito du senŝanĝaj fotorepresoj en Tokio (eldonejo „Nauka”, 1948 kaj 1949), el kiuj ni citis Pfeffer, kvankam la tradukinto ne estas menciita. Tio estas la tria kaj kvara eldonoj de Pfeffer.

6. Kvina eldono de la Manifesto en la traduko de Pfeffer, 56-paĝa broŝuro aperis en 1936 ĉe SAT (Parizo). Temas pri iom korektita represo de la unua. La korektoj koncernas i.a. anstataŭon de „kaj” per „k”, kutima mallongigo en SAT-rondoj, anstataŭon de la malnova „proletario” per la pli moderna formo „proleto”. Anstataŭ „plejbejo” ni trovas „plebano”, anstataŭ „feŭdala” „feŭda” k.a. Evidente la „Plena Vortaro de Esperanto”, eldonita en 1930 de SAT, efikis normige.

Al tiu eldono estis aldonita foto de Marx (sed strange, ne de Engels). La antaŭparolo de Pfeffer mankas. Anstataŭ ĝi aperas antaŭparolo pri la signifo de la Komunista Mani-

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

festo, verkita de Lucien Laurat (Lora) (pseŭdonimoj L. Lora, L. Revo). Ne estas klare, ĉu Pfeffer mem korektis la tekston aŭ ĉu tion faris Laurat.

II

Ĉar neniu el la menciitaj Esperantaj eldonoj estas plu havebla, la iniciato de la eldonejo „Progreso” reeldoni la Manifeston en Esperanta traduko estas tre salutinda. Kompleta retraduko necesis, inter alie pro tio, ĉar Esperanto intertempe fariĝis pli ol 100-jara. Kompreneble, la lingvo de 1908, de 1923 aŭ de 1936 ne estas la sama kiel de 1990. Ĝi evoluis. La kreskanta kvanto de socipolitikaj tekstoj stabiligis la ĉi-rilatan leksikon. La stilo fajniĝis.

Kiam ni akceptis la taskon traduki la Manifeston, ni ne tute konsciis pri la malfacileco de la afero. La teksto laŭ enhavo estas komuna verko de Karl Marx kaj Friedrich Engels. La unuan skizon por la enhavo verŝajne liveris Engels. Sed la finan tekston verkis Marx mem. La lingvaĵo de Marx ne ĉiam estas facile komprenebla. Ĝenerale agnoskita fakto. La stilo de Engels estas pli facile komprenebla.

Ni konfesas, ke ofte ni havis malfacilaĵojn tuj kompreni la esencon de Marx'aj frazoj. Kiel, do, ni procedis, klopodante liveri la trian tradukon de la Manifesto?

1. Pri diversaj dubaj punktoj ni konsultis la germanan specialiston el GDR pri la Manifesto, d-ron Wolfgang Meiser, kiu preparas la eldonon de la klasika teksto por MEGA, tio estas „Marx-Engels-Gesamtausgabe” (la Kompleta Verkaro de Marx-Engels), scienca eldono kun 42 planitaj volumoj, preparata de la Instituto pri Marksismo-Leninismo ĉe Centra Komitato de Komunista Partio de Soveta Unio.

2. Dum la tradukado mem ni tute ignoris la antaŭajn du

Pri la Esperanta eldono de la „Komunista Manifesto”

Esperantajn versiojn. Nur post la pretigo de nia traduko ni iom komparis, kiel oni povas vidi en ĉi tiu eseo.

3. Gravegan helpoj al ni donis la angla traduko (1888) de Samuel Moore (1830 – 1912) kaj la franca traduko (1885) de Laura Lafargue (1845 – 1911). Samuel Moore, kiel tradukinto de granda parto de la „Kapitalo” de Marx kaj amiko de Marx kaj Engels, estis bonege preprarita por fari adekvatan tradukon. Laura Lafargue estis la filino de Marx. Ambaŭ eldonoj ankaŭ aperis ĉe la eldonejo „Progreso”. Aparte la angla traduko tre helpis, ĉar kelkaloke ĝi estas pli klara ol la germana originalo. Foje ĝi iom diverĝas de la originalo, jen ion aldonas, jen ion ellasas. Se tio estis en la intereso de la komprenebleco de la teksto, ni foje (kvankam tre malofte) sekvis la anglan tradukon.

Jen kelkaj ekzemploj:

a) En la unua alineo temas laŭ la germana originalo i.a. pri germanaj policistoj (deutsche Polizisten). En la angla traduko ni trovas „police spies” (policaj spionoj). Baker tradukis laŭ la angla versio. Pfeffer kaj ni restis ĉe la originalo.

b) En la teksto (ĉapitro „Burĝoj kaj proletoj”) mankas en la germana originalo indiko de landoj, sed ni trovas ilin en la angla traduko. Do laŭ tio la Esperanta traduko devus teksti: „Subpremita klaso dum la feŭdsinjora regado... jen sendependa urba respubliko (*kiel en Italio kaj Germanio*), jen tria impostodeva klaso de la monarkio (*kiel en Francio*)...” Baker sekvas la anglan version, menciante la landojn, Pfeffer kaj ni ne mencias la landojn.

c) En la unua alineo de la II-a ĉapitro ni i.a. trovas la frazon, kiu tekstas en la germana originalo: „Sie stellen keine besonderen Prinzipien auf”, ni trovas en la angla versio „They do not set up any sectarian principles of their own”. Pro tio ni elektis la pli klaran solvon: „Ili starigas

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

neniujn sektecajn principojn...". Ankaŭ jam Baker profitas de la angla versio („Ili ne starigas sektajn principojn...”) sed ne Pfeffer („Ili starigas neniajn specialajn principojn...”).

d) En la sama ĉapitro aliloke temas pri la koncepto (imago) de la burĝaro, laŭ kiu la burĝaj produktadomanieroj kaj proprieto-kondiĉoj estas eternaj leĝoj. La germana originalo: „Die interessierte Vorstellung ... teilt ihr mit allen untergegangenen herrschenden Klassen”. Pfeffer tradukis laŭvorte „La intersitan imagon ... vi dividas kun ĉiuj pereintaj regantaj klasoj”. Tio ne donas klaran imagon, pri kio temas. La angla traduko estas mirinde klara: „The selfish misconception ... you share with every ruling class that has preceded you” („La egoismana miskoncepton ... vi partoprenas kun ĉiu gvidanta klaso, kiu antaŭis vin”). Pro tio Baker, pli komprenelbe ol Pfeffer, tradukis: „La egoista malkompreno...” Kaj ni elektis: „La egoisma koncepto ... tiun koncepton vi havas komuna kun ĉiuj aliaj malaperintaj regintaj klasoj”.

e) Eĉ okazas foje, ke la angla traduko enhavas ideojn, kiuj tute mankas en la germana originalo. Engels verŝajne aldonis tion laŭ la sciokresko, akirita post la apero de la germana eldono.

Jen ekzemplo. Fine de la II-a ĉapitro aperas 10 intervenoj (Maßregeln), kiuj estu aplikotaj post la venko de la proletara revolucio. La 9-a interveno tekstas laŭ la germana originalo: „Vereinigung des Betriebs von Ackerbau und Industrie, Hinwirken auf die allmähliche Beseitigung des Unterschieds von Stadt und Land” (Kunigo de agrikulturo kun industrio, laŭgrada iom-post-ioma forigo de la diferenco inter urbo kaj vilaĝo.). En la angla versio oni aldone mencias, per kiu maniero tiu kunigo okazu, nome „by a more equable distribution of the population over the country” (per pli egala distribuo de la loĝantaro tra la lando). Baker tradukis „... per pli egala disloĝiĝo de la popolo tra

Pri la Esperanta eldono de la „Komunista Manifesto”

la kamparo”. Tamen, nek Pfeffer nek ni aldonis tiun ideon, mankantan en la germana originalo.

f) Sed ankaŭ okazas, ke en la angla traduko mankas frazo, kiu aperas en la germana originalo. En la subĉapitro „La germana aŭ la ‘vera’ socialismo” de la III-a ĉapitro, en la dua alineo pri la socialisma kaj komunisma francaj literaturoj, importitaj al Germanio, mankas jena frazo: „Ĝi (la importita literaturo – D. B.) devis aspekti kiel superflua spekulativo pri la realiĝo de la homa naturo”.

Jen nur kelkaj problemoj, kiuj devenas el la tre stimula komparo kun la angla traduko, komparo, kiu tre helpis trovi espereble akcepteblajn ekvivalentojn.

III

Aperis diversaj aliaj problemoj, kiujn mi devis solvi. Jen kelkaj:

1. Jam la titolo estis neklara. Baker nomas sian tradukon „Manifesto de la Komunista Partio”. La titolo de la traduko de Pfeffer estas „La Komunista Manifesto”. Tiu diferenco unuavide ŝajnas nekomprenebla. Ja la germana originalo el la jaro 1848 portas la titolon „Manifest der Kommunistischen Partei”. Kaj la angla traduko de 1888 nomiĝas „Manifesto of the Communist Party”.

Fakte la diverslingvaj tradukoj de la Manifesto ankaŭ ne estas unuecaj.

Engels en leteroj al Marx ankaŭ ofte nomis ĝin Komunista Manifesto. En kelkaj lingvoj la titolo tradukiĝis „(La) Komunista Manifesto”, ekz. pola traduko de 1882 „Manifest Komunistyczny”. La germana eldono de 1890, por kiu Engels verkis antaŭparolon (vidu en ĉi tiu broŝuro), aperis kiel „Das Kommunistische Manifesti” („La Komunista Manifesto”).

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

Do la du titoloj evidente estis paralele uzitaj. Fakte estas eĉ pli logike nomi la dokumenton nur „La Komunista Manifesto”, ĉar ne ekzistis Komunista Partio sed nur la „Ligo de Komunistoj”, kiam aperis la verko. Verŝajne pro la influo de Marx la unua germana originalo portis la konatan titolon. Tiun modelon, malgraŭ ŝanceliĝoj, sekvis tamen la plej multaj tradukoj, krom la menciitaj, ekz. la franca „Manifeste du Parti communiste”, la hispana „Manifesto del Partido Comunista”, la itala „Il Manifesto del Partito Comunista” kaj aliaj. Pro tio ni ankaŭ sekvis la germanan originalon.

2. Al la plej konataj frazoj de la Manifesto sendube apartenas la unua:

„Ein Gespenst geht um in Europa
das Gespenst des Kommunismus”.

Kaj jen problemo, kiel traduki la verbon de tiu frazo?

Tre nekontentiga estas la traduko de Pfeffer: „Fantomo ĉirkaŭvagas en Eŭropo – ...” Kvankam la angla traduko estas sufiĉe klara „a spectre is haunting Europe”, ankaŭ la solvo de Baker ne kontentigas: „Fantomo vizitadas Eŭrop-on”.

Pro tio ŝajnis al ni preferinde uzi la jam iom konatan neologismon „hanti” (angle haunt, france hanter) kun la ĝenerala signifo „ofte vizitadi, persekuti, plagi”. Ĝuste tiun signifon laŭ PIV havas „hanti” (p. 373): „Vizitadi (se paroli pri fantomo): ~ata domo, kastelo, (figure) tiu sceno ~as lian memoron. Vidu: obsedi”.

3. Malsame al la germana, la angla kaj aliaj lingvoj en Esperanto ne nur eblas distingi *komunist'* kaj *komunism'* (*socialist'* kaj *socialism'*) sed ankaŭ regule formi la adjektivojn *komunista/komunisma* (*socialista/socialisma*). Tiun distingoeblecon oni foje povas uzi. Ĝenerale la partio estas

Pri la Esperanta eldono de la „Komunista Manifesto”

„komunista” aŭ „socialista” ĉar temas pri partio de homoj, de komunistoj/socialistoj. Sed la alstrebataj sociordoj estas la komunisma aŭ la socialisma.

4. En la germana ni havas la fremdvortojn „Proletarier” kaj „Proletariat”. En Esperanto „proleto/proletaro” (ankaŭ la pli manovajn formojn „proletario/proletariato”). De ambaŭ substantivoj en Esperanto eblas senprobleme derivi la adjektivojn „proleta/proletara”) sed en la germana nur ekzistas „proletarisch” (proleta). Ofte en la teksto aperas la kombinoj „proletarische Revolution”. Se oni volas substreki la klasan enhavon, oni devus traduki „proletara revolucio” ĉar temas pri revolucio ne nur farita kaj subtenita de proletoj, sed ankaŭ de burĝaj intelektuloj, kiel ekzemple de Marx kaj Engels. Se oni tamen volas akcenti la ĉefajn agantojn de la revolucio, oni tradukas per „proleta revolucio”. Do, depende de la celita senco, ni uzis ambaŭ formojn.

5. En la 3-a subĉapitro de la tria parto ni tradukis la titolon per „La kritike-utopiecaj socialismo kaj komunismo”. Baker tradukis „Kritika-Utopia Socialismo kaj Komunismo” kaj Pfeffer formulis „La kriklike-utopista socialismo kaj komunismo”. Unue ŝajnas al ni necese apliki la pluralon ĉe la adjektivo, ĉar ĝi koncernas du substantivojn. Sed pli gravas la demando, ĉu elekti „utopia”, „utopiista” aŭ „utopisima”, „utopieca”? Ĉar por Marx kaj Engels nek la socialismo nek la komunismo en si mem estis utopio, pro tio ni devas akcenti la utopiecon de la traktitaj sistemoj de St-Simon, Fourier, Owen k.s. Ankaŭ en la germana originalo ni ne trovas „utopisch” (utopia) sed ja „utopistisch” (utopiista). Do Baker ne pravas kaj Pfeffer sekvas la germanan formon. Ĉar malpli gravis, ke la menciitoj estis utopiistoj, kaj multe pli substrekendas la utopieco de iliaj proponitaj socisistemaj celoj, ni elektis la tradukon „utopieca” kio ŝajnas al ni pli konforma.

6. Alia iom komplika problemo estas la distingo inter

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

„propraĵo“, „posedaĵo“ kaj „proprietaĵo“, fundamentaj nocioj por la marksismo. Laŭ PIV eblas, laŭ certaj kuntekstoj, uzi ilin sinonime. La germanan „Eigentum“ kaj „Eigentumsverhältnisse“ Pfeffer tradukis ĉiam per „propraĵo“ kaj „propraĵrilatoj“. Baker uzas „posedeco“ „posedaĵo“ „propreco“ „proprecaj rilatoj“ kaj „propraĵo“. Por tiuj tradukoj ĉiam troviĝas nur la angla „property“ aŭ „property relations“. Ni distingas inter „proprieto“, „proprieto-rilatoj“ kaj „proprietaĵo“. Ĉar por la verkintoj de la Manifesto „Eigentum“ unuavice estis ekonomia kategorio, ni volis akcenti ĝuste tiun socian klasan rilaton, kiun spegulas la „proprieto“. Laŭ PIV (p. 877) „proprieto“ estas „rajto plene uzadi, disponi kaj eĉ detrui aĵon, en la limoj de la ekzistantaj leĝoj“. Al la radiko „propriet“ rilatas la fundamente grava nocio „senproprietigi“. Se temis pri certa konkretiĝo de la „proprieto“ ni uzis „proprietaĵo“.

7. Problemon ankaŭ prezentis la traduko de la germana „Pfaahlbürger“, laŭvorte „palisburĝo“ unuavice tute ne komprenebla esprimo. Marx ne nur ne klarigas tiun nocion, li ankaŭ uzas ĝin senaverte kun diversaj signifoj. Pro tio necesis klarigo en la noto. Pfeffer ne distingas ambaŭ signifojn. Ĉar Moore en sia angla versio tradukis „Pfaahlbürger“ per „chartered burghers“, „Philistines“ kaj „petty bourgeois Philistine“, Baker trovis pli bonan solvon ol Pfeffer tradukante „enrajtigataj burĝoj“, „germanaj filistroj“ kaj „kapitaletulaj filistroj“. Tamen ni simple uzis la laŭvortan tradukon „palisburĝaro“ por unu signifo, kaj por la alia – „germana etburĝa filstraro“ kaj „etburĝa filstraro“.

8. Aŭ kiel traduki la germanan „Lumpenproletariat“ laŭvorte „ĉifonproletaro“?

Moore angligas tion per „dangerous class“ kaj L. Lafargue simple transprenas la germanan vorton en la francan: lumpenproletariat. En la hispana traduko ni trovas „lumpenproletariado“.

Pri la Esperanta eldono de la „Komunista Manifesto”

Kvankam ankaŭ en Esperantaj tekstoj jam aperis „lumpenproletoj” (vidu en „Cent tridek tri tagoj. Historia skizo de la hungarlanda proletara revolucio”. Leipzig. EKRELO 1930, p. 138), ni tamen trovas la tradukon „ĉifonproletaro” sufiĉe elvokiva same kiel Pfeffer. Baker, laŭ la neklara angla esprimo, tradukis per „danĝera klaso”.

9. Kaj fine sufiĉe miskompreniga estas la originalteksta esprimo „Weibergemeinschaft” angle „community of women” laŭvorte „virinkomuneco” (tiel ankaŭ Pfeffer). Baker tradukis „komuneco je virinoj” kio estas iom pli klara. Tamen, nur la kunteksto klarigas, ke temas pri „Komuna posedo pri virinoj”. Do, kial ne tiel traduki?

Jen nur kelkaj el la multaj problemoj, kiujn ni alfrontis. Eble ni ne ĉie trovis kontentigan solvon. Sed, ni konsolas nin, ke multaj tradukintoj en multaj lingvoj baraktis kun similaj aŭ kun aliaj malfacilaĵoj de tiu klasika teksto de la komunista mondmovado.

IV

Komparante specimenojn el ĉiuj tri Esperantaj versioj kun la germana originalo, la angla traduko kaj laŭ la ebleco, kun diversaj nacilingvaj tradukoj, la leganto eble malkovros pluajn nuancojn kaj tradukproblemojn. Ni invitas lin al tio prezentante al lia propra analizo kaj juĝo specimenojn el la dua ĉapitro de la Manifesto:

germane (g) Proletarier und Kommunisten

angle(a) Proletarians and Communists

Baker (B) Proletarioj kaj Komunistoj

Pfeffer (3-a eld., P) Proletoj k Komunistoj

Blanke (Bl) Proletoj kaj Komunistoj

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

g In welchem Verhältnis stehen die Kommunisten zu den
a In what relation do the Communists stand to the
B En kia rilato staras la komunistoj al la
P En kia rilato staras la komunistoj al la
BL Kia estas la rilato de la komunistoj al la
g Proletariern überhaupt?
a proletarians as a whole?
B proletarioj kiel tuto?
P proletoj entute?
Bl proletoj kiel tuto?
g Die Kommunisten sind keine besondere Partei
a The Communists do not form a separate party
B La komunistoj ne estas aparta partio
P La komunistoj ne estas speciala partio
BL La komunistoj ne estas aparta partio
g gegenüber den anderen Arbeiterparteien.
a opposed to other working-class parties.
B opozicianta aliajn laborklasajn partiojn.
P rilate al aliaj laboristaj partioj.
Bl kontraŭ la aliaj laboristaj partioj.
g Sie haben keine von den Interessen
a They have no interests separate and apart
B Ili havas neniajn interesojn apartajn
P Ili havas neniajn de la interesoj
Bl Ili ne havas interesojn apartajn
g des ganzen Proletariats getrennten Interessen.
a from those of the proletariat as a whole.
B el tiuj de la tuta proletariato.
P de l'tuta proletaro apartajn interesojn.
Bl de la tuta proletaro.
g Sie stellen keine besonderen Prinzipien auf,
a They do not set up any sectarian principles of their own
B Ili ne starigas sektajn principojn siajn
P Ili starigas neniajn specialajn principojn,
Bl Ili starigas neniujn sektecajn principojn,
g wonach sie die proletarische Bewegung modeln wollen.
a by which to shape and mould the proletarian movement.
B laŭ kiuj formi kaj modli la proletarian movadon.
P laŭ kiuj ili la proletan movadon volas formi.
Bl laŭ kiuj ili volas fasoni la proletan movadon.

Pri la Esperanta eldono de la „Komunista Manifesto”

g Die Kommunisten unterscheiden sich von
a The Communists are distinguished from
B La komunistoj estas distingataj el
P La komunistoj diferencas
Bl La komunistoj distingiĝas
g den übrigen proletarischen Parteien nur dadurch,
a the other working class parties by this only:
B la aliaj laborklasaj partioj nur per tiu ĉi:
P de la ceteraj proletaj partioj nur per tio,
Bl de la aliaj proletaj partioj nur per tio:
g daß sie einerseits in den verschiedenen nationalen
a In the national struggles of the proletarians
B En la naciaj bataladoj de la proletarioj
P ke unuflanke ili en la diversaj
Bl En la diversaj naciaj bataloj de la proletoj
g Kämpfen der Proletarier die gemeinsamen,
a of the different countries, they point out
B de diversaj landoj, ili elmontras kaj portas
P naciaj bataloj de l'proletoj akcentas la komunajn,
Bl ili elstarigas kaj respektigas la komunajn,
g von der Nationalität unabhängigen Interessen
a and bring to the front the common interests
B al la fronto la komunajn interesojn
P de la nacieco sendependajn, interesojn
Bl interesojn
g des gesamten Proletariats hervorheben und zur Geltung
bringen,
a of the entire proletariat, independently of any¹ nationality.
B de la tuta proletariato, ne depende de ĉia nacieco.
P de l'tuta proletaro k substrekas ilian signifon,
Bl de la tuta proletaro, sendepende de la nacieco.
g andererseits dadurch, daß sie in den verschiedenen
Entwicklungsstufen, welche
a In the various stages of development which
B En la diversaj gradoj de disvolviĝado tra
P aliflanke per tio, ke ili en diversaj evoluaj ŝtupoj, kiujn
Bl En la diversaj evoluŝtupoj, kiujn trapasas
g der Kampf zwischen Proletariat und Bourgeoisie

1 en la reta verso: „an”. -vl

Manifesto de la Komunista Partiotradukis Detlev Blanke

a the struggle of the working class against the
B kiuj la batalado de la laborklaso kontraŭ la kapitalistaro
P la batalo inter proletaro kaj burĝaro
Bl la batalo inter proletaro kaj burĝaro,
g durchläuft, stets das Interesse der Gesamtbewegung
a bourgeoisie has to pass through, they always and
everywhere
B devegas pasi, ili ĉiam kaj ĉie reprezentas la interesojn
P trakuras, reprezentas ĉiam la intereson de la tuta
Bl ili ĉiam reprezentas la interesojn de la
g vertreten. Die Kommunisten sind also praktisch
a represent the interests of the movement as a whole. The
Communists, therefore, are on the
B de la movado kiel unu tuto. La komunistoj tial estas,
unuflanke,
P movado. La komunistoj estas do praktike la
Bl tuta movado. Do la komunistoj praktike estas la
g der entschiedenste, immer weitertreibende Teil
a one hand, practically, the most advanced and resolute
section
B praktike la plej antaŭa kaj decidema sekcio
P plej decidita, ĉiam pluen puŝanta parto
Bl plej energia, ĉiam antaŭenpuŝa parto
g der Arbeiterparteien aller Länder; sie haben
a of the working class parties of every country, that section
B el la laborklasaj partioj en ĉiu lando, tiu sekcio
P de la laboristaj partioj el ĉiuj landoj; ili superas
Bl de la laborista klaso de ĉiuj landoj; ilia
g theoretisch vor der übrigen Masse des Proletariats
a which pushes forward all¹ others; on the other hand,
theoretically, they have
B kiu puŝas antaŭen ĉiujn aliajn; aliflanke, teorie, pli ol la
P teorie la ceteran mason de proletaro per la kompreno
Bl avantaĝo rilate la alian amason de la proletaro estas, ke
g die Einsicht in die Bedingungen, den Gang und
a over the great mass of the proletariat the advantage² of
clearly.

1 en la reta versio: „an”. -vl

2 en la reta versio: „avantage”. -vl

Pri la Esperanta eldono de la „Komunista Manifesto”

- B granda masego de la proletario ili posedas tiun ĉi helpilon
—
P pri la kondiĉoj, la iro k la ĝeneralaj rezultoj
Bl ili disponas ekkonojn pri la kondiĉoj, la marŝlinio kaj
g die allgemeinen Resultate der proletarischen Bewegung
 voraus.
a understanding the line of march, the conditions, and the
 ultimate general results of the proletarian movement.
B ili klare komprenas la vojon de la marŝo, la kondiĉojn, kaj
 la finajn ĝeneralajn rezultatojn de la proletaria movado.
P de l’proleta movado.
Bl la ĝeneralaj rezultoj de la proleta movado.

Berlin (GDR), aprilo 1989

Detlev Blanke

Du tekstoj de T. Veder

T. Veder: Antaŭparolo al la esperanta eldono

Estas strange, vere, ke la „Komunista Manifesto” aperis en esperanto sen la fama antaŭparolo, kiun Engels skribis en 1888!¹ Mi tradukis la anglan tekston de tiu antaŭparolo por kompletigi la esperanto-eldonon de l’ „*Komunista Manifesto*”, tiu „*historia dokumento, kiun*”, kiel Marks kaj Engels skribis en 1872, k Engels ripetas en 1888, „*aliigi rajton ni ne plu havas*”.

La eldono de la antaŭparolo de 1888 elaperigas jenajn fokusojn; nome:

1. la preterpasantan signifon de l’ tiel nomitaj tujaj postuloj en la dua parto de l’ Manifesto, k la eldiron pri „*perforta renverso de ĉiuj ekzistantaj sociaj kondiĉoj*”, kiuj, ĉiu el ambaŭ, estas kompreneblaj nur sur la bazo de l’ tiamakredo de Marks kaj Engels pri proksimega revolucio;

2. la necesan forigon de l’ malnova ŝtatmaŝino;

3. la manieron, laŭ kiu la principoj enhavataj en la „Komunista Manifesto” estas aplikendaj.

Kaj tamen tiuj ĉi estas la punktoj, kies alprenado aŭ malak-

1 Tiu riproĉo koncernas la tiaman eldonon ĉe S.A.T. (Sennacieca Asocio Tutmonda). En la aktuale disponebla Esperanta versio de la „Manifesto de la Komunista Partio” ĝi tamen aperas, kiel ankaŭ ĉiuj aliaj antaŭ- kaj post-paroloj. Vd Karl Marks kaj Friedrich Engels: Manifesto de la Komunista Partio, Esperanta traduko kaj postparolo de Detlev Blanke, Progreso, Moskvo, 1990, ISBN 5-01-002341-5 kaj la ĉi-supran version de la Blanka traduko. -vl

T. Veder: Antaŭparolo al la esperanta eldono

cepto havas treege gravan influon al la sorto de l' proletaro en ĉiu lando, kiel fariĝas plene komprenebla el studado de la brila enkonduko al la „Komunista Manifesto“, verkita de Arnold Petersen, tutlanda sekretario de l' Socialista Laborista Partio de Usono. Estis la elstarigo de tiuj ĉi punktoj, kio instigis min traduki la antaŭparolon de Engels kune kun la enkonduko al noveldono de l' „Komunista Manifesto“ okaze de l' 50-a datreveno de la morto de Marks.

Tiu ĉi enkonduko ree nuntempigas la „Komunistan Manifeston“. Vere, tro longe diversaj laboristaj grupoj k misgvidantoj de l' laboristaro povis preni la nomon de Marks por mantelumi siajn fifarojn. Tie ĉi iliaj pretendoj estas disŝiritaj.

La tranĉilo de ĥirurgo devas tranĉi profunden por forigi infektaĵon. Arnold Petersen ne montris indulgon; social-demokrata reformismo kaj anarkokomunista pseŭdorevolucismo estas montritaj kiel mortigaj infektoj, pro kiuj la mondproletaro suferas k estas malrapidigita en sia antaŭeniro k senpotenca atingi sian venkon.

Tra la tuta mondo tiaj grupoj enloĝas la korpon de l' proletaro kiel teruraj furunkoj. Ĉe preciza ekzameno, oni trovas, ke ili havas grandan similon tra ĉiuj landoj. Kvankam la enkonduko sole traktas pri Usono, tamen kun iomete serioza pripenso ĉiu laboristo ekkomprenos la malsanojn de l' laborista movado en sia lando, precipe tiujn, pro kiuj suferas tiu nomanta sin revolucia. Ĉie elfluetas la puso kaj postulas plenan elpurigon.

Se tiu ĉi traduko instigas laboristajn esperantistojn mediti k diskuti pri tiu ĉi libreto, estas eble, atendi, ke tiuj ĉi kamaradoj kuraĝe alfrontu la problemon k provu liberigi siajn respektivajn movadojn de ĉia infekta fisubstanco. Certe, vekiĝos la deziro ekscii pli multe pri la starpunkto de la Socialista Laborista Partio de Usono; tial estas aldonita ankaŭ alia materialo, k krom tio la tradukinto anticipas k

Du tekstoj de T. Veder

esperas ricevi multajn informpetojn. Ili estos respondataj akurate. La referencoj faritaj en piednotoj aŭ aliloke, fingromontras al riĉa literaturo, per kies konsulto tuja informo estas kolektebla.

La Socialista Laborista Partio de Usono ne proponas prete faritan skemon, kiun la proletaro de ĉiu lando senkon-diĉe devus sekvi, sed ĝi opinias ĝuste k logike, ke industrie malprogresintaj landoj povas profiti el la sperto de landoj pli alte antaŭeniĝintaj.

Tio ĉi validas eĉ por Sovetio, – almenaŭ rilate al la „registaro de l' estonto“, – kie la Komunista Partio kiel la avangardo de l' proletaro establis sian regadon k vere agadas laŭ la kondiĉoj, kiujn la historio k ekonomia disvolviĝo komandas.

La lasta fakto estas tiel malmulte komprenata de la tiel nomataj komunistoj en Usono k ankaŭ en aliaj landoj, ke ili provas altrudi rusiajn metodojn al landoj troviĝantaj en tute malsimilaj stadioj de disvolviĝo. La Socialista Laborista Partio, laŭfakte, estas la sola organizo, kiu komprenas la heroajn batalojn de la rusaj bolŝevistoj k, ree male al multaj komunistaj grupoj, kiuj fibojas al aŭ pri rusiaj „eraroj k mankoj“, konsideras pravaj en ilia propra lando la agojn de la rusaj revoluciuloj en la antaŭenmarŝado al la socialismo.

Estas vere, ke la Komunista Internacio neniam rekonis la Socialistan Laboristan Partion de Usono k ĝi neniam estis k ankaŭ nun ne estas serĉanta tian rekonon sub kondiĉoj fremdaj al la interesoj de la revoluciaj movadoj de alte industriiĝintaj landoj. Ĝi komprenas, ke la bolŝevistoj havas sufiĉe da taskoj en sia lando k blindigite de siaj atingoj kredas sin kapablaj doni direkton al la movadoj en aliaj landoj, malgraŭ tio, ke ilia malalte-industria disvolviĝo (kompare kun Usono) ne permesas al ili „rigardi trans la monton“. Neniu povas, kiu troviĝas en valo. Sed la Socialista Laborista Partio de Usono, starante sur la supro de l'

T. Veder: Antaŭparolo al la esperanta eldono

monto, la pinto de usona industria disvolviĝo, povas fari ekzakte tion. Ĝi vidas la leviĝantan sunon en ĝia tuta brilego, la Socialistan Industriian Respublikon kun ĉiuj ĝiaj akompanaĵoj.

Kun firma certo pri la ĝusteco de sia pozicio, ne en fia rivaleco kun aliaj t.n. partioj de l' laboristaro, la Socialista Partio de Usono metas sian vidpunkton antaŭ la mond-proletaron per tiu ĉi Esperantigo de gravaj tekstoj. Ĝi esperas, ke la Esperantistoj obeos al sia promesplena devizo: „Utiĝu Esperanton en la servo de l' tutmonda proletaro”. Nur per plenumo de tiu ĉi promeso ili faros sian estimindan taskon: – fruktigi la socialistan pensadon tra la tuta mondo konscie k inteligente. Tiam, k nur tiam la Esperantistaj laboristoj estos farintaj sian parton por aŭskultigi k atentigi la laboristojn pri la fama alvoko, kiu ankoraŭ sonadas ĉirkaŭ la globo, nome,

LABORISTOJ TUTMONDAJ, UNUIĜU!

T. Veder.

Antaŭparolo al la „Komunista Manifesto” de Frederiko Engels

Traduko de T. Veder

La „Manifesto” estis publikigata kiel tezararo de la „Komunista Ligo”, laborista asocio, unue ekskluzive germana, pli malfrue internacia, k sub la politikaj kondiĉoj sur la kontinento antaŭ 1848, neeviteble sekreta societo. Ĉe kongreso de l’ Ligo, okazinta en Londono dum novembro 1847, Marks k Engels estis komisiataj prepari por publikigo kompletan teorian k praktikan partiprogramon. Germanlingve redaktita, en januaro 1848, la manuskripto estis sendata al la presisto en Londono kelkajn semajnojn antaŭ la franca revolucio de la 24-a de februaro. Franca traduko estis aperigata en Parizo, mallonge antaŭ la ribelo de junio 1848. La unua angla traduko, de fraŭlino Heleno Makfralane, aperis en la „Ruĝa Respublikano” de Georgo Julian Harne (Harney), Londono (1850). Dana k pola eldonoj ankaŭ estis publikigataj.

La malvenko de la Pariza juni-ribelo, en 1848 – la unua granda batalo inter proletaro k burĝaro – en la malfronton forpelis, por kelka tempo, la sociajn k politikajn aspirojn de la eŭropa laborista klaso. De tiam, la batalo pri superregado ree daŭris, kiel okazis antaŭ la februara revolucio, sole inter la diversaj frakcioj de l’ posedula klaso; la laborista klaso estis reduktata al batalo pri politika kubutspaco, k al la pozicio de l’ ekstrema alo de la mezklasaj radikaluloj. Kie ajn sendependaj proletaj movadoj daŭrigis montri signojn de vivo, ili estis senindulge forĉasataj. Tiel la prusa polico elspionis la Centran Komitaton de l’ Komunista Ligo, tiam lokita en Kolonjo. La membroj estis arestataj, k, post dekok-monata enkarcerigo, oni faris ilian proceson

Antaŭparolo al la „Komunista Manifesto” de Frederiko
EngelsTraduko de T. Veder

dum oktobro 1852. Tiu ĉi fama „Kolonja Komunist-proceso” daŭradis de la 4-a de oktobro ĝis la 12-a de novembro; sep el la malliberuloj estis kondamnataj al malliber-periodoj en fortikaĵo variantaj de tri ĝis ses jaroj. Tuj post la verdikto la Ligo estis formale disigata de la restantaj membroj. Rilate al la „Manifesto”, ĝi de tiam ŝajnis esti destinita al forgesiĝo.

Kiam la eŭropa laborista klaso regajnis sufiĉan forton por alia atako al la reganta klaso, ekestis la Internacia Laborista Asocio. Sed tiu ĉi asocio, formita kun la definitiva celo kunforĝi en unu korpon la tutan bataleman proletaron de Eŭropo k Ameriko, ne tuj povis proklami la principojn difinitajn en la „Manifesto”. La Internacio nepre devis havi programon sufiĉe larĝan por esti akceptebla al la anglaj profesi-unuiĝoj, al la Prudonanoj¹ en Francio, Belgio, Italio k Hispanio, k al la Lasalanoj² en Germanio. Marks, kiu ellaboris ĉi tiun programon ĝis la kontento de ĉiuj partioj, tute fidis al la intelekta disvolviĝo de l’ laborista klaso, kiu certe estus rezultonta el kombinitaj agado k komuna diskutado. La okazaĵoj k ŝancoŝanĝoj en la batalo kontraŭ Kapitalo, la malvenkoj eĉ pli ol la venkoj, ne povus ne komprenigi al la homa menso la nesufiĉon de iliaj diversaj favorataj fikuraciloj, k prepari la vojon al pli kompleta enrigardo en la verajn kondiĉojn al laboristklasa emancipado. Kaj prava estis Marks. La Internacio, ĉe sia disrompiĝo en

1 Anoj de Prudono (J. B. Proudhon). Vd Karlo Markso: La mizero de la filozofio. Respondo al Prudono: «Filozofio de la mizero»; kun antaŭparoloj de Frederiko Engelso kaj Henri Mougin; Pri J. P. Prudono, Letero al J. B. v. Schweitzer, tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, ISBN 978-2-918300-08-3, 197 paĝoj. -vl

2 Lasal mem, al ni, ĉiam konfesis esti disĉiplo de Markso, kaj, kiel tia, staris sur la grundo de l’ „Manifesto”. Sed en sia publika agitado, en 1862-1864, li postulis ne pli ol kooperativajn laborejojn subtenendajn per ŝtatkredito.

Antaŭparolo al la „Komunista Manifesto” de Frederiko
EngelsTraduko de T. Veder

1874, postlasis la laboristojn homoj sufiĉe malsimilaj al tiuj, kiaj ĝi trovis ilin en 1864. Prudonismo en Francio, Lasalisismo en Germanio, estis formortantaj, k eĉ la konservativaj anglaj profesiunuiĝoj, kvankam la plejmulto da ili jam de longe estis distranĉintaj sian konekson kun la Internacio, estis poiome antaŭeniĝantaj al tia punkto, ke lastan jaron en Svansea ilia prezidanto povis diri je ilia nomo: „La kontinenta socialismo perdis siajn terurigaĵojn por ni”. Laŭfakte, la principoj de la „Manifesto” konsiderinde progresis inter la laboristoj de ĉiuj landoj.

La Manifesto tiele revenis al la fronto. La germana teksto, depost 1850, estis represita kelkfoje en Svisio, Anglio k Usono. Dum 1872 ĝi estis tradukata anglen en Nov-Jorko, kie la traduko publikiĝis en la „Vudhul k Klaflin-a Semajnaĵo”. Laŭ tiu ĉi angla traduko, franca estis farata en la Nov-Jorka „Le Socialiste”. De tiam almenaŭ du pliaj anglaj tradukoj, pli, malpli kripligitaj, estis eldonataj en Usono, k unu el ili estis represata en Anglio. La unua ruslingva traduko, farita de Bakunin, estis publikigata ĉe la Herzen-a „Kolokol” – oficejo en Ĝenevo, ĉirkaŭ 1863; dua, de l' heroa Vera Zusuliĉ, ankaŭ en Ĝenevo (1882). Nova dana eldono estas trovebla en „Socialdemokratisk Bibliothek”, Kopenhago (1885); freŝdata franca traduko (1886), en la Pariza „Le Socialiste”. Laŭ tiu ĉi lasta hispana traduko estis preparata k publikigata en Madrido, en 1886. La germanaj represaĵoj ne estas nombreblaj; tie estis almenaŭ dekdu entute. Armena traduko, kiu estis publikigota en Konstantinopolo antaŭ kelkaj monatoj, ne vidis la lumon, oni diris al mi, ĉar la eldonisto timegis eldoni libron kun la nomo de Marks sur ĝi, k la tradukinto malakceptis nomi ĝin sia propra produkto. Pri pliaj tradukoj en aliajn lingvojn mi aŭdis, sed ne vidis ilin.¹ Tiel la historio de l' Manifesto

1 Pri la historio de la Esperantaj tradukoj de la *Manifesto*, vidu Detlef Blanke: „Pri la Esperanta eldono de la «Komunista Mani-

Antaŭparolo al la „Komunista Manifesto” de Frederiko
EngelsTraduko de T. Veder

reflektas, ĝis granda grado, la historion de l’ moderna laboristklasa movado; ĝi nun estas sendube la plej disvastigata, la plej internacia produkto el la tuta socialista literaturo, la komuna bazo rekonata de milionoj da laboristoj de Siberio ĝis Kalifornio.

Tamen, kiam ĝi estis verkata, ni ne povus nomi ĝin Socialista Manifesto. Sub socialistoj, dum 1847, estis komprenataj, unuflanke, la subtenantoj al diversaj sistemoj: Oŭen (Owen) idoj en Anglio, Furje (Fourier) anoj en Francio, ambaŭ jam reduktitaj al la pozicio de nuraj sektoj, k iom post iom formortantaj; aliflanke, la plej multspecaj sociaj ĉarlatanoj, kiuj ĉiel fuŝriparante pretendis rebonigi, sen ia danĝero al kapitalo k profito, ĉiajn sociajn malbonojn; en ambaŭ kazoj homoj ekster la laboristklasa movado k rigardantoj pro subteno prefere supren al la „edukitaj” klasoj. La sola parto el la laborulaj klasoj, kiu konvinkigis pri la nesufiĉo de nur politikaj revolucioj k estis proklaminta la neceson de socia ŝanĝo, tiu parto nomis sin komunista. Ĝi estis maldelikata, krudhakita, pure instinkta speco de komunismo; tamen ĝi tuŝis la esencan punkton k estis sufiĉe povoplena inter la laboristaro por naski la utopian komunismon, en Francio de Kabe (Cabet), k en Germanio de Vajtling (Weitling). Sekve do, socialismo estis, dum 1847, mezklasa movado, komunismo laboristklasa movado. Socialismo estis, almenaŭ sur la kontinento, „respektinda”; komunismo estis la tuta malo. Kaj ĉar nia ideo de l’ komenco vere estis, ke „la emancipado de l’ laborista klaso devas esti la ago de l’ laborista klaso mem”, ne povis esti dubo rilate al tio, kiun el ambaŭ nomoj ni prenu. Plue, ni de tiam forĵetis la ideon malkonfesi ĝin.

La „Manifesto” estante nia kuna produktaĵo, mi konside-

festo», en: Karl Marx kaj Friedrich Engels: Manifesto de la Komunista Partio, Esperanta traduko kaj postparolo de Detlev Blanke, eLibro, aranĝita de Frank Luin, INKO, p. 79-95.

Antaŭparolo al la „Komunista Manifesto” de Frederiko
EngelsTraduko de T. Veder

ras min devigata deklari, ke la fundamenta penso, kiu formas ĝian kernon, apartenas al Marks. Tiu penso estas: ke en ĉiu historia epoko, la reganta maniero de produktado k interŝanĝo k la socia organizado necese sekvanta el ĝi, formas la bazon, sur kiu konstruiĝas, k el kiu sola povas esti klarigata la politika k intelekta historio de tiu epoko; ke konsekvence la tuta historio de l' homaro (depost la dissolviĝo de l' primitiva tribo socio, tenanta teron en komuna posedo) estas historio pri klasbataloj, disputoj inter ekspluatantoj k ekspluatatoj, klasoj regantaj k subpremataj; ke la historio de tiuj ĉi klasbataloj formas evolu-serion en kiu, hodiaŭ stadio atingiĝis, kie la ekspluatata k subpremata klaso – la proletaro – ne povas atingi sian emancipiĝon el sub la regado de l' ekspluatanta k reganta klaso – la burĝaro – sen, samtempe, definitive por ĉiam, emancipi la socion plene el ekspluatado, subpremado, klasdistingoj k klasbataloj.

Al tiu ĉi penso, kiu, laŭ mia opinio, estas destinita fari por la historio, kion la Darvina teorio faris por la biologio, ni, ĉiu el ni ambaŭ, estis alproksimiĝintaj iom-post-iome dum kelkaj jaroj antaŭ 1845. Kiom proksime mi estis sendepende progresinta renkonte al ĝi, estas plej bone montrita per mia „La kondiĉaro (situacio) de l' laborista klaso en Anglio”. Sed kiam mi renkontis al Marks en Bruselo dum printempo 1845, li estis ĝisprete allaborinta ĝin, kaj ĝi estis metita antaŭ min, en formuloj preskaŭ tiel klaraj kiel tiuj, en kiuj mi ĝin eldiris ĉi tie.

En nia komuna antaŭparolo al la germana eldono de 1872, mi citas la jenon:

„Kiom ajn la stato de l' aferoj eble ŝanĝiĝis dum la lastaj dudekkvin jaroj, la ĝeneralaj principoj difinitaj en tiu ĉi manifesto estas, entute, tiel ĝustaj hodiaŭ kiel iam ajn. Jen tie, jen aliloke kelka detalo estus plibonigebla. La praktika aplikado de la principoj dependos, kiel la manifesto mem

Antaŭparolo al la „Komunista Manifesto” de Frederiko
EngelsTraduko de T. Veder

deklaras, ĉie k ĉiam, de la historiaj kondiĉoj dum la estanto ekzistantaj, tial ĉi tiu speciala emfazo ne estas atribuita al la revoluciaj rimedoj proponitaj ĉe la fino de II-a parto (paĝo 33, 2-a SAT-eldono, Trad.). Tiu paragrafo estus, multrilate, tre malsimile vortigenda hodiaŭ. Konsiderante la gigantajn paŝegojn de l' moderna industrio depost 1848, k la akompane plibonigitan k etenditan organiziĝon de l' laborista klaso; rigardante la praktikajn spertojn gajnitajn, unue en la februar-revolucio, k tiam, eĉ pli, en la Pariza Komunumo, kie la proletaro por la unua fojo tenadis la politikan potencon dum plenaj du monatoj, tiu ĉi programo laŭ kelkaj detaloj antikviĝis. Unu afero precipe estas pruvita de la Komuno, nome, ke „la laborista klaso ne povas simple ekpreni la prete faritan ŝtatmaŝinon, k manipuli ĝin por siaj propraj celoj”. (Vidu „La Intercivitana Milito en Francio; parolo al la Ĝenerala Konsilantaro de l' Internacia Laborista Asocio”, Londono, Truelove, 1871, paĝo 15, kie tiu ĉi punkto estas plie ellaborita.)¹ Plie, estas memevidente, ke la kritiko pri la socialista literaturo estas mankhava rilate al la nuntempo, ĉar ĝi sekvas nur ĝis 1847; krom tio, ke la rimarkoj pri la rilatoj de l' komunistoj al la diversaj opoziciaj partioj (parto VI en la dua SAT-eldono, lastaj paĝoj. Trad.)², kvankam ankoraŭ ĝustaj laŭ principo, tamen laŭ praktiko antikviĝis, ĉar la politika situacio entute ŝanĝiĝis, k la antaŭeniĝo de l' historio forbalais de sur tero la pli grandan parton da politikaj partioj tie cititaj.

„Sed, do, la Manifesto fariĝis historia dokumento, kiun aliĝi ni rajton ne plu havas.”

- 1 En Esperanto: Karlo Markso: La interna milito en Francio (1871) (La Pariza Komunumo), kun enkonduko de Frederiko Engelso, tradukis Vilhelmo Lutermano, Mondial, Novjorko, 2005, ISBN 1-59569-025-5, 137 paĝoj, ĉi tie p. 14. -vl
- 2 Karl Marks kaj Friedrich Engels: Manifesto de la Komunista Partio, v. c., ĉapitro IV „Rilato de la komunistoj al la diversaj opoziciaj partioj”, p. 76; ĉi tie p. 82. -vl

Antaŭparolo al la „Komunista Manifesto” de Frederiko
EngelsTraduko de T. Veder

La nuna traduko estas de s-ro Samuel Mur (Moore), la tradukinto de l' pli granda parto el „La Kapitalo” de Marks. Ni reviziis ĝin k mi aldonis kelkajn klarigajn notojn pri historiaj aludoj.

Frederiko Engels

Londono, la 30-an de januaro 1888.¹

[Tiu ĉi traduko, farita de T. Veder, estas prenita el la libro Arnold Petersen: Komentoj al la „Komunista Manifesto”, tradukis el la angla kaj kompilis T. Veder, Monda Asembleo Socia (MAS), 2010, ISBN 978-2-918300-19-9, p. 31-36. -vl]

1 Tiu ĉi antaŭparolo de Frederiko Engelso, en la traduko de Detlev Blanke: saml., p. 12 – 18; ĉi tie p. 21-27. -vl

La Komunista Manifesto, traduko de Emil Pfeffer

**KARLO MARKS
KAJ
FREDERIKO ENGELS**

**LA
KOMUNISTA
MANIFESTO**

**SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
PARIS**

3-a eldono

[s.j. [1936]; korektita represo de la 1-a eldono, SAT, de
1923; Tradukis el la germana originalo
Emil Pfeffer]

ANTAŬPAROLO

La Komunista Manifesto estas unu el la tutunuaj dokumentoj de la scienca socialismo, ĝenerale nomata « marksismo ». Ĝi estas verkita en la fino de 1847 k publikigita komence de 1848; tio signifas, ke ni baldaŭ povos soleni ĝian 90-jaran datrevenon.

Ĝi estiĝis dum la krizo, kiu eksplodis en 1847 k kies sekvoj estis la eŭropaj revolucioj de 1848.

En ĝi Karlo Marks k Frederiko Engels unuafoje resumas koncize la ĉefajn ideojn de sia teorio, kiu estas sintezo de la materialisma filozofio franca, de la « klasika » ekonomio angla, de la tiel nomata « utopia socialismo » franc-angla, de la dialektika metodo de la germana filozofo Hegel k de la grandiozaj spertoj de la franca revolucio de 1789.

Jam antaŭ la aŭtoroj de la Komunista Manifesto, filozofoj k sociologoj estis akre kritikintaj la kapitalisman sociordon k proponintaj rimedojn kontraŭ ties abomenaĵoj. Ili estis ellaborintaj ĝisdetale projektojn por starigo de nova, pli justa k pli frateca socisistemo. Aliflanke la moderna laborista klaso, terure premata k ekspluatata, apenaŭ instruita, same malaltgrade disvolvita kiel la tiama kapitalismo, batalis senperspektive per spasmaj ribeloj kontraŭ siaj profitsoifaj mastroj.

La granda historia merito de Marks k Engels estas la kunfando de tiuj du elementoj : socialismo k laboristaro. Laŭ la aŭtoroj de la **Komunista Manifesto**, la socialismo povas fariĝi realaĵo nur per la klasbatalo de la proletaro; k tiu ĉi povas sin liberigi definitive el ekspluatado k subpremo nur per starigo de socialismo.

Male al siaj utopiemaj antaŭuloj, Marks k Engels ne

opiniis, ke tiu socialisma sociordo povos laŭdezire k tuj anstataŭi la kapitalisman ordon. Ili pensis, ke ĝi rezultos el la evoluo de la kapitalisma sistemo, kiu kreos pli k pli kolektivajn ekonomi-formojn, sed samtempe koncentrigos k klerigos la proletaron k ĝin puŝos per senĉese akrigata ekspluatado al pli k pli aktiva klasbatalo.

Tiel venos la momento, kiam la laborularo faros la socialisman revolucion k starigos la „diktaturon de l’proletaro”¹. Sed la proletaro estante klaso, ne persono, ĝia diktaturo (tio signifas : la apliko de ĝia **kolektiva volo** kontraŭ la burĝaro) povas realiĝi **nur per demokratio**, en plena libero de ideoj k de diskutado. Jen pro kio Marks k Engels skribas en la **Komunista Manifesto**:

« La unua paŝo en la laborista revolucio estas la leviĝo de l’proletaro al reganta klaso, **la elbatalo de l’demokratio**. »

Se forestas tiu demokratio, se la laboruloj ne havas la rajton libere esprimi siajn ideojn k ilin kolektive ellabori, la proletaro ne povas esti reganta klaso. Nur iluziuloj povas maldistingi la diktatorecon de unu individuo k la diktaturon de klaso. Tiuj, kiuj pravigas personan tiranecon, ne rajtas sin nomi « marksistoj »; la supre citita teksto de la **Komunista Manifesto** ĝin pravas.

* * *

1 Tiu esprimo ne troviĝas en la Komunista Manifesto. Marks ĝin uzis en sia **Kritiko de la programo de Gotha** (1875) k Engels ĝin ripetis en sia antaŭparolo de 1891 al la Marks’a verko **La Intercivitana milito en Francio**. –

Ambaŭ verkoj disponeblas en Esperanto. **Karlo Markso: Kritiko de la Gotaa Programo**, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso, trad. de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, 44 p., ISBN 978-2-918300-21-2; **Karlo Markso: La interna milito de Francio** (1871, La Pariza Komunumo), kun enkonduko de Frederiko Engelso, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Mondial, Novjorko, 2005, 137 p., ISBN 1-59569-025-5. -vl

ANTAŬPAROLO

Ne estas ĉi tie la loko por detale ekzameni ĉu ĉiuj antaŭdiroj de la aŭtoroj de l'**Komunista Manifesto** realiĝis depost ĝia unua publikigo.

La kapitalisma ekonomio evoluis tiel kiel Marks k Engels ĝin antaŭmontris. Ĝiaj kontraŭecoj disvolviĝis k periode eksplodis per krizoj. La nuntempa krizo, kiu nun daŭras preskaŭ sep jarojn (ĝi komenciĝis en somero 1929), pruvas la profundon de la malsano de la kapitalisma sistemo. Dekoj da milionoj da senlaboruloj estas en la mondo k eĉ burĝaj ekonomiistoj asertas, ke la senlaboreco fariĝas daŭra. La faktoj pravigas hodiaŭ jenan konstaton de la **Komunista Manifesto**:

« La burĝaro... estas nekapabla regi, ĉar ĝi estas nekapabla certigi al sia sklavo la ekziston eĉ interne de lia sklaveco, ĉar ĝi estas devigata lasi lin malleviĝi en situacion, en kiu ĝi devas lin nutri anstataŭ esti de li nutrata. »

Sed rilate al aliaj punktoj, la antaŭdiroj de Marks k Engels ne ankoraŭ realiĝis. La spirita maturo de la proletaj amasoj evoluis malpli rapide ol la materia maturiĝo de la kapitalista sistemo. En kelkaj landoj, kie triumfis faŝista amasmovado, oni vidis sufiĉe fortan parton de la laborularo aliĝi al la naciistaĉa k burĝarserva fiideologio de la faŝismo. Sed necesas diri ankaŭ, ke relative malmulte da proletoj jam organizitaj en laboristaj klaspartioj k sindikatoj perdis sian klaskonscion k faŝistiĝis. La plejmulto de la proletoj faŝistiĝintaj estis elementoj socie needukitaj, ĵus elirintaj el politika indiferento; el ili la mizero estis farinta blindajn ribelulojn, **sed ne ankoraŭ konsciajn revoluciulojn**. Mankis al ili la sperto de sociaj vivo k batalado, kiun ili nun devas akiri tra teruraj inferoj k turmentoj, ĝis definitiva seniluziiĝo.

Ĉu tiuj faktoj malpravigas la aŭtorojn de la **Komunista Manifesto**? Ni povus jesi tiun demandon se Marks k Engels jam estus pensintaj, ke la evoluo de l'kapitalismo al la

La Komunista Manifesto, traduko de Emil Pfeffer

socialismo efektiviĝos rektlinie, senhalte, sencede, sen vojkurbiĝo. Sed tia ne estis ilia penso ! En la jaro 1850, post la malvenko de la revolucio de 1847, en dokumento redaktita en la nomo de la Londona komunista centro, Marks skribis:

« Ni diras al la laboristoj : Vi devos pasi dum 15, 20, 50 jaroj tra intercivitanaj militoj k interpopolaj bataloj, ne nur por ŝanĝi la cirkonstancojn, sed **por ŝanĝi vin mem k por iĝi kapablaj je politika regado.** »

Ne nur la kapitalismo evoluis de post 90 jaroj. Ankaŭ la marksismo disvolviĝis k pliriĉiĝis, batalante kontraŭ siaj malamikoj, klopodante solvi ĉiam novajn problemojn. Karlo Kaŭcki, Roza Luksemburg, Rodolfo Hilferding, Karlo Renner, Emilo Vandervelde, Lenin, Georgo Lukaĉ k multaj aliaj alportis novajn ŝtonojn al la giganta konstruo. Al novaj problemoj necesis novaj solvoj.

En la kampo de la marksanoj oni ofte observas strangan bataladon, kvazaŭan vetkuron al ortodokso. Ofte okazas, kiam diskutas marksistoj, ke ĉiu el ili sin opinias la « sole ortodoksa ». Tia sinteno ne indas verajn marksistojn, t. e. libere pensantajn homojn.

La fundamento de la marka teorio estas la **dialektika metodo**, laŭ kiu la mondo k la ideoj estas en senĉesa evoluo, k tiu evoluo efektiviĝas per renkontpuŝo de kontraŭoj. Kiel skribis Marks en la antaŭparolo al la 2-a eldono de la **Kapitalo** (1873)¹, la dialektika metodo « kunigas al la pozitiva kompreno pri tio, kio ekzistas, la komprenon de ĝia negacio, de ĝia necesa pereco..., sin lasas imponi de nenio k estas esence kritika k revolucia ».

1 Karlo Markso: La kapitalo, Kritiko de la politika ekonomio, Unua volumo, Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, Ĉapitroj unua ĝis naŭa, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, ISBN 978-2-918300-13-7.
-vl

ANTAŬPAROLO

Sur tiu fundamento la sole ebla ortodokso estas... herezo. Senĉesa komparo de la marksaj tezoj al la nuntempa realo, senĉesa kritiko de la rezultoj de la Marksaj studoj per la Marksa metodo, ĉiama kontraŭstaro al ortodokso laŭ-eklezia – jen la ĉefa devo de veraj marksanoj. Tute ne hazarde la preferita devizo de Karlo Marks estis : « **Dubu pri ĉio !** ».

Ni lasu al ekleziemaj animoj la disimilan adoradon al la verkaro de Marks k Engels. Tiuj, kiuj volas resti vere fidelaj al la spirito, ne al la literoj, de tiu verkaro, ĝin legu k studu atente k kritike, neniam forgesante, ke la liberigo de la proletaro povos realiĝi nek per kateĥismo, nek dank'al papoj k pastroj, sed sole per la konscia, inteligenta, post-pripensa **aktiveco propra** de la laborularo.

Parizo, februaro 1936.

L. LORA.

LUCIEN LORA (Laurat), kiu verkis la antaŭparolon al nia 3-a eldono de la « Komunista Manifesto », estas unu el la plej konataj fakuloj pri marksisma teorio. Li naskiĝis la 27 dec. 1898 en Vieno, instruiĝis, verkis k lekciis pri ekonomi-politikaj temoj laŭ marksa koncepto ekde 1917, kunlaboris al la SAT-organoj (sub nomo L. Revo) k partoprenis i. a. la fondkongreson de SAT en Prago (1921).

Aliĝinte al la komunista movado, li lekciis dum pluraj jaroj ĉe la Komunista Universitato de orientaj laboruloj en Moskvo pri politika ekonomio. Ekde 1924 li kontraŭstaris la postleninan bolŝevismon. Reveninte al okcidenta Eŭropo (unue Bruselo, poste Parizo), li fine aliĝis la francian socialistan partion (S. F. I. O.) k instruadas depost 1932 ĉe la Supera Klerig-Instituto Laborista de l'Sindikat-Unuiĝo en Parizo, kunlaborante ankaŭ al pluraj revuoj. Li verkis plurajn ekonomik k socisciencajn librojn, kies plej menciindaj estas : « La soveta ekonomio », « La akumuliĝo de l'kapitalo laŭ

La Komunista Manifesto, traduko de Emil Pfeffer

Roza Luksemburg », « Cent jaroj da mondekonomio », « Direktata ekonomio k socialigo », « La mondkrizo », « La teoria evoluo de l'socialismo ».

La komunista manifesto

Fantomo ĉirkaŭvagas en Eŭropo – la fantomo de l'komunismo. Ĉiuj potencoj de l'malnova Eŭropo kuniĝis por sankta pelĉaso kontraŭ tiun fantomon, la papo k la caro, Metternich k Guizo, francaj radikaluloj k germanaj policistoj.

Kie estas la opozicia partio, kiu de siaj regantaj kontraŭuloj ne estus prikriita kiel komunista, kie la opozicia partio, kiu al la pli progresaj opoziciuloj same kiel al siaj reakciaj kontraŭuloj ne estus reĵetinta la brulsignantan riproĉon de l'komunismo?

Duoblo sekvas el tiu ĉi fakto.

La komunismo estas jam de ĉiuj Eŭropaj potencoj agnoskata kiel potenco.

Urĝas, ke la komunistoj siajn opiniojn, celojn, tendencojn antaŭ la tuta mondo malkaŝe prezentu k al la fabelo pri la fantomo de l'komunismo kontraŭmetu manifeston de la partio mem.

Por tiu celo komunistoj de plej diversaj nacioj kunvenis en Londono k verkis la sekvantan manifeston, kiu en angla, franca, germana, itala, flandra k dana lingvoj estas publikigata.

I. Burĝo k proleto

La historio de ĉia ĝisnuna socio¹ estas la historio de klasbataloj.

Liberulo k sklavo, patricio k plebano, barono k servutulo, korporacia majstro k helpisto, unuvorte, subpremanto k subpremato staris en konstanta antagonismoal si reciproke, kondukis seninterrompan, jen kaŝan, jen malkaŝan batalon, batalon, kiu finiĝis ĉiufaje per revolucia transformo de l'tuta socio aŭ per la komuna pereco de l'batalantaj klasoj.

En la pli fruaj epokoj de l'historio ni trovas kompletan dismembriĝon de l'socio en diversajn statojn, diversspecan gradiĝon de l'sociaj pozicioj. En la antikva Romo ni havas patriciojn, kavalirojn, plebanojn; en la mezepoko feŭdajn sinjorojn, vasalojn, korporaciajn majstrojn, helpistojn, servutulojn k ankoraŭ al tio en preskaŭ ĉiu el tiuj ĉi denove specialajn gradiĝojn.

La moderna burĝa socio, elirinta el la pereco de l'socio feŭda, ne forigis la klasajn antagonismojn. Ĝi metis nur novajn klasojnnn, novajn kondiĉojn de l'subpremo, novajn formojn de l'batalo sur la lokon de l'malnovaj.

1 Tio signifas, precize parolante, la **skribe** transdonita historio. 1847 estis la antaŭhistorio de l'socio, la socia organizo, kiu antaŭiris ĉian skribitan historion, preskaŭ tute nekonata. De tiam malkovris Haksthaŭzen la komunan proprajon je la grundo en Rusio. Maŭrer ĝin pruvis kiel la socian fundamenton, de kie ĉiuj germanaj gentoj historie devenis, k iom post iom oni trovis, ke vilaĝaj komunumoj, kun komuna grundposedado estis la praformo de l'socio de Hindio ĝis Irlando. Fine la interna organizo de tiu origina komunista socio en sia tipa formo estis senvaligita per la kronanta malkovro de Morgan pri la vera naturo de l'gento k ĝia pozicio en la tribo. Kun la dissolviĝo de tiuj prasocioj komenciĝas la disfalo de l'socio en specialajn k fine reciproke kontraŭmetitajn klasojn.

La komunista manifesto

Nia epoko, la epoko de l'burĝaro, distingiĝas tamen per tio, ke ĝi la klasajn antagonismojn simpligis. La tuta socio disfendiĝas pli k pli en du grandajn malamikajn tendarojn, en du grandajn, reciproke rekte kontraŭe starantajn klasojn: burĝaro k proletaro.

El la servutuloj de l'mezepoko eliris la palisburĝoj¹ de l'unuaj urboj; el tiu ĉi palisburĝaro disvolviĝis la unuaj elementoj de l'burĝaro.

La ektrovo de Ameriko, la ĉirkaŭnavigado de Afriko kreis al la formiĝanta burĝaro novan terenon. La orienthinda k ĉina merkato, la koloniigo de Ameriko, la interŝanĝo kun la kolonioj, la plimultiĝo de la interŝanĝrimedoj k de l'komercaĵoj entute donis al la komerco, la navigado, la industrio neniam antaŭe konitan impulson k per tio al la revolucia elemento en la disfalanta feŭda socio rapidan disvolvon.

La ĝisnuna feŭda aŭ korporacia mastrumado de la industrio ne sufiĉis plu por la kun novaj merkatoj kreskanta bezono. La manufakturo enpaŝis sur ĝian lokon. La korporaciaj majstroj estis forpuŝitaj de la industria meza stato; la divido de l'laboro inter la diversaj korporacioj malaperis antaŭ la divido de l'laboro en ĉiu aparta laborejo mem.

Tamen ĉiam pli kreskis la merkatoj, ĉiam pli gradiĝis la bezono. Ankaŭ la manufakturo ne sufiĉis plu. Tiam revoluciigis la vaporo k la maŝinaro la industrian produktadon. Sur la lokon de l'manufakturo enpaŝis la moderna granda industrio, sur la lokon de l'industria meza stato la industriaj milionuloj, la ĉefoj de tutaj industriaj armeoj, la modernaj burĝoj.

La granda industrio kreis la mondmerkaton, kiun la

1 En la feŭda epoko la regantoj, fondante apud sia kastelo (burgo) urbon, donadis al la kampuloj, kiuj ekloĝis ĉe la burĝa palisaro la burĝan rajton t. e. liberon de l'servuto. Tiel estiĝis la palisburĝoj. (Rim. de l'Trad.)

ektrovo de Ameriko preparis. La mondmerkato donis al la komerco, la navigado, la landkomunikadoj nemezureblan disvolvon. Tiu ĉi denove reagis sur la disvastiĝon de la industrio, k en la sama mezuro, en kiu industrio, komerco, navigado, fervojoj disvastiĝis, en la sama mezuro disvolviĝis la burĝaro, ĝi plimultigis siajn kapitalojn, ĝi forpuŝis ĉiujn de la mezepoko transdonitajn klasojn en la malantaŭon.

Ni vidas sekve, kiel la moderna burĝaro mem estas la produkto de longa evoluado, de vico da renversoj en la produktado kaj komunikado.

Ĉiu el tiuj ĉi evoluaj ŝtupoj de l'burĝaro estis akompanata de konforma politika progreso. Subpremata stato sub la regado de l'feŭdaj sinjoroj, armita k sin mem administranta asocio en la komuno¹, tie ĉi sendependa urba respubliko, tie tria impostita stato de l'monarkio, poste en la tempo de l'manufakturo kontraŭpezo kontraŭ la nobelaro en la stata aŭ en la absoluta monarkio, ĉefa fundamento de l'grandaj monarkioj entute, ĝi elbatalis al si fine depost la kreo de l'granda industrio k de l'mondmerkato en la moderna reprezenta ŝtato la ekskluzivan politikan regadon. La moderna registaro estas nur komitato, administranta la komunajn negocojn de l'tuta burĝa klaso.

La burĝaro ludis en la historio rolon ekstreme revolucian.

La burĝaro, kie ĝi venis al la regado, detruis ĉiujn feŭdajn, patriarkajn, idiliajn rilatojn. Senkompate ĝi disŝiris la diverskolorajn feŭdligaĵojn, kiuj ligis la homon kun lia natura superulo, k lasis neniun alian ligaĵon inter homo k homo krom la nuda intereso, krom la sensenta « kontanta pago ». Ĝi dronigis la sanktajn ekstazojn de l'pia revemo, de l'kavalira romantikeco, de l'provincurbana melankolio en

1 Tiel nomis la urbcivitanoj de Italio k Francio sian urban komunumon, post kiam ili la unuajn aŭtonomajn rajtojn de siaj feŭdaj sinjoroj elaĉetis aŭ eldevigis.

La komunista manifesto

la glacie malvarma akvo de la egoista prikalkulo. Ĝi transformis la personan dignon en interŝanĝvaloron k metis sur la lokon de sennombraj garantiitaj k leĝe akiritaj liberoj la solan senkonsciencan komercliberon. Ĝi metis, per unu vorto, sur la lokon de per religiaj aŭ politikaj iluzioj vualita ekspluatado la ekspluatadon malkaŝan, senhontan, rektan, sekan.

La burĝaro senigis ĉiujn ĝis nun honorindajn k kun pia timo rigardatajn agadojn de ilia aŭreolo. Ĝi transformis la kuraciston, la juriston, la pastron, la poeton, la scienculon en siajn pagatajn dunglaboristojn.

La burĝaro ŝiris el la familia rilato ĝian kortuŝe-sentimentalan vualon k reduktis ĝin al pura monrilato.

La burĝaro montris, kiel la brutala fortekspansio, kiun la reakcio tiel tre admiras ĉe la mezepoko, en la plej inerta mallaboremo trovis sian konforman kompletigon. Unue ĝi pruvis, kion la agado de l'homoj povas plenumi. Ĝi kreis tute aliajn mirindaĵojn ol egiptajn piramidojn, romajn akvokondukojn k gotikajn katedralojn, ĝi efektivigis tute aliajn ekspediciojn ol migradojn de l'popoloj k krucmilitirojn.

La burĝaro ne povas ekzisti, ne revoluciigante konstante la produktajn instrumentojn, sekve la produktajn rilatojn, sekve la sociajn rilatojn entute. Senŝanĝa konservado de la malnova maniero de l'produktado estis kontraŭe la unua kondiĉo de la ekzisto de ĉiuj pli fruaj industriaj klasoj. La konstanta renversado de l'produktado, la seninterrompa ekskuado de ĉiuj sociaj rilatoj, la eterna necerto k movado distingas la burĝan epokon antaŭ ĉiuj aliaj. Ĉiuj firmaj, rustiĝintaj rilatoj kun sia sekvantaro da tradicie ŝatataj ideoj k opinioj estas dissolvataj, ĉiuj noveformitaj malnoviĝas, antaŭ ol ili povas estiĝi. Ĉio stata k staranta forvapor-iĝas, ĉio sankta estas profanata, k la homoj estas fine devigitaj rigardi sian vivpozicion, siajn reciprokajn rilatojn

per sobraj okuloj.

La bezono de ĉiam pli vasta debito por siaj produktoj pelas la burĝaron ĉirkaŭ la tutan terglobon. Ĉie ĝi devas ennestiĝi, ĉie loksidiĝi, ĉie krei interligojn.

Per sia ekspluatado de l'mondmerkato formis la burĝaro la produktadon k konsumadon de ĉiuj landoj kosmopolite. Je granda bedaŭro de l'reakciuloj ĝi fortiris al la industrio la nacian grundon sub la piedoj. La pramalnovaj naciaj industrioj estis detruitaj k estas ankoraŭ ĉiutage detruataj. Ili estas forpuŝataj de novaj industrioj, kies enkonduko fariĝas demando de l'vivo por ĉiuj civilizitaj nacioj, de industrioj, kiuj ne plu enlandajn krudaĵojn, sed krudaĵojn apartenantajn al la plej malproksimaj terzonoj translaboras k kies fabrikaĵoj ne nur en la lando mem, sed en ĉiuj mondpartoj samtempe estas konsumataj. Sur la lokon de malnovaj, per enlandaj produktoj kontentigitaj bezonoj enpaŝas novaj, kiuj la produktojn de plej malproksimaj landoj k klimatoj por sia kontentigo postulas. Sur la lokon de malnova loka aŭ nacia memsufiĉo k defermiteco enpaŝas universala komunikado, ĉiufanka dependeco inter la nacioj. Kaj kiel en la materiala, tiel ankaŭ en la spirita produktado. La spiritaj produktoj de la apartaj nacioj fariĝas komuna propraĵo. La nacia unuflankeco k limigiteco fariĝas pli k pli neebila, k el la multaj naciaj k lokaj literaturoj formiĝas mondliteraturo.

La burĝaro entiras per la rapida plibonigo de ĉiuj produktaj instrumentoj, per la senfine plifaciligitaj komunikadoj ĉiujn, ankaŭ la plej barbarajn naciojn en la civilizacion. La malkaraj prezoj de ĝiaj komercaĵoj estas la peza artillerio, per kiu ĝi ĉinajn murojn disfrakasas, per kiu ĝi la plej obstinan fremdulumalamon de la barbaroj devigas kapitulaci. Ĝi devigas ĉiujn naciojn alproprigi al si la produktan manieron de l'burĝaro, se ili ne volas pereii; ĝi devigas ilin la tienomatan civilizon ĉe si mem enkonduki, tio signifas fariĝi

La komunista manifesto

burĝaj. Per unu vorto, ĝi kreas al si mondon laŭ sia propra bildo.

La burĝaro submetis la kamparon sub la regadon de la urbo. Ĝi kreis grandegajn urbojn, ĝi pligrandigis en alta grado la nombron de la urba loĝantaro rilate al la kampara k elŝiris tiel signifan parton da loĝantaro el la idiotismo de l'kampara vivo. Kiel ĝi la kamparon dependigis de la urbo, tiel dependigis ĝi la barbarajn k duonbarbarajn landojn de la civilizitaj, la kampulpopolojn de la burĝpopoloj, la orienton de la okcidento.

La burĝaro forigas pli k pli la displitiĝon de l'produktaj rimedoj, de l'posedo k de l'loĝantaro. Ĝi aglomeris la loĝantaron, centralizis la produkciajn rimedojn k koncentris la proprajn en malmultaj manoj. Sendependaj, preskaŭ nur federitaj provincoj kun malsamaj interesoj, leĝoj, registaroj k limimpostoj estis kunpremitaj je Unu Nacio, Unu Registaro, Unu Leĝo, Unu nacia Klasintereso, Unu Doganlinio.

La burĝaro kreis dum sia apenaŭ centjara klasregado pli da amasaj k kolosaj produktaj fortoj, ol ĉiuj pasintaj generacioj kune. Subjugigo de l'fortoj de l'natur, maŝinaro, aplikado de l'hemio al industrio k agrikulturo, vapornavigado, fervojoj, elektraj telegrafoj, kulturigo de tutaj mondpartoj, navigebligo de riveroj, tutaj kvazaŭ el la tero elsorĉitaj loĝantaroj – kiu pli frua jarcento antaŭsentis, ke tiaj produktaj fortoj dormetis en la sino de l'natur.

Ni vidis sekve: La produktaj k interkomunikaj rimedoj, sur kies bazoj la burĝaro evoluis, estis kreitaj en la feŭda socio. Sur la ŝtupo¹ de l'evoluo de tiuj produktaj k interkomunikaj rimedoj ne respondis plu la rilatoj, en kiuj la feŭda socio produktis k interŝanĝis, la feŭda organizo de l'agrikulturo k manufakturo, per unu vorto la feŭdaj proprajrilatoj al la jam evoluintaj produktaj fortoj. Ili baris la produkton, anstataŭ ĝin akceli. Ili transformiĝis en same

1 en la originalo: „... stupo ...”. -vl

multe da katenoj. Ili devis esti krevigitaj, ili estis krevigitaj.

Sur ĝian lokon enpaŝis la libera konkurenco kun la al ĝi konforma socia k politika konstitucio, kun la ekonomia k politika regado de l'burĝa klaso.

Sub niaj okuloj okazas simila movado. La burĝaj produktaj k interkomunikaj rilatoj, la burĝaj proprajrilatoj, la moderna burĝa socio, kiu tiel potencajn produktajn k interkomunikajn rimedojn elsorĉis, similas la sorĉiston, nekapablan plu superregi la subterajn potencojn, kiujn li ĵur-alvokis. De jardekoj estas la historio de la industrio k de l'komerco nur la historio de la ribelo de l'modernaj produktaj fortoj kontraŭ la modernaj produktaj rilatoj, kontraŭ la proprajrilatoj, kiuj estas la vivkondiĉoj de l'burĝaro k de ĝia regado. Sufiĉas citi la komercajn krizojn, kiuj en sia perioda reveno ĉiam pli minace la ekziston de l'tuta burĝa socio faras problema. En la komercaj krizoj estas granda parto ne nur da fabrikitaj produktoj, sed da jam kreitaj produktaj fortoj regule detruata. En la krizoj eksplodas socia epidemio, kiu al ĉiuj pli fruaj epokoj aperus kiel absurdo – la epidemio de l'superproduktado. La socio trovas sin subite remetita en staton de momenta barbareco; ŝajnas, ke malsatmizero, ke ĝenerala detrua milito detranĉis al ĝi ĉiujn vivrimedojn; la industrio, la komerco ŝajnas detruitaj, k kial ? Ĉar ĝi posedas tro multe da industrio, tro multe da komerco. La produktaj fortoj, kiuj staras al ĝia dispono, ne servas plu por akceli la burĝajn proprajrilatojn; kontraŭe, ili fariĝis tro potencaj por tiuj rilatoj, ili estas barataj de ili; k tuj kiam ili tiun baron supervenkas, ili metas la tutan burĝan socion en malordon, ili endanĝerigas la ekziston de l'burĝa propraĵo. La burĝaj rilatoj fariĝis tro malvastaj, por ampleksi la de si kreitan riĉaĵon. – Per kio supervenkas la burĝaro la krizojn ? Unuflanke per la eldevigita detruo de amaso da produktaj fortoj; aliflanke per konkero de novaj merkatoj k pli radikala ekspluatado de la malnovaj merkatoj. Sekve per kio ? Per tio, ke ĝi

La komunista manifesto

preparas pli universalajn k pli potencajn krizojn k malgrandigas la rimedojn, por la krizojn antaŭforigi.

La armiloj, per kiuj la burĝaro teren faligis la feŭdismon, direktiĝas nun kontraŭ la burĝaron mem.

Sed la burĝaro ne nur forĝis la armilojn, kiuj portas al ĝi la morton; ĝi kreis ankaŭ la virojn, kiuj tiujn armilojn aplikos – la modernajn laboristojn, la proletojn.

En la sama mezuro, en kiu la burĝaro, t. e. la kapitalo, disvolviĝas, en la sama mezuro disvolviĝas la proletaro, la klaso de l'modernaj laboristoj, kiuj nur tiel longe vivas, kiel longe ili trovas laboron, k kiuj nur tiel longe trovas laboron, kiel longe ilia laboro prigrandigas la kapitalon. Tiuj ĉi laboristoj, kiuj devas sin vendi po peco, estas komercaĵo, kiel ĉiu alia komerca artiklo k tial egale elmetitaj al ĉiuj ŝanĝoj de l'konkurenco, al ĉiuj ŝanceliĝoj de l'merkato.

La laboro de l'proletoj perdis pro la disvastiĝo de l'maŝinaro k la divido de l'laboro ĉian memstaran karakteron k per tio ĉion ĉarmon por la laboristoj. Li fariĝas simpla maŝin-apartenajo, de kiu nur la plej simpla, plej unutona, plej facile ellernebla man-uzo estas postulata. La kostoj, kiujn kaŭzas la laboristo, limiĝas tial preskaŭ nur al la vivrimedoj, kiujn li por sia subteno k por la pluplantado de sia raso bezonas. La prezo de komercaĵo, sekve ankaŭ de l'laboro, estas tamen egala al la kostoj de ĝia produktado. En la sama mezuro, en kiu la malagrablo de l'laboro kreskas, malgrandiĝas tial la salajro. Ankoraŭ pli : en la sama mezuro, kiel maŝinaro k divido de l'laboro pligrandiĝas, en la sama mezuro pligrandiĝas ankaŭ la maso da laboro, ĉu per plimultiĝo de l'laborhoroj, ĉu per plimultiĝo de l'dumdonita tempo postulata laboro, per plirapidigita kuro de l'maŝinoj ktp.

La moderna industrio transformis la malgrandan metioĉambron de l'patriarka majstro en la grandegan fabrikon de

l'industria kapitalisto. Amasoj da laboristoj, kunpremitaj en la fabriko, estas soldate organizataj. Ili estas metataj kiel simplaj rekrutoj de la industrio sub la inspekton de kompleta hierarkio da suboficiroj k' oficiroj. Ili estas ne nur servuloj de l'burĝa klaso, de l'burĝa ŝtato, ili estas ĉiutage k' ĉiuhore subjugigataj de la maŝino, de la inspektisto k' antaŭ ĉio de la apartaj fabrikantaj burĝoj mem. Tiu ĉi despoteco estas des pli malgrandanima, malama, maldolĉiga, ju pli malkaŝe ĝi proklamas la profiton kiel sian celon.

Ju malpli la manlaboro postulas da lerto k' forto, tio signifas ju pli da moderna industrio disvolviĝas, des pli la laboro de l'viroj estas forpuŝata de la laboro de l'virinoj k' infanoj. Diferencoj de l'sekso k' aĝo ne havas plu socian signifon por la laborista klaso. Ekzistas nur ankoraŭ labor-instrumentoj, kiuj laŭ aĝo k' sekso faras diversajn kostojn.

Se la ekspluatado al la laboristo fare de la fabrikposedanto estas jam tiom finita, ke li ricevas sian salajron kontante¹ elpagita, tiam superfalas lin la aliaj partoj da burĝaro, la domposedanto, la butikisto, la garantiaĵa pruntedonisto ktp.

La ĝisnunaj malgrandaj mezaj statoj, la malgrandaj industriistoj, komercistoj k' rentuloj, la metiistoj k' kampuloj, ĉiuj tiuj ĉi klasoj falas suben en la proletaron, parte pro tio, ke ilia malgranda kapitalo ne sufiĉas por la kondukado de l'granda industrio k' subkuŝiĝas en la konkurenco kun la pli grandaj kapitalistoj, parte pro tio, ke ilia lerto estas senvalorigata de novaj manieroj de l'produktado. Tiel rekrutiĝas la proletaro el ĉiuj klasoj de l'loĝantaro.

La proletaro trapasas diversajn ŝtupojn de la evoluo. Ĝia batalo kontraŭ la burĝaro komenciĝas kun ĝia ekzisto.

Komence batalas la apartaj laboristoj, poste la laboristoj de unu fabriko, poste la laboristoj de unu laborbranĉo en

1 en la originalo: konstante. -vl

La komunista manifesto

unu loko kontraŭ la aparta burĝo, kiu ilin rekte ekspluatas. Ili direktas siajn atakojn ne nur kontraŭ la burĝajn produktajn rilatojn, ili direktas ilin kontraŭ la produktajn instrumentojn mem; ili detruas la fremdajn konkurantajn komercaĵojn, ili disbatas la maŝinojn, ili ekbruligas la fabrikojn, ili penas denove elbatali al si la estintan pozicion de l'mezepoka laboristo.

Sur tiu ŝtupo formas la laboristoj tra la tuta lando dis-semitan k pro la konkurenco dissplititan amason. Amasa solidaro de l'laboristoj estas ankoraŭ ne la sekvo de ilia propra unuiĝo, sed la sekvo de la unuiĝo de l'burĝaro, kiu, por atingi siajn proprajn politikajn celojn, nepre devas la tutan proletaron meti en movadon k tion tiam ankoraŭ povas. Sur tiu ŝtupo kontraŭbatalas do la proletoj ne siajn malamikojn, sed la malamikojn de siaj malamikoj, la restojn de l'absoluta monarkio, la grundpropraĵulojn, la neindustriajn burĝojn, la malgrandajn burĝojn. La tuta historia movado estas do koncentrita en la manoj de l'burĝaro, ĉiu venko, kiu estas tiel elbatalata, estas venko de l'burĝaro.

Sed kun la disvolviĝo de la industrio pligrandiĝas ne nur la proletaro; ĝi estas kunpremata en pli grandaj amasoj, ĝia forto kreskas, k ĝi sentas ĝin pli. La interesoj, la vivsitacioj interne de l'proletaro ĉiam pli interregaliĝas, ĉar la maŝinaro pli k pli la diferencojn de l'laboro forviŝas k preskaŭ ĉie puŝas la salajron malsupren sur egale malaltan nivelon. La kreskanta konkurenco de l'burĝoj inter si k la el tio sekvantaj komercaj krizoj faras la salajron de l'laboristoj ĉiam pli ŝanceliĝanta; la ĉiam pli rapide progresanta, senĉesa plibonigo de l'maŝinaro faras ilian tutan vivpozicion ĉiam pli necerta; ĉiam pli la kolizioj inter la aparta laboristo k la aparta burĝo akceptas la karakteron de kolizioj de du klasoj. La laboristoj komencas per tio, ke ili formas koaliciojn kontraŭ la burĝoj; ili kuniĝas, por sian salajron stabiligi. Ili fondas mem daŭrajn asociojn, por provizi sin per vivrimedoj por la okazaj eksplodoj de indigno. Tie ĉi k tie

eksplodas la batalo en lokaj ribeloj.

De tempo al tempo venkas la laboristoj, tamen nur provizore. La ĝusta rezulto de iliaj bataloj estas ne la senpera sukceso, sed la ĉiam pli disvastiĝanta unuiĝado de l'laboristoj. Ĝi estas akcelata de la kreskantaj interkomunikaj rimedoj, kiuj estas kreataj de l'granda industrio k interligas la laboristojn de diversaj lokoj. Tamen nur la interligo estas necesa, por la multajn lokajn batalojn kun ĉie egala karaktero centralizi je unu nacia, je unu klasa batalo. Ĉiu klasbatalo estas tamen politika batalo. Kaj la unuiĝon, por kiu la mezepokaj civitanoj kun siaj komunumaj vojoj bezonis jarcentojn, efektivigas la modernaj proletoj per la fervojoj dum malmultaj jaroj.

Tiu ĉi organiziĝado de l'proletoj al klaso k per tio al politika partio estas ĉiumomente denove krevigata de la konkurenco inter la laboristoj mem. Sed ĝi leviĝas ĉiam denove, pli forta, pli firma, pli potenca. Profitante de mal-konkordoj de l'burĝaro inter si, ĝi eldevigas la agnoskon de apartaj interesoj de l'laboristoj en formo de leĝoj. Tiel la dekhoran laborleĝon en Anglio.

La kolizioj de l'malnova socio entute akcelas diversmaniere la evoluadon de l'proletaro. La burĝaro troviĝas en konstanta batalo : komence kontraŭ la aristokrataro; poste kontraŭ la partoj da burĝaro mem, kies interesoj fariĝis kontraŭaj kun la progreso de la industrio; ĉiam kontraŭ la burĝaro de ĉiuj eksterlimaj landoj. En ĉiuj tiuj ĉi bataloj ĝi vidas sin devigita apelaci al la proletaro, uzi ĝian helpon k tiel ĝin enŝiri en la politika movado. Ĝi mem alkondukas do al la proletaro siajn proprajn edukajn elementojn, tio signifas armilojn kontraŭ si mem.

Krom tio, kiel ni vidis, pro la progreso de la industrio tutaj konsistaj partoj da reganta klaso estas ĵetataj suben en la proletaron aŭ almenaŭ minacataj en siaj vivkondiĉoj. Ankaŭ ili alkondukas al la proletaro amason da edukaj

La komunista manifesto

elementoj.

Fine, en tempoj, kiam la klasbatalo proksimiĝas al la decido, akceptas la procedo de dissolviĝado interne de l'reganta klaso, interne de l'tuta malnova socio, tiel impetegan, tiel kriantan karakteron, ke malgranda parto da reganta klaso sin fortiras de ĝi k aliĝas al la revolucia klaso, al la klaso, kiu en siaj manoj portas la estonton. Kiel do pli frue parto da nobelaro transiris al la burĝaro, tiel transiras nun parto da burĝaro al la proletaro k nome parto da burĝaj ideologoj, kiuj sin suprenlevis al teoria kompreno de l'tuta historia movado.

El ĉiuj klasoj, kiuj hodiaŭ kontraŭstaras la burĝaron, estas nur la proletaro efektive revolucia klaso. La ceteraj klasoj dekadencas k pereas kun la granda industrio, la proletaro estas ĝia plej propra produkto.

La mezaj statoj, la malgranda industriisto, la malgranda komercisto, la metiisto, la kampulo, ili ĉiuj kontraŭbatalas la burĝaron, por sian ekziston kiel mezaj statoj certigi kontraŭ la pereco. Ili estas sekve ne revoluciaj, sed konservativaj. Eĉ pli, ili estas reakciaj, ili penas turni malantaŭen la radon de l'historio. Se ili estas revoluciaj, ili estas tio pro la konsidero pri la ilin minacanta transiro en la proletaron, ili defendas ne siajn nuntempajn, sed siajn estontajn interesojn, ili forlasas sian propran vidpunkton, por starigi sin sur tiun de l'proletaro.

La ĉifonproletaro, tiu pasiva putriĝo de l'plej subaj tavoloj de l'malnova socio, estas de proleta revolucio kelkloke enĵetata en la movadon, tamen laŭ sia tuta vivsituaĵo ĝi estos pli inklina lasi sin subaĉeti por reakciaj komplotoj.

La vivkondiĉoj de l'malnova socio estas jam detruitaj en la vivkondiĉoj de l'proletaro. La proleto estas senpropraĵa; lia rilato al la edzino k infano havas plu nenion komunan kun la burĝa familia rilato; la moderna industria laboro, la

moderna subjugigo sub la kapitalon, la sama en Anglio kiel en Francio, en Ameriko kiel en Germanio, senigis lin de ĉia nacia karaktero. La leĝoj, la moralo, la religio estas por li same multaj burĝaj antaŭjuĝoj, malantaŭ kiuj kaŝiĝas same multaj burĝaj interesoj.

Ĉiuj pli fruaj klasoj, kiuj konkeris al si la regadon, penis sian jam akiritan vivpozicion certigi tiele, ke ili la tutan socion submetis al la kondiĉoj de sia ekonomio. La proletoj povas al si la sociajn produktajn fortojn nur tiel konkeri, ke ili sian propran ĝisnunan alproprigmanieron neniigos. La proletoj havas nenion da sia por certigi, ili devas detrui ĉiujn ĝisnunajn privatajn certigojn k privatajn asekurojn.

Ĉiuj ĝisnunaj movadoj estis movadoj de malplimultoj aŭ en intereso de malplimultoj. La proleta movado estas la memstara movado de l'grandega plimulto en intereso de l'grandega plimulto. La proletaro, la plej suba tavolo de l'nuna socio, ne povas leviĝi, ne povas elrektiĝi, se la tuta superkonstruo de l'tavoloj, kiuj formas la oficialan socion, ne estos eksplodigita aeren.

Kvankam ne laŭ la enhavo, tamen laŭ la formo la batalo de l'proletaro kontraŭ la burĝaro estas unuavice nacia. La proletaro de ĉiu lando devas kompreneble unue fini kun sia propra burĝaro.

Skizante la plej ĝeneralajn fazojn de la evoluo de l'proletaro, ni sekvis la pli aŭ malpli kaŝitan civitanan militon interne de la ekzistanta socio ĝis la punkto, en kiu ĝi eksplodas en malkaŝan revolucion k la proletaro per la perforta faligo de l'burĝaro fondas sian regadon.

Ĉia ĝisnuna socio konsistis, kiel ni jam vidis, el la antagonismo de subpremantaj k subpremataj klasoj. Por tamen ian klason povi subpremi, devas ĝiaj kondiĉoj esti certigitaj, interne de kiuj ĝi almenaŭ en sia servula ekzisto povas vegeti. La servutulo ellaboris sin ĝis membro de l'komuno

La komunista manifesto

en la servuta epoko, kiel la malgrandburĝo ĝis burĝarano sub la jugo de l'feŭda absolutismo. La moderna laboristo kontraŭe, anstataŭ kun la progreso de la industrio leviĝi, falas ĉiam pli profunde sub la kondiĉojn de sia propra klaso. La laboristo fariĝas paŭperulo k la paŭperismo disvolviĝas ankoraŭ pli rapide ol loĝantaro k riĉaĵo. Per tio fariĝas evidente, ke la burĝaro estas nekapabla ankoraŭ pli longe resti la reganta klaso de l'socio k la vivkondiĉojn de sia klaso altrudi al la socio kiel reguligantan leĝon. Ĝi estas nekapabla regi, ĉar ĝi estas nekapabla certigi al sia sklavo la ekziston eĉ interne de lia sklaveco, ĉar ĝi estas devigita lasi lin malleviĝi en situacion, en kiu ĝi devas lin nutri, anstataŭ esti de li nutrata. La socio ne povas plu sub ĝi vivi, tio signifas ĝia vivo ne estas plu akordigebla kun la socio.

La esenca kondiĉo por la ekzisto k por la regado de l'burĝa klaso estas la amasiĝo de l'riĉaĵo en la manoj de privatuloj, la formiĝo k pligrandiĝado de l'kapitalo; la kondiĉo de l'kapitalo estas la dunglaboro. La dunglaboro baziĝas ekskluzive sur la konkurenco de l'laboristoj inter si. La progreso de la industrio, kies senvola aŭ senrezista portanto estas la burĝaro, metas sur la lokon de la izolado de l'laboristoj per la konkurenco ilian revolucion unuiĝadon per la asociiĝo. Kun la evoluo de l'granda industrio estas do sub la piedoj de l'burĝaro fortirata la fundamento mem, sur kiu ĝi produktas k la produktojn al si alproprigas. Ĝi produktas antaŭ ĉio sian propran tombfosiston. Ĝia pereco k la venko de l'proletaro estas egale neeviteblaj.

II. – Proletoj k komunistoj

En kia rilato staras la komunistoj al la proletoj entute?

La komunistoj estas nenia speciala partio rilate al la aliaj laboristaj partioj.

Ili havas neniajn de la interesoj de l'tuta proletaro apartajn interesojn.

Ili starigas neniajn specialajn principojn, laŭ kiuj ili la proletan movadon volas formi.

La komunistoj diferencas de la ceteraj proletaj partioj nur per tio, ke unuflanke ili en la diversaj naciaj bataloj de l'proletoj akcentas la komunajn, de la nacieco sendependajn interesojn de l'tuta proletaro k substrekas ilian signifon, aliflanke per tio, ke ili en la diversaj evoluaj ŝtupoj, kiujn la batalo inter proletaro k burĝaro trakuras, reprezentas ĉiam la intereson de l'tuta movado.

La komunistoj estas do praktike la plej decidita, ĉiam pluen puŝanta parto da laboristaj partioj el ĉiuj landoj; ili superas teorie la ceteran mason da proletaro per la kompreno pri la kondiĉoj, la iro k la ĝeneralaj rezultoj de l'proleta movado.

La plej proksima celo de l'komunistoj estas la sama kiel tiu de l'proletaro je klaso, faligo de l'burĝa regado, konkero de l'politika povo per la proletaro.

La teoriaj asertoj de l'komunistoj tute ne baziĝas sur ideoj, sur principoj, kiuj estas eltrovitaj aŭ malkovritaj de tiu aŭ alia mondplibonigisto.

Ili estas nur ĝeneralaj esprimoj de faktaj rilatoj de ekzistanta klasbatalo, de sub niaj okuloj progresanta historia movado. La forigo de l'ĝisnunaj proprajrilatoj estas nenio la komunismon speciale karakterizanta.

La komunista manifesto

Ĉiuj proprajrilatoj estis submetitaj al konstanta historia ŝanĝo, al konstanta historia aliigado.

La franca revolucio ekzemple forigis la feŭdan proprajon favore al la burĝa.

Kio la komunismon distingas, tio estas ne la forigo de l'propraĵo entute, sed la forigo de l'burĝa proprajĵo.

Sed la moderna burĝa privata proprajĵo estas la lasta k plej perfekta esprimo de l'fabrikado k alproprigado de l'produktoj, kiu estas bazita sur klasaj antagonismoj, sur la ekspluatado de unuj fare de la aliaj.

En tiu senco povas la komunistoj sian teorion koncizigi en la sola esprimo: forigo de l'privata proprajĵo.

Oni al ni komunistoj riproĉis, ke ni volas forigi la persone akiritan, memperlaboritan proprajon; la proprajon, kiu formas la fundamenton de ĉia persona libero, agado k memstareco.

Perlaborita, akirita, memmeritita proprajĵo ! Ĉu vi parolas pri la malgrandburĝa, malgrandkampula proprajĵo, kiu antaŭiris la burĝan proprajon? Ni ne bezonas ĝin forigi, la evoluo de la industrio ĝin forigis k forigas ĝin ĉiutage.

Aŭ ĉu vi parolas pri la moderna burĝa privata proprajĵo?

Ĉu tamen la dunglaboro, la laboro de l'proleto kreas al li proprajon? Tute ne. Ĝi kreas la kapitalon, tio signifas la proprajon, kiu la dunglaboron ekspluatas, kiu povas pli-multiĝi sub la kondiĉo, ke ĝi kreas novan dunglaboron, por ĝin denove ekspluati. La proprajĵo en sia hodiaŭa formo moviĝas en la antagonismo de kapitalo k dunglaboro. Ni rigardu ambaŭ flankojn de tiu antagonismo.

Esti kapitalisto signifas okupi ne nur pure personan, sed socian pozicion en la produktado. La kapitalo estas komuna produkto k povas nur per komuna agado de multaj membr-

La Komunista Manifesto, traduko de Emil Pfeffer

oj, eĉ pli, en la lasta instanco nur per la komuna agado de ĉiuj membroj de l'socio esti metita en movadon.

La kapitalo estas do neniel persona, ĝi estas socia potenco.

Sekve se la kapitalo estas transformata en komunan, al ĉiuj membroj de l'socio apartenantan proprajon, tiam ne transformiĝas persona propraĵo en socian. Nur la socia karaktero de l'propraĵo transformiĝas. Ĝi perdas sian klasan karakteron.

Ni venu al la dunglaboro.

La mezmezura prezo de l'dunglaboro estas la minimumo de l'laborsalajro, tio signifas la sumo de l'vivrimedoj, kiuj estas necesaj, por la laboriston kiel laboriston subteni ĉe la vivo. Sekve kion la dunglaboristo per sia agado al si alproprigas, tio sufiĉas por lian nudan vivon denove produkti. Ni tute ne volas forigi tiun personan alproprigon de l'labor-produktoj por reprodukto de l'senpera vivo, alproprigon, kiu postlasas nenian puran enspezon, kiu povus doni povon super fremda laboro. Ni volas nur neniigi la mizeran karakteron de tiu ĉi alproprigo, en kiu la laboristo nur vivas, por plimulti la kapitalon, nur tiom vivas, kiom ĝin postulas la intereso de l'reganta klaso.

En la burĝa socio estas la vivanta laboro nur rimedo, por la amasigitan laboron plimulti. En la komunista socio estas la amasigita laboro nur rimedo, por la vivprocezon de l'laboristoj plivastigi, pliriĉigi, akceli.

En la burĝa socio regas sekve la pasinto super la nuntempo, en la komunista nuntempo super la pasinto. En la burĝa socio estas la kapitalo memstara k persona, dum la aktiva individuo estas nememstara k nepersona.

Kaj la neniigon de tiu ĉi rilato nomas la burĝaro neniigo de l'personeco kaj libero! Kaj prave. Ĉar temas, estas vero,

La komunista manifesto

pri la neniigo de l'burĝaj personeco, memstareco kaj libero.

Sub libero oni komprenas interne de l'nunaj burĝaj produktaj rilatoj la liberan komercon, la liberan aĉeton k vendon.

Se falos tamen la ŝakro, tiam falos ankaŭ la libera ŝakro. La frazoj pri la libera ŝakro, kiel ĉiuj ceteraj fanfaronadoj de nia burĝaro pri la libero havas entute nur ian sencon rilate al la ligita ŝakro, rilate al la subjugigita civitano de l'mezepoko, sed ne rilate al la komunista forigo de l'ŝakro, de l'burĝaj produktaj rilatoj k de l'burĝaro mem.

Vin teruras tio, ke ni la privatan proprajon volas neniigi. Sed en via ekzistanta socio estas la privata propraĵo por naŭ dekonoj da ĝiaj membroj neniigita; ĝi ekzistas ĝuste per tio, ke ĝi por naŭdekonoj ne ekzistas. Vi riproĉas sekve al ni, ke ni volas neniigi proprajon, kies necesa antaŭkon-diĉo estas la senpropraĵeco de l'grandega plimulto en la socio.

Per unu vorto vi riproĉas al ni, ke ni vian proprajon volas neniigi. Estas vero, tion ni volas.

De la momento, kiam la laboro ne plu povas esti transformata en kapitalon, monon, grundrenton, unuvorte en monopoligeblan socian potencon, tio signifas, de la momento, kiam la persona propraĵo ne plu povas transiĝi en burĝan, de tiu momento vi deklaras, ke la persono estas neniigita.

Vi konfesas do, ke vi sub persono komprenas neniun alian ol la burĝon, la burĝan proprajulon. Kaj tiu ĉi persono, estas vero, devas esti neniigita.

La komunismo prenas al neniuj la povon alproprigi al si sociajn produktojn, ĝi prenas nur la povon per tiu ĉi al-proprigo subjugigi fremdan laboron.

Oni riproĉis, ke kun la forigo de l'privata propraĵo ĉia

agado ĉesos k ekregos ĝenerala maldiligento.

Laŭ tio devus la burĝa socio delonge esti pereinta pro mallaboremo; ĉar kiuj en ĝi laboras, tiuj ne akiras, k kiuj en ĝi akiras, tiuj ne laboras. La tuta skrupulo reduktiĝas al la taŭtologio, ke ne ekzistas plu dunglaboro, kiam ne ekzistas plu kapitalo.

Ĉiuj riproĉoj, direktataj kontraŭ la maniero de l'komunista alproprigo k produktado de l'materialaj produktoj, estis same disvastigitaj sur la alproprigon k produktadon de l'spirita laboro. Kiel por la burĝo la ĉeso de l'klasa propraĵo estas la ĉeso de l'produkto mem, tiel estas por li la ĉeso de l'klasa edukiteco identa kun la ĉeso de l'edukiteco entute.

La edukiteco, kies perdon li bedaŭras, estas por la grandega plimulto la aleduko al la maŝino.

Sed ne disputu kun ni, mezurante laŭ viaj burĝaj imagoj pri libero, edukiteco, rajto ktp. la forigon de l'burĝa propraĵo. Viaj ideoj mem estas produktoj de l'burĝaj produktoj k propraĵrilatoj kiel via rajto estas nur la leĝigita volo de via klaso, volo, kies enhavo estas donita en la materialaj vivkondiĉoj de via klaso.

La interesitan imagon, en kiu vi viajn produktajn propraĵrilatojn el historia, kun la daŭro de l'produktado preterpasanta rilato transformas en eternajn leĝojn de l'naturro k prudento, vi dividas kun ĉiuj pereintaj regantaj klasoj. Kion vi por la antikva propraĵo komprenas, kion vi por la feŭda propraĵo komprenas, tion vi ne povas plu kompreni por la burĝa propraĵo.

Neniigo de l'familio! Eĉ la plej radikalaj ekkoleras pri tiu malhonora intenco de l'komunistoj.

Sur kio baziĝas la nuntempa, la burĝa familio? Sur la kapitalo, sur la privata akiro. Plene disvolvita ĝi ekzistas nur por la burĝaro; sed ĝi trovas sian kompletigon en la

La komunista manifesto

eldevigita senfamalieco de l'proletoj k en la publika prosti-tuo.

La familio de l'burĝoj defalas kompreneble kun la defalo de tiu ĉi ĝia kompletigo k ambaŭ malaperas kun la mal-apero de l'kapitalo.

Ĉu vi riproĉas al ni, ke ni volas forigi la ekspluatadon de l'infanoj flanke de iliaj gepatroj? Tiun krimon ni konfesas.

Sed, vi diras, ni neniigas la plej intimajn rilatojn, ĉar ni sur la lokon de l'hejma edukado metas la socian.

Kaj ĉu ankaŭ via edukado ne estas difinita de l'socio? De la sociaj rilatoj, interne de kiuj vi edukas, de la pli aŭ malpli rekta enmiksiĝado de l'socio pere de l'lernejo ktp? La komunistoj ne elpensas la influadon de l'socio sur la edukadon, ili transformas nur ĝian karakteron. Ili elŝiras la edukadon el la influo de l'reganta klaso.

La burĝaj frazoj pri familio k edukado, pri la intima rilato de gepatroj k infanoj fariĝas des pli abomenaj, ju pli sekve de l'granda industrio ĉiuj familiaj ligaĵoj estas disŝirataj por la proletoj k la infanoj transformataj en simplajn komercajn artiklojn k laborinstrumentojn.

Sed vi komunistoj volas enkonduki la virinkomunecon, krias al ni la tuta burĝaro ĥore.

La burĝo vidas en sia edzino sole produktinstrumenton. Li aŭdas, ke la produktinstrumentoj devas esti komune ekspluatataj k ne povas al si kompreneble pensi ion alian, ol ke la sorto de l'komuneco trafos same la virinojn.

Li ne antaŭsentas, ke temas ĝuste pri tio, por neniigi la pozicion de l'virinoj kiel simplaj produktinstrumentoj.

Cetere nenio estas pli ridinda ol la tiom morala teruro de niaj burĝoj pri la laŭdira oficiala virinkomuneco de l'komunistoj. La komunistoj ne bezonas enkonduki la virinkomun-

econ, ĝi preskaŭ ĉiam ekzistis.

Niaj burĝoj, ne kontentaj per tio, ke la virinoj k filinoj de iliaj proletoj staras al ilia dispono, jam tute ne parolante pri la oficiala prostituo, trovas ĉefan plezuron en tio, ke ili siajn edzinojn reciproke delogas.

La burĝa edzeco estas en efektivo la komuneco de la edzinoj. En ekstrema okazo oni povus al la komunistoj riproĉi, ke ili anstataŭ hipokrite kaŝata, volas enkonduki oficialan, sinceran virinkomunecon. Cetere estas memkompreneble, ke kun la forigo de l'nunaj produktorilatoj malaperas ankaŭ la el ili eliranta virinkomuneco, tio signifas la oficiala k neoficiala prostituo.

Al la komunistoj estis plue riproĉite, ke ili volas forigi la patrolandon, la naciecon.

La laboristoj havas nenian patrolandon. Oni ne povas al ili preni, kion ili ne havas. Per tio, ke la proletaro devas unuavice konkeri al si la politikan regadon, levi sin al nacia klaso, konstitui sin mem kiel nacio, ĝi estas mem ankoraŭ nacia, kvankam tute ne en la senco de l'burĝaro.

La naciaj apartiĝadoj k antagonismoj de l'popoloj malaperas pli k pli jam kun la evoluo de l'burĝaro, kun la komerclibero, la mondmerkato, la egalformeco de la industria produktado k de l'respondantaj al ĝi vivrilatoj.

La regado de l'proletaro malaperigos ilin ankoraŭ pli. Unuigita agado, almenaŭ de l'civilizitaj landoj, estas unu el la unuaj kondiĉoj de ĝia liberiĝo.

En la mezuro, kiel la ekspluatado de unu individuo fare de la alia estas neniigata, estas neniigata la ekspluatado de unu nacio fare de la alia.

Kun la antagonismo de l'klasoj en la interno de l'nacio falas la malamika sinteno de l'nacioj kontraŭ si reciproke.

La komunista manifesto

La akuzoj kontraŭ la komunismo, kiuj estas levataj el religiaj, filozofiaj, ideologiaj vidpunktoj entute, meritas nesian detalan preparolon.

Ĉu estas necesa profunda prudento, por kompreni, ke kun la vivrilatoj de homoj, kun iliaj sociaj rilatoj, kun ilia socia ekzisto ankaŭ iliaj imagoj, opinioj, ideoj, per unu vorto ankaŭ ilia konscio ŝanĝiĝas ?

Kion pruvas la historio de la ideoj alian, ol ke la spirita produktado transformiĝas kun la materiala? La regantaj ideoj de ia tempo estis ĉiam nur la ideoj de l'reganta klaso.

Oni parolas pri ideoj, kiuj tutan socion revoluciigas; oni esprimas per tio nur la fakton, ke interne de la malnova socio formiĝis la elementoj de nova, ke kun la dissolviĝado de l'malnovaj vivrilatoj la dissolviĝado de l'malnovaj ideoj tenas egalan paŝon.

Kiam la mondo estis pereanta, la malnovaj religioj estis venkitaj de la religio kristana. Kiam la kristanaj ideoj en la 18-a jarcento subkuŝiĝis al la ideoj de l'klerigo, luktis la feŭda socio sian mortbatalon kontraŭ la tiam revolucia burĝaro. La ideoj de l'religia konscienclibero esprimis nur la regadon de l'libera konkurenco sur la kampo de la scio.

« Sed », oni diros, « religiaj, moralaj, filozofiaj, politikaj, juraj, ideoj ktp. modifiĝis sendube en la daŭro de l'historia evoluo. La religio, la moralo, la filozofio, la politiko, la juro konserviĝis ĉiam en tiu ĉi ŝanĝo.

Ekzistas krom tio eternaj veroj, kiel libero, justo ktp, kiuj estas komunaj al ĉiuj sociaj rilatoj. La komunismo tamen forigas la eternajn verojn, ĝi forigas la religion, la moralon, anstataŭ ilin nove formi, ĝi kontraŭdiras do al ĉiuj ĝisnunaj historiaj evoluoj ».

Al kio reduktiĝas la akuzoj? La historio de l'tuta ĝisnuna socio moviĝis en klasaj antagonismoj, kiuj en la diversaj

epokoj estis diverse formitaj.

Kian ajn formon ĝi tamen akceptis, la ekspluatado de unu parto da socio fare de la alia estas fakto komuna al ĉiuj pasintaj jarcentoj, spite ĉia diversformeco k malsamo moviĝas en komunaj formoj, en formoj de l'konscio, kiuj plene dissolviĝas nur kun la tuta malapero de l'klasa antagonismo.

La komunista revolucio estas la plej radikala rompado en la tradiciaj propraĵrilatoj; nenio mirinda, ke en ĝia evoluado plej radikale estas rompate en la tradiciaj ideoj.

Sed ni lasu la riproĉojn de l'burĝaro kontraŭ la komunismo.

Ni vidis jam supre, ke la unua paŝo en la laborista revolucio estas la leviĝo de l'proletaro al reganta klaso, la elbatalo de l'demokratio.

La proletaro uzos sian politikan regadon, por elŝiri al la burĝaro iom post iom ĉian kapitalon, por centralizi ĉiujn produktinstrumentojn en la manojn de l'stato, tio signifas de la kiel reganta klaso organizita proletaro k por kiel eble plej rapide plimultigi la mason da produktofortoj.

Tio ĉi povas kompreneble unuavice okazi nur per despotaj invadoj en la propraĵan rajton k en la burĝan produktorilatojn, sekve per disponoj, kiuj ekonomie ŝajnas nesufiĉaj k nedaŭraj, kiuj tamen en la daŭro de l'movado puŝas trans sin mem eksteren k kiel rimedo por la renverso de l'tuta produkta maniero estas neeviteblaj.

Tiuj ĉi disponoj estos kompreneble diversaj laŭ la diversaj landoj.

Por la plej progresintaj landoj estos tamen la sekvantaj sufiĉe aplikeblaj:

1. Senpropraĵigo de l'grundpropraĵo k apliko de l'grund-

La komunista manifesto

rento por ŝtataj elspezoj.

2. Forta grada imposto.

3. Forigo de l'hereda rajto.

4. Konfisko super la propraĵo de ĉiuj elmigrantoj k ribeluloj.

5. Centralizo de l'kredito en la manojn de l'ŝtato per nacia banko kun ŝtata kapitalo k ekskluziva monopolo.

6. Centralizo de l'transportilaro en la manojn de l'ŝtato.

7. Plimultigo de l' naciaj fabrikoj, produktinstrumentoj, kulturigo k plibonigo de l'kamparoj laŭ komuna plano.

8. Egala labordevigo por ĉiuj, kreo de industriaj armeoj, speciale por la agrikulturo.

9. Unuigo de l' kondukado de la agrikulturo k industrio, agado por la iom-post-ioma forigo de l'diferenco inter urbo k vilaĝo.

10. Publika k senpaga edukado de ĉiuj infanoj, forigo de l'fabriklaboro por la infanoj en ĝia hodiaŭa formo. Unuigo de la edukado kun la materiala produktado ktp.

Se en la daŭro de la evoluo malaperis la klasaj diferencoj k ĉia produktado koncentriĝis en la manojn de la asociitaj individuoj, tiam perdas la publika povo politikan karakteron. La politika povo en la ĝusta senco estas la organizita forto de unu klaso por la subpremado de alia. Se la proletaro en la batalo kontraŭ la burĝaro unuiĝas devigite en klason, per revolucio faras sin reganta klaso k kiel reganta klaso perforte neniigas la malnovajn produktrilatojn, tiam kun tiuj ĉi produktrilatoj ĝi neniigas la kondiĉojn por la ekzisto de l'klasa antagonismo, la klasojn entute k per tio sian propran regadon kiel klaso.

Sur la lokon de l'malnova burĝa socio kun ĝiaj klasoj k

klasaj antagonismoj enpaŝas asocio, en kiu la libera evoluo de ĉiu estas la kondiĉo por la libera evoluo de ĉiuj.

III – Socialista k komunista literaturo

a) La feŭda socialismo.

La franca k angla aristokratioj estis laŭ sia historia pozicio destinitaj skribi pamfletojn kontraŭ la moderna burĝa socio. En la franca Julia Revolucio el 1830, en la angla reformmovado ili ankoraŭ unufoje subkuŝiĝis al la malamata parvenuo. Ne plu povis temi pri serioza politika batalo. Nur la literatura batalo restis al ili ankoraŭ. Sed ankaŭ sur la kampo de l'literaturo la malnovaj frazoj el la retroniga tempo fariĝis neeblaj. Por vekti simpatiojn, devis la aristokratio siajn interesojn ŝajne perdi el okulo k nur en intereso de l'ekspluatata laborista klaso formuli sian akuzon kontraŭ la burĝaro. Ĝi preparis tiel la kontentigon, povi kanti mokajn kantojn je sia nova reganto k flustri al li en la orelon pli aŭ malpli malbonaŭgurajn profetaĵojn.

En tiu maniero estiĝis la feŭdista socialismo, duone resono de l'pasinto, duone minaco de l'estonto, iafoje la burĝaron en la koron trafante per maldolĉa, sprite disŝiranta juĝo, ĉiam komike efikante per kompleta nekapablo kompreni la iron de l'moderna historio.

La proletan almozulan sakon ili svingis kiel standardon, por la popolon malantaŭ si kolekti. Kiomfoje tamen ĝi ilin sekvis, ĝi ekvidis sur ilia postaĵo la malnovajn feŭdajn blazonojn k diskuris kun laŭta k nehonordona ridado.

Parto da francaj legitimistoj k la juna Anglio faris tiun ĉi spektaklon plej bone.

La komunista manifesto

Se la feŭduloj pruvas, ke ilia maniero de ekspluatado estis aliel formita ol la burĝa ekspluatado, ili forgesas nur, ke ili en tute malsamaj k nun transviviĝintaj cirkonstancoj k kondiĉoj ekspluatis. Se ili pruvas, ke sub ilia regado ne ekzistis la moderna proletaro, ili forgesas nur, ke ĝuste la moderna burĝaro estis nepra ido de ilia socia ordo.

Cetere ili tiel malmulte kaŝas la reakcian karakteron de sia kritiko, ke ilia ĉefa akuzo kontraŭ la burĝaro konsistas ĝuste en tio, ke sub ĝia reĝimo disvolviĝas klaso, kiu la tutan malnovan socian ordon eksplodigos aeren.

Ili riproĉas al la burĝaro ankoraŭ pli, ke ĝi produktas revolucion proletaron, ol ke ĝi entute ian proletaron produktas.

En la politika praktiko ili partoprenas tial en ĉiuj perfort-disponoj kontraŭ la laborista klaso k en la ordinara vivo ili bonvolas, spite ĉiujn siajn plenblovitajn frazojn kolektadi la orajn pomojn k interŝanĝadi fidelon, amon, honoron kun la ŝakro en ŝaflano, betoj k brando.

Kiel la pastraĉo iris ĉiam man-en-mane kun la feŭduloj, tiel la pastraĉa socialismo kun la feŭdista.

Nenio pli facila, ol doni al la kristana asketismo socialist-an surlakaĵon. Ĉu la kristanismo ankaŭ ne agitis kontraŭ la privata propraĵo, kontraŭ la edzeco, kontraŭ la ŝtato ? Ĉu ĝi sur ilian lokon ne predikis la bonfaradon k la almozulecon, la fraŭlecon k la karnomortigon, la vivon en la ĉeloj k la preĝejon ? La kristana socialismo estas nur la konsekrita akvo, per kiu la pastraĉo ben-aspergas la ĉagrenon de l'aristokrato.

b) Malgrandburĝa socialismo

La feŭda aristokratio ne estas la sola klaso, kiu de l' burĝaro estis faligita, kies vivkondiĉoj en la moderna burĝa

socio mizeriĝis k senviviĝis. La mezepoka palisburĝaro k la malgranda kampula stato estis la antaŭirantoj de l'moderna burĝaro. En la malpli industrie k komerce disvolvitaj landoj vegetas tiu ĉi klaso ankoraŭ plu apud la leviĝanta burĝaro.

En la landoj, kie disvolviĝis la moderna civilizo, formiĝis nova malgrandburĝaro, kiu ŝvebas inter la proletaro k la burĝaro k kiel kompletiganta parto da burĝa socio ĉiam denove formiĝas, kies membroj tamen konstante, sekve de l'konkurenco estas ĵetataj suben en la proletaron, k eĉ mem kun la evoluo de l'granda industrio vidas proksimiĝi momenton, kiam ili kiel memstara parto da moderna socio tute malaperos k en la komerco, en la manufakturo, en la agrikulturo estos anstataŭitaj per laborinspektistoj k servantoj.

En landoj kiel Francio, kie la kampula klaso konsistigas multe pli ol la duonon da loĝantaro, estis kompreneble, ke verkistoj, kiuj elpaŝis por la proletaro kontraŭ la burĝaro, almetis al sia kritiko de l'burĝa reĝimo la malgrandburĝan k malgrandkampulan mezurilon k stariĝis sur la flanko de l'laboristoj el la vidpunkto de l'malgrandburĝaro. Tiel formiĝas la malgrandburĝa socialismo. Sismondi estas la kapo de tiu ĉi literaturo ne nur por Francio, sed ankaŭ por Anglio.

Tiu ĉi socialismo dismembrigis ekstreme akrapense la kontraŭdirojn en la modernaj produktorilatoj. Ĝi senmaskigis la hipokritajn plibeligojn de la ekonomiistoj. Ĝi pruvis nerefuteble la detruajn efikojn de l'maŝinaro k de l'divido de l'laboro, la koncentrigon de l'kapitaloj k de l'grundpropaĵo, la superproduktadon, la krizojn, la nepran pereon de l'malgrandaj burĝoj k kampuloj, la mizeron de l'proletaro, la anarkion en la produktado, la krientajn malproporciojn en la distribuo de l'riĉaĵo, la industrian detruan militon de l'nacioj inter si, la dissolviĝadon de l' malnovaj moroj, de l' malnovaj familiaj rilatoj, de l' malnovaj naciecoj.

Laŭ sia pozitiva enhavo volas tamen tiu ĉi socialismo aŭ

La komunista manifesto

la malnovajn produktadajn k interkomunikadajn rimedojn restarigi k kun ili la malnovajn proraĵrilatojn k la malnovan socion, aŭ ĝi volas la modernajn produktadajn k interkomunikajn rimedojn en la kadroj de l'malnovaj proprajrilatoj, kiuj de ili estis krevigitaj, nepre devis esti krevigitaj, perforte denove enŝlosi. En ambaŭ kazoj ĝi estas reakcia k utopia samtempe.

Korporacia organizo en la manufakturo k patriarka mas-trumado sur la kamparo, tio estas ĝiaj lastaj vortoj.

En sia plua evoluo perdiĝis tiu ĉi direkto en malkuraĝa lamentado.

c) La germana aŭ la „vera” socialismo

La socialista k komunista literaturo de Francio, kiu estiĝis sub la premo de reganta burĝaro k estas la literatura esprimo de l'batalo kontraŭ tiu ĉi regado, estis enkondukita al Germanio en tempo, kiam la burĝaro ĵus komencis sian batalon kontraŭ la feŭda absolutismo.

Germanaj filozofoj, duonfilozofoj k beletristoj ĵetis sin avide sur tiun ĉi literaturon k forgesis nun ke ĉe la enmigro de tiuj skribaĵoj el Francio la francaj vivrilatoj ne enmigris samtempe al Germanio. Por la germanaj rilatoj perdis la franca literaturo ĉian senpere praktikan signifon k akceptis pure literaturan aspekton. Kiel vanta spekulativo pri la efektivigo de l'homa esenco ĝi devis aperi. Tiel por la germanaj filozofoj de l'18-a jarcento la postuloj de la unua franca revolucio havis nur al sencon, esti postuloj de l'«praktika prudento» ĝenerale k la vol-eksterigoj de l'revolucia franca burĝaro signifis en iliaj okuloj la leĝojn de l'pura volo, de l'volo, kia ĝi devas esti, de l'vere homa volo.

La ekskluziva laboro de l' germanaj literaturistoj konsistis en tio, por la novajn francajn ideojn akordigi kun sia malnova filozofia konscienco aŭ pli ĝuste el sia filozofia

vidpunkto alproprigi al si la francajn ideojn.

Tiu ĉi alproprigo okazis en la sama maniero, en kiu oni al si entute ian fremdan lingvon alproprigas, per la traduko.

Estas konate, kiel la monaĥoj manuskriptojn, sur kiuj estis skribitaj la klasikaj verkoj de l'malnova idolana epoko, superskribis per sengustaj katolikaj sanktulhistorioj. La germanaj literaturistoj agis inverse kun la profana franca literaturo. Ili skribis sian filozofian senseencaĵon malantaŭ la franca originalo. Ekzemple malantaŭ la franca kritiko de l'monrilatoj ili skribis « Seniĝo de l'homa esenco », malantaŭ la franca kritiko de l'burĝa ŝtato ili skribis « Forigo de l'regado de l'o abstrakte ĝenerala¹ » ktp.

La subŝovon de tiuj ĉi filozofiaj frazoj sub la francajn evoluojn ili baptis « filozofio de la ago », « vera socialismo », « germana scienco de l'socialismo », « filozofia motivigo de l'socialismo » ktp.

La franca socialiste-komunista literaturo estis tiel formale kastrita. Kaj ĉar ĝi en la mano de l' germano ĉesis esprimi la batalon de unu klaso kontraŭ la alia, do la germano konsciis, ke li la « francan unuflankecon » supervenkis k reprezentis anstataŭ veraj bezonoj la bezonon de l' vero k anstataŭ intereso de l'proletaro la interesojn de l' homo esenco, de l'homo entute, de l'homo, kiu apartenas al nenia klaso, kiu entute ne apartenas al la efektivo, sed nur al la vaporajĉielo de l'filozofia fantazio.

Tiu ĉi germana socialismo, kiu siajn senhelpajn lerneajn ekzercojn prenis tiel serioze k solene k tiel reklame dis-

1 L'o (la o = la aĵo aŭ la ecoj filozofia signifanta « tio, kio estas »; la supra titolo signifas do alivorte: « Forigo de l'regado de la elemento abstrakte ĝenerala » aŭ fine « forigo l'regado de l'elemento abstrakte ĝenerala » aŭ fine « forigo de l'regado de l'abstrakta ĝeneralo ».

(Rim de l'Trad.)

La komunista manifesto

trumpetis, perdis tamen iom post iom sian pedantan senkulpecon.

La batalo de l'germana, nome de l'prusa burĝaro kontraŭ la feŭduloj k la absoluta reĝeco, per unu vorto, la liberala movado fariĝis pli serioza.

Al la « vera » socialismo prezentiĝis tiel dezirita okazo, kontraŭmeti al la politika movado la socialistajn postulojn, ĵeti la tradiciajn anatemojn kontraŭ la liberalismo, kontraŭ la reprezenta ŝtato, kontraŭ la burĝa konkurenco, burĝa preslibero, burĝa rajto, burĝa libero k egalo k prediki al la popolamaso, kiel ĝi ĉe tiu burĝa movado havas nenion por gajni, pli ĝuste ĉion por perdi. La germana socialismo forgesis ĝustatempe, ke la franca kritiko, kies senspirita eĥo ĝi estis, antaŭmetas kiel kondiĉon la modernan burĝan socion kun la konformaj materialaj vivkondiĉoj k la konvena politika konstitucio, ekskluzive premisoj, pri kies elbatalo en Germanio tiam nur temis.

Ĝi servis al la germanaj absolutaj registaroj kun ilia sekvantaro da pastraĉoj, lernejestroj, brasikjunkroj k burokratoj kiel dezirita birdtimigilo kontraŭ la minacanta burĝaro.

Ĝi formis la dolĉetan kompletigon al la maldolĉaj vipobatoj k pafilkugloj, per kiuj la samaj registaroj prilaboris la germanajn laboristajn ribelojn.

Se do la « vera » socialismo en tia formo estis armilo en la mano de l'registaroj kontraŭ la germana burĝaro, do ankaŭ senpere ĝi reprezentis reakcian intereson, la intereson de l'germana palisburĝaro. En Germanio formas la de l'16-a jarcento transdonita k de tiu tempo en diversa dormo tie ĉi ĉiam denove reaperanta malgrandburĝaro la ĝustan socian bazon de la ekzistantaj rilatoj.

Ĝia konservo estas la konservo de la ekzistantaj germanaj rilatoj. De la industria k politika regado de l'burĝaro ĝi

timas la certan pereon, unuflanke sekve de la koncentrigo de l'kapitalo, aliflanke pro la ekapero de revolucia proletaro. La « vera » socialismo ŝajnis al ĝi ambaŭ muŝojn bati per unu klapo. Ĝi disvastiĝadis kiel epidemio.

La vesto, teksita el spekulativa ŝpinaĵo, surbrodita per belfrazaj parolfloroj, trasaturita per amsufokeca roso de l'sentimento, tiu ĉi ekzaltiga vesto, en kiu la germanaj socialistoj envolvis siajn kelke da « eternaj veroj », pli-grandigis nur la debiton de ilia komercaĵo ĉe tiu ĉi publiko.

Siaflanke ekkonis la germana socialismo ĉiam pli sian destinon, esti la fanfaronanta reprezentanto de tiu ĉi palisburĝaro.

Ĝi proklamis la germanan nacion kiel la normalan nacion k la germanan malgrandburĝon kiel la normalan homon. Ĝi donis al ties ĉiu malnoblaĵo kaŝitan, pli altan socialistan sencon, en kiu ĝi signifis sian kontraŭon. Ĝi eltiris la lastan konsekvencon per tio, ke ĝi elpaŝis rekte kontraŭ la « krude detrua » direkto de l'komunismo k proklamis sian senpartian sublimon super ĉiuj klasbataloj. Kun tre malmultaj esceptoj apartenas ĉio, kio en Germanio cirkulas da laŭdire socialistaj k komunistaj skribaĵoj, en la sferon de tiu ĉi malpura, senenergiiga literaturo.¹

2. La konservativa aŭ burĝa socialismo

Parto da burĝaro deziras forigi la sociajn malbonrilatojn, por certigi la ekziston de l'burĝa socio.

Apartenas tie ĉi: Ekonomiistoj, filantropoj, humanuloj, plibonigantoj de l'situacio de l'laborantaj klasoj, organizantoj de bonfarado, forigantoj de bestturmentado, fondantoj

1 La revolucia ŝtormo de 1848 forbalais la tutan aĉan direkton k prenis al ĝiaj portantoj la volon, ankoraŭ plu fari en socialismo. Ĉefa reprezentanto k klasika tipo de tiu ĉi direkto estas sinjoro Karlo Grun.

La komunista manifesto

de societoj de modero, angulreformistoj de plej miksdevena speco. Kaj ankaŭ ĝis tutaj sistemoj estis ellaborita tiu ĉi burĝa socialismo.

Kiel ekzemplon ni citas : « Filozofio de l'mizero » de Prudon.

La socialistaj burĝoj volas la vivkondiĉojn de l' moderna socio sen la nepre el tio ĉi sekvantaj bataloj k danĝeroj. Ili volas la ekzistantan socion kun elimino de la ĝin revoluciigantaj k ĝin dissolvantaj elementoj. Ili volas la burĝaron sen la proletaro. La burĝaro prezentas al si la mondon, en kiu ĝi regas, kompreneble kiel la plej bonan. La burĝa socialismo ellaboras tiun ĉi konsolan imagon ĝis duona aŭ tuta sistemo. Se ĝi alvokas la proletaron, ke ĝi ĝiajn sistemojn efektivigu k eniru la novan Jeruzalemon, do ĝi postulas en efektivo nur, ke ĝi restu stare en la nuna socio, sed seniĝu de siaj malamaj ideoj pri tiu ĉi.

Dua, malpli sistema, nur pli praktika formo de l'socialismo penis al la laborista klaso ĉian revolucion movadon abomenigi per la pruvo, ke ne tiu aŭ alia politika ŝanĝo, sed nur ŝanĝo de la materialaj vivrilatoj, de l'ekonomiaj rilatoj povas al ĝi utili. Sub ŝanĝo de la materialaj vivrilatoj tute tamen ne komprenas tiu ĉi socialismo forigon de l'burĝaj produktrilatoj, kiu estas ebla nur sur revolucia vojo, sed administrajn plibonigojn, kiuj sur la bazo de tiuj ĉi produkt-rilatoj okazas, sekve en la rilato de kapitalo k dunglaboro nenion ŝanĝas, sed en la plej bona kazo malgrandigas al la burĝaro la kostojn de ĝia regado k simpligas ĝian ŝtatbuĝeton.

Sian konforman esprimon atingas la burĝa socialismo ne pli frue ol tiam, kiam ĝi fariĝas simpla oratora figuro.

Libera komerco ! en intereso de l'laboranta klaso; protektaj limimpostoj ! en intereso de l'laboranta klaso; ĉelkrimulejoj ! en intereso de l'laboranta klaso; tio estas la

lasta, la sola serioze opiniata vorto de l'burĝa socialismo.

La socialismo de l'burĝaro konsistos ja ĝuste en la aserto, ke la burĝoj estas burĝoj – en la intereso de l'laboranta klaso.

3. La kritike-utopiista socialismo k komunismo

Ni ne parolas tie ĉie pri la literaturo, kiu en ĉiuj grandaj modernaj revolucioj esprimis la postulojn de l'proletaro. (Skribaĵoj de Babeŭf ktp.)

La unuaj provoj de l'proletaro, en tempo de ĝenerala ekscito, en la periodo de l'renverso de l'feŭda socio rekte trakonduki sian propran klasan intereson, malsukcesis neeviteble pro la nedisvolvita formo de l'proletaro mem, kiel pro la manko de l'materialaj kondiĉoj de ĝia liberigo, kiuj estas ja nur la produkto de l'burĝa epoko. La revolucia literaturo, kiu akompanis tiujn unuajn movadojn de l'proletaro, estas laŭ la enhavo nepre reakcia. Ĝi instruas ĝeneralan asketismon k krudan egalfaradon.

La ĝustaj socialistaj k komunistaj sistemoj, la sistemoj de St. Simon, Furje, Owen ktp. ekaperas en la unua nedisvolvita periodo de l'batalo inter proletaro k burĝaro, kiun ni supre prezentis. (Vidu « Burĝaro k proletaro ».)

Estas vero, ke la eltrovintoj de tiuj sistemoj vidas la antagonismon de l'klasoj, kiel ankaŭ la efikadon de l'disolvantaj elementoj en la reganta socio mem. Tamen ili rimarkas sur la flanko de l'proletaro nenian historian memstarecon, nenian al ĝi propran politikan movadon.

Ĉar la evoluo de l'klasa antagonismo tenas egalan paŝon kun la evoluo de l'industrio, ili same ne trovas la materialajn kondiĉojn por liberigo de l'proletaro, k serĉas pri socia scienco, pri sociaj leĝoj, por tiujn kondiĉojn elkrei.

La komunista manifesto

Sur la lokon de l'socia agado devas eniri ilia persone eltrovema agado, sur la lokon de l'historiaj kondiĉoj de l'liberigo fantaziaj, sur la lokon de l'iom post iom progresantaj organiziĝoj de l'proletaro je klaso, speciale elmeditata organizo de l'socio. La venanta mondhistorio dissolviĝas por ili en la propagandon k la praktikan efektivigon de iliaj sociaj planoj.

Estas vero, ke ili konscias reprezenti en siaj planoj ĉefe la intereson de l'laboranta klaso kiel de klaso la plej suferanta. Nur sub tiu ĉi vidpunkto de l'plej suferanta klaso ekzistas por ili la proletaro.

La nedisvolvita formo de l'klasbatalo, kiel ilia propra vivsituacio alportas tamen kun si, ke ili kredas sin alte levitaj super tiu klasa antagonismo. Ili volas plibonigi la vivsituation de ĉiuj membroj de l'socio, ankaŭ de la plej bone situitaj. Ili apelacas tial konstante al la tuta socio sen diferenco, eĉ pli, prefere al la reganta klaso. Oni bezonas ilian sistemon nur kompreni, por agnoski ĝin kiel la laŭeble plej bonan planon de la laŭeble plej bona socio.

Ili forĵetas tial ĉian politikan, nome ĉian revolucionan agadon, ili volas sian celon atingi sur paca vojo k provas per malgrandaj, kompreneble malsukcesaj eksperimentoj, per la potenco de la ekzemplo malbari la vojon al nova socia evangelio.

La fantazia priskribado de la estonta socio elfluas en tempo, kiam la proletaro estas ankoraŭ treege nedisvolvita, sekve mem ankoraŭ fantazie sian propran situation komprenas, el ĝia unua antaŭsentoplena impulso al ĝenerala transformo de l'socio.

La socialistaj k komunistaj skribaĵoj konsistas tamen ankaŭ el kritikaj elementoj. Ili atakas ĉiujn fundamentojn de la ekzistanta socio. Ili liveris tial treege valoran materialon por klerigo de l'laboristoj. Iliaj pozitivaj asertoj pri la

estonta socio, forigo de la antagonismo inter urbo k vilaĝo, de l'familio, de l'privatakiro, de l'dunglaboro, la proklamo de l'socia harmonio, la transformo de l'ŝtato en simplan administron de l'produktado – ĉiuj tiuj ĉi asertoj esprimas simple la defalon de l'klasa antagonismo, kiu tiam ĝuste nur komencas disvolviĝi, kiun ili konas nur ankoraŭ en ĝia unua senforma nedefiniteco. Tiuj asertoj mem havas tial ankoraŭ pure utopian sencon.

La signifo de l'kritike-utopia socialismo k komunismo staras en inversa rilato al la historia evoluo. En la sama mezuro, kiel la klasbatalo disvolviĝas k formiĝas, perdas tiu ĉi fantazia sinlevo super ĝi, tiu ĉi fantazia kontraŭbatalado de ĝi ĉian praktikan valoron, ĉian teorian rajtigon. Se do la aŭtoroj de tiuj sistemoj ankaŭ en multaj rilatoj estis revoluciaj, do formas iliaj disĉiploj ĉiufoje reakciajn sektojn. Ili retenas la malnovajn opiniojn de l'majstroj kontraŭ la historia pluevoluo de l'proletaro. Ili penas tial konsekvence malakrigi la klasbatalon k interperi la antagonismojn. Ili revas ankoraŭ ĉiom la provan efektivigon de siaj sociaj utopioj, fondon de apartaj falansteroj, fondon de hejmkolonioj, konstruon de malgranda Ikario¹ – miniatura eldono de l'nova Jeruzalemo – k por konstruo de ĉiuj tiuj ĉi hispanaj kasteloj ili devas apelaci al la filantropio de l'burĝaj koroj k monuoj. Malrapide ili falas en la kategorion de l'supre priskribitaj reakciaj k konservativaj socialistoj k diferencas nur ankoraŭ de ili per pli sistema pedanteco, per la fanatika superstiĉo pri la miraklaj efikoj de sia socia scienco.

Ili elpaŝas tial kun maldolĉa pasio kontraŭ ĉia politika movado de l'laboristoj, kiu povis nur eliri el blinda nekredo pri la nova evangelio.

1 Hejm-kolonioj (kolonioj en enlando) nomas Oven siajn komunistajn modelasociojn. Falansteroj estis la nomo de sociaj palacoj planitaj de Furje. Ikario estis nomata la utopia fontaziolando, kies komunistajn aranĝojn priskribis Kabe.

La Ovenistoj en Anglio, la Furjeristoj en Francio reagas tie kontraŭ la Ĉartistoj¹, tie ĉi kontraŭ la Reformistoj.

IV – Rilato de l'komunistoj al la diversaj opoziciaj partioj

Post la ĉapitro II kompreniĝas la rilato de l'komunistoj al la jam konstruitaj laboristaj partioj per si mem, sekve ilia rilato al la Ĉartistoj en Anglio k al la agraraj reformoj en Nordameriko.

Ili batalas por la atingo de l'senpere antaŭkuŝantaj celoj k interesoj de l'laborista klaso, sed ili reprezentas en la nuntempa movado samtempe la estonton de l'movado. En Francio aliĝas la komunistoj al la socialiste-demokrata² partio kontraŭ la konservativa k radikala burĝaro, ne rezignante tial je la rajto, teni sin kritike al la frazoj k iluzioj, devenantaj el la revolucia tradicio.

En Svisio ili apogas la radikalulojn, ne pretervidante, ke tiu ĉi partio konsistas el kontraŭdiraj elementoj, parte el demokrataj socialistoj en franca senco, parte el radikalaj burĝoj.

Inter la poloj apogas la komunistoj la partion, kiu agrar-an revolucion faras la kondiĉo de l'nacia liberigo, la saman

1 Ĉartistoj estis angla laborista partio, kiu de 1830 ĝis 1850 celis la ŝanĝon de l'konstitucio (disvastigon de la elektraĵto ktp.) parte sur revolucia vojo, kiel per amasa peticio, manifestacio, ĝenerala striko.

(Rim. de l'Trad.)

2 La tiam sin socialiste-demokrata nomanta partio en Francio estis tiu per Ledru-Rolen politike k per Ludoviko Blan literature reprezentata; ĝi estis do ĉieldistance malsama de la hodiaŭa germana socialdemokratio.

partion, kiu la Krakovan ribelon de 1846 vokis en la vivon.

En Germanio batalas la komunista partio, tuj kiam la burĝaro elpaŝas revolucie, komune kun la burĝaro kontraŭ la absoluta monarkio, la feŭda grundpropraĵo k la mal-grandburĝaro.

Ĝi preterlasas tamen nenian momenton, por ellabori ĉe la laboristoj kiel eble plej klaran konscion pri la malamika antagonismo inter burĝaro k proletaro por ke la germanaj laboristoj tuj povu turni la sociajn k politikajn kondiĉojn, kiujn la burĝaro per sia regado nepre devas venigi kiel same multajn armilojn kontraŭ la burĝaro, por ke post la faligo de l'reakciaj klasoj en Germanio tuj komenciĝu la batalo kontraŭ la burĝaro mem.

Sur Germanion direktas la komunistoj sian ĉefan atenton, ĉar Germanio staras en antaŭvespero de burĝa revolucio, k ĉar ĝi tiun ĉi renverson plenumas sub pli progresintaj kondiĉoj de la Eŭropa civilizo entute k kun multe pli evoluinta proletaro, ol Anglio en la 17-a k Francio en la 18-a jarcento, sekve la germana burĝa revolucio povas esti nur la senpera antaŭludo de proleta revolucio.

Per unu vorto, la komunistoj apogas ĉie ĉian revolucion movadon kontraŭ la ekzistantaj sociaj k politikaj rilatoj.

En ĉiuj ĉi movadoj ili substrekas la propraj-demandon, kian ajn pli aŭ malpli disvolvitan formon ĝi estas jam akceptinta, kiel la ĉefan demandon de l'movado.

La komunistoj laboras fine ĉie por la interligo k interkomprenigo de l'demokrataj partioj de ĉiuj landoj.

La komunistoj malŝatas kaŝi siajn opiniojn k intencojn. Ili deklaras malkaŝe, ke iliaj celoj povas esti atingitaj nur per

La komunista manifesto

la perforta renverso de ĉia ĝisnuna sociordo. Tremu la regantaj klasoj antaŭ komunista revolucio. La proletoj havas nenion en ĝi por perdi krom siaj ĉenoj. Ili havas mondon por gajni.

PROLETOJ EL ĈIUJ LANDOJ, UNUIĜU!

**Manifesto de la Komunista Partio
el angla traduko Esperantigita de
Arturo Baker**

Antaŭparolo de la tradukinto¹

En la nuntempo, kiam la historia luktado por ekzistado perdas ĉian individuan karakteron, kaj kunfandiĝas en mondvastan ĝismortan batalon inter Organizita Proprieto de Laborforto unuflanke kaj Organizita Proprieto de Laborrimedoj aliflanke, neniuj povas klare kompreni la grandiozan disputadon, se li ne familiariĝis kun la motivo kaj kurso de la batalo, kiujn la sekvaj paĝoj montras. Tio, kion Darwin faris por la biologio, kaj Spencer por la moralaj sciencoj, Marks faris pli frue por la ekonomiaj studoj.

En la evoluo de tiu ĉi mondvasta batalo la internacia lingvo, Esperanto, devas necese porti gravan parton. Same kiel la telegrafo, la fervojo kaj la vaporŝipo ebligas al modernaj nacioj rapide decidi la rezulton de la milito inter la Rusa Kapitalo kaj la Japana Kapitalo, tiel Esperanto antaŭenigos je multaj jaroj la decidon de la disputo inter la Ĉiomlaboro kaj la Ĉiomkapitalo.

Kvankam la originala Komunista Manifesto estis verkita en la germana, la angla eldono, preparita de Engels, kun-aŭtoro de Marks, estis uzita kiel bazo de tiu ĉi traduko kaj estas ĉi tie reproduktita sur paĝoj paralele al la Esperanto-traduko.² Tiel la Esperanto-lernanto povas taŭge familiariĝi kun la Fundamento de la granda politika kaj ekonomia batalo; kaj la politik-lernanto havas la okazon, dum li renovigas konatiĝon kun dokumento, kiun li neniam povas tro bone koni, lerni la lingvon en kiu niaj infanoj skribos la Konstitucion de la Mondo.

Arthur Baker

1 En la originalo, tiu ĉi antaŭparolo estas nur en la angla, do ne tradukita al Esperanto. Elangligo de la kompilinto.-vl

2 Ĉi tie ni tamen ne reproduktas la anglan version. -vl

MANIFESTO

DE LA

KOMUNISTA PARTIO

DE

KAROLO MARKS
KAJ
FREDERIKO ENGELS

El la Aŭtoritata Angla Traduko, Redaktita kaj Alnotita
de Frederiko Engels, Tradukis Esperanten

ARTURO BAKER

Verkinto de “The American Esperanto Book”,
Redaktoro de “Amerika Esperantisto”

CHICAGO
CHARLES H. KERR & COMPANY
1908

ANTAŬPAROLO

La “Manifesto” estis publikigita kiel la principaro de la “Komunista Ligo”, unu laborista asocio, unue ekskluzive germana, poste internacia, kaj, sekve de la politikaj kondiĉoj de la Kontinento antaŭ ol 1848, neeviteble sekreta societo. Ĉe kongreso de la Ligo, tenata en Londono en Novembro, 1847, Marks kaj Engels estis komisiitaj prepari por publikigado plenan teorion kaj praktikan programon de la partio. Verkita germanlingve en Januaro, 1848, la manuskripto estis sendita al la presisto en Londono kelkajn semajnojn antaŭ ol la franca revolucio de Februaro la 14-an. Franca traduko estis eldonita en Parizo, nelonge antaŭ ol la ribelo de Junio, 1848. La unua angla traduko, de Fraŭlino Helen Macfarlane, aperis en la *Red Republican* (Ruĝa Respublikano) de George Julian Harney, Londono, 1850. Dana kaj pola eldonaĵoj jam estis ankaŭ publikigitaj.

La malvenko de la Pariza ribelo de Junio, 1848 – la unua granda batalo inter proletariaro kaj kapitalistaro – pelis ree en la malantaŭaĵon, kelkatempe, la socian kaj politikan aspirojn de la eŭropa laboranta klaso. De tiam, la batalado por supereco estis ree, kiel ĝi estis estinta antaŭ ol la revolucio de Februaro, sole inter diversaj sekcioj de la poseda klaso; la laboranta klaso estis subpremata ĝis batalo por politika “kubutospaco”, kaj al la loko de ekstrema flanko de la mezklasaj radikaloj. Kie ajn sendependaj proletariaj movadoj daŭrade montris signojn de vivo, ili estis senkompatate ĉasataj ĝis morto. Tiel la prusa polico elĉasis la centran konsilantaron de la Komunista Ligo, tiam lokitan en Kolonjo. La membroj estis arestitaj kaj, post dekok-monata mallibereco, ili estis juĝataj en Oktobro, 1852. Tiu ĉi fama “Kolonja Komunista Proceso” daŭris de Oktobro 4’an ĝis Novembro 12’an; sep el la arestitoj estis kondamnataj je

ANTAŬPAROLO

periodoj de mallibereco en fortikaĵo, diversantaj de tri ĝis ses jaroj. Tuj post la kondamno la Ligo estis formale disigita de la membroj restantaj. Rilate al la “Manifesto”, ĝi ŝajnis de tiu tempo esti destinita al tuta malapero.

Kiam la eŭropa laborklaso ree gajnis sufiĉe da forto por fari alian atakon kontraŭ la regantaj klasoj, la Internacia Asocio de Laboristoj ekkreskis. Sed tiu ĉi asocio, kreita kun la ekspresa celo fandi kune en unu korpon la tutan militantan proletaron de Eŭropo kaj Ameriko, ne povis tuj proklami la principojn formulitajn en la “Manifesto”. La Internacia estis devigata havi programon sufiĉe larĝan por esti akceptebla al la anglaj Metiaj Unuiĝoj, al la sekvantoj de Proudhon en Francujo, Belgujo, Italujo, kaj Hispanujo, kaj la Lasalleanoj¹ en Germanujo. Marks, kiu elverkis tiun ĉi programon al la kontentigo de ĉiuj partioj, fidis tute al la intelekta plibonigado de la laboranta klaso, kiu estis certa rezulti de unuigita agado kaj reciproka diskutado. Eĉ la okazoj kaj malfacilaĵoj de la batalo kontraŭ Kapitalo, la malvenkoj eĉ pli multe ol la venkoj, ne povis ne memori la homajn spiritojn pri la nesufiĉeco de iliaj diversaj favorataj kuracilaĵoj, kaj preparadi la vojon por pli plena envido en la efektivajn kondiĉojn necesajn por laborklasa liberigado. Kaj Marks estis prava. La Internacia, ĉe sia disrompiĝo en 1874, lasis la laboristojn tute malsamaj homoj de tiuj, kiuj ĝi ilin trovis en 1864. Proudhonismo en Francujo, Lasalleanismo en Germanujo, estis elmortantaj kaj eĉ la konservativaj anglaj “Metiaj Unuiĝoj” kvankam la plimulto el ili de longtempe estis rompinta sian rilaton kun la Internacia, estis grade antaŭenirantaj al tiu punkto ĉe kiu, lastjare ĉe Svansea, ilia prezidanto povis diri je ilia nomo: “Kontinenta Socialismo estas perdinta siajn terurojn por ni.” Laŭfakte,

1 Lasalle meme, al ni, ĉiam konfesis sin lernanto de Marks, kaj, kiel tia, staris sur la fondaĵo de la „Manifesto”. Sed en sia publika agitado, 1860-64, li iris ne plu ol postuli kunfarajn laborejojn subtenatajn per la ŝtata kredito.

Manifesto de la Komunista Partio el angla traduko Esperantigita de Arturo Baker

la principoj de la Manifesto faris konsiderindan antaŭenpaŝon inter laboristoj ĉiulandaj.

La Manifesto mem tiel ree venis al la antaŭo. La germana teksto estis, de post 1850, represita kelkfoje en Svislando, Anglujo kaj Ameriko. En 1872 ĝi estis tradukata en la anglan lingvon en Nov-Jorko, kie la traduko estis publikigata en *Woodhull & Claflin's Weekly*. El tiu ĉi angla traduko unu franca estis farita en *Le Socialiste*, de Nov-Jorko. De tiam, almenaŭ du aliaj anglaj tradukoj, pli aŭ malpli multe hakitaj, estas eldonitaj en Ameriko, kaj unu el ili estas represita en Anglujo. La unua ruslingva traduko, farita de Bakounine, estis publikigata ĉe la de Herzen Kolokol'a eldonejo en Genevo, ĉirkaŭ 1863; dua, de la heroo Vera Zasulitch, ankaŭ en Genevo, 1882. Nova dana eldono estas trovata en *Socialdemokratisk Bibliothek*, de Kopenhago, jaro 1885; freŝa franca traduko en *Le Socialiste*, de Parizo, 1886. El tiu ĉi lasta hispana traduko estis preparata kaj eldonata en Madrido, 1886. La germanaj presaĵoj ne estas kalkulotaj; tute, estas estintaj almenaŭ dekdu. Armena traduko, kiu estis publikigota en Konstantinopolo antaŭ kelkaj monatoj, ne atingis, oni diras al mi, la lumon, ĉar la eldonisto timis eldoni libron surhavantan sur ĝi la nomon de Marks, dum samtempe la tradukinto rifuzis ĝin nomi sia propra produktaĵo. Pri pluaj tradukoj en aliaj lingvoj mi estas aŭdinta, sed ilin ne vidis. Tielmaniere, la historio de la Manifesto rebriligas, laŭ granda mezuro, la historion de la moderna laborklasa movado; nunatempe, ĝi sendube estas la plej larĝe dissemata, la plej internacia produktaĵo el la tuta socialista literaturo, la komuna principaro konfesata de milionoj da laboristoj de Siberio ĝis Kalifornio.

Tamen, kiam ĝi estis skribita, oni ne povus ĝin nomi Socialista Manifesto. Per "socialista", en 1847, estis signataj, unuflanke, la aliĝantoj de la diversaj utopiaj sistemoj: Owenanoj en Anglujo, Fourieranoj en Francujo, ambaŭ el ili

ANTAŬPAROLO

jam forvelkintaj ĝis stato de nuraj sektoj, kaj laŭgrade elmortintaj; ĉe la alia flanko, la plej svarmaĉantaj sociaj kuracistaĉoj, kiuj, per ĉiuj manieroj de riparaĉado, pretendis rimedi, sen ia danĝero al kapitalo aŭ profito, ĉiuspecajn sociajn maljustecojn, en ambaŭ okazoj homoj ekster la laborklasa movado, kaj sin turnantaj plimulte al la “edukitaj” klasoj por subtenado. Kia ajn parto de la laborklaso estis konvinkita pri la nesufiĉeco de nuraj politikaj revolucioj, kaj proklamis la necesecon de tuta socia ŝanĝo, tiu parto, tiam, sin nomis komunista. Ĝi estis kruda, elhakegita, entute instinkta speco de komunismo; tamen, ĝi tuŝis la plej gravan punkton kaj estis sufiĉe pova inter la laboranta klaso por produkti la utopian komunismon, en Francujo de Cabet, kaj en Germanujo de Veitling. Tiel, la socialismo estis, en 1847, mezklasa movado, la komunismo estante laborklasa movado. Socialismo estis, almenaŭ sur la Kontinento, “respektinda”; komunismo estis rekte mala. Kaj kiel nia ideo, de la ekkomenco, estis ke “la liberigo de la laboranta klaso devegas esti la ago de la laboranta klaso mem”, ne povis esti dubo rilate al tio, kiun el la du nomoj ni devis preni. Plue, ni ĉiam poste tute ne deziris ĝin malakcepti.

Ĉar la “Manifesto” estas nia kuna produktaĵo, mi opinias min devigata diri ke la fundamenta propozicio kiu estas ĝia esenca centraĵo, apartenas al Marks. Tiu propozicio estas: ke en ĉiu historia epoko, la plej ĝenerala modo de ekonomia produktado kaj interŝanĝado, kaj la socia organizo necese elkreskanta el ĝi, formiĝas kiel la fondaĵo sur kiu estas konstruata, kaj laŭ kiu sole povas esti klarigata la politika kaj intelekta historio de tiu epoko; ke, sekve, la tuta historio de la homaro (de la disiĝo de la primitiva genta societo, tenanta teron en komuna posedeco), estas historio de interklasaj bataladoj, konkuradoj inter ekspluatantoj kaj ekspluatatoj, regantaj kaj subpremataj klasoj; ke la historio de tiuj ĉi interklasaj bataladoj estas serio evolucia en kiu, nunatempe, estas atingita punkto kie la ekspluatata kaj

Manifesto de la Komunista Partio el angla traduko
Esperantigita de Arturo Baker

subpremata klaso – la proletaro – ne povas atingi sian liberigon el la regado de la ekspluatanta kaj reganta klaso – la kapitalistaro – ne samtempe, unufoje por ĉiam, liberigante la tutan socion el ĉia ekspluatado, subpremado, interklasaj distingo kaj interklasaj bataloj.

Tiun ĉi propozicion, kiu, laŭ mia opinio, destiniĝas fari por la historio kion la de Darvin teorio estas farinta por la biologio, ni ambaŭ estis laŭgrade alproksimiĝintaj dum kelkaj jaroj antaŭ ol 1845. Kiom mi mem sendepende progresis al ĝi estas plej bone montrate en mia *Condition of the Working Class in England*¹. Sed kiam mi ree renkontis Marks en Bruselo, printempe, 1845, li jam estis ĝin elpensinta, kaj metis ĝin antaŭ mi en terminoj preskaŭ tiel klaraj, kiel tiuj, per kiuj mi ĝin elmontras tie ĉi.

El nia kuna antaŭdiro je la germana eldono de 1872 mi citas la jenan:

“Kiom ajn la stato de aferoj estas ŝanĝinta dum la lastaj dudek-kvin jaroj, la ĝeneralaj principoj proponitaj de tiu ĉi Manifesto estas, laŭtute, tiel pravaj hodiaŭ kiel iam. Tie ĉi tie ia detalo povus esti plibonigita. La praktika aplikado de la principoj dependos, kiel diras la Manifesto mem, ĉiuloke kaj ĉiuokaze, de la historiaj statoj en tiu tempo ekzistantaj, kaj, pro tiu kaŭzo, nenia speciala emfazo estas metata al la revoluciaj rimedoj proponataj ĉe la fino de Sekcio IIa. Tiu parto estus, en multaj manieroj, redaktata tre malsame hodiaŭ. Konsiderante la gigantajn paŝegojn faritajn de Moderna Industrio de 1848, kaj la akompanantan plibonigitan kaj etenditan organizon de la laboranta klaso; en vido de la praktika sperto akirita, unue en la februara revolucio, kaj poste, ankoraŭ pli multe, en la Pariza Komunumo, kie la

1 “The Condition of the Working Class in England in 1844”. De Frederiko Engels. Tradukita de Florence K. Wischnewetzky – London: Swan, Sonnenschein & Co.

ANTAŬPAROLO

proletario por la unua fojo tenis politikan povon dum du tutaj monatoj, tiu ĉi programo en kelkaj detaloj estas fariĝinta antikva. Unu fakto aparte pruviĝis per la komunumo, t. e., ke “la laboranta klaso ne povas simple preni posedon de jam-farita ŝtata maŝinaro kaj ĝin uzi por siaj propraj celoj”. (Vidu *“The Civil War in France; Address of the General Council of the International Workingmen’s Association”*, eldonita London’, Truelove, 1871, p. 15, en kiu tiu ĉi punkto estas plue klarigata)¹. Plue, estas mem-evidente, ke la kritiko de la socialista literaturo estas manka rilate al la nuna tempo, ĉar ĝi nur pritraktas ĝis 1847; ankaŭ, ke la rimarkoj pri la rilatoj de la Komunistoj al la diversaj opoziciaj partioj (Sekcio IV), kvankam laŭprincipe ankoraŭ pravaj, tamen en la praktiko estas antikvaj, ĉar la politika situacio estas tute ŝanĝita, kaj la progreso de la historio forbalais de la tero la plimulton el la politikaj partioj tie nome cititaj.

Sed jam, la Manifesto estas fariĝinta historia dokumento, kiun ni ne plu havas ian rajton ŝanĝi.

La jenan tradukon faris Sro. Samuel Moore, tradukinto de la pligranda parto da “Kapitalo”, de Marks. Ni estas ĝin reviziintaj kune, kaj mi aldonis kelke da notoj klarigantaj la historiajn aludojn.

Frederick Engels.

Londono, 30’an de Januaro, 1888.

1 En Esperanto: Karlo Markso: La interna milito en Francio, v.c., p. 68. -vl

MANIFESTO DE LA KOMUNISTA PARTIO

DE

KAROLO MARKS KAJ FREDERIKO ENGELS

FANTOMO vizitadas Eŭropon – la fantomo de la Komunismo. Ĉiuj povoj de malnova Eŭropo estas aliĝintaj sanktan interligon por trankviligi tiun ĉi fantomon; papo kaj caro, Metternich kaj Guizot, francaj radikalistoj kaj germanaj policaj spionoj.

Kie estas la partio de opozicio kiu ne estas nomaĉita kiel komunista de siaj kontraŭuloj regantaj? Kie la opoziciantaro kiu ne estas ĵetinta returnen la brulaĵantan riproĉon de Komunismo, kontraŭ la pli antaŭaj opoziciaj partioj tiel bone kiel kontraŭ siaj reakciaj kontraŭuloj?

Du aferoj rezultas el tiu ĉi fakto.

I. Komunismo estas jam konfesata de ĉiuj eŭropaj “povoj” esti “povo” ĝi mem.

II. Estas ja tempo kiam la Komunistoj devas malkaŝe, antaŭ la tuta mondo, publikigi siajn opiniojn, siajn celojn, siajn tendencojn, kaj kontraŭmeti al tiu ĉi infaneja fabelo pri la Fantomo de Komunismo ian Manifeston de la partio mem.

Al tiu celo, komunistoj de diversaj naciecoj estas kunvenintaj en Londonon, kaj verkis la sekvantan manifeston, publikigotan en la angla, franca, germana, itala, flandra kaj dana lingvoj.

MANIFESTO DE LA KOMUNISTA PARTIO

I LA KAPITALISTOJ KAJ LA PROLETARIOJ¹

La historio de la tuta ĝisnun ekzistanta socio² estas la historio de interklasaj bataloj.

Liberulo kaj sklavo, patricio kaj plebejo, bienulo kaj servutulo, gildmajstro³ kaj metiisto, unuvorte, subpremanto kaj subpremato, staris konstante unu kontraŭ la alia, daŭrigis senintermankan, jen kaŝatan, jen malkaŝatan

- 1 Per “kapitalistaro” estas signata la klaso de modernaj kapitalistoj, posedantoj de la rimedoj de socia produktado kaj dungantoj de salajra laboro; per “proletariaro”, la klaso de modernaj salajr-laboristoj, kiuj, havante nenian propran rimedon de produktado, estas submetataj al la vendo de sia propra labor-povo por ke ili vivu.
- 2 Tio estas, la tuta skribita historio. En 1847, la antaŭa historio de la socio, la socia organizo ekzistinta antaŭ la rekordita historio, estis preskaŭ nekonata. Post tiam, Haksthausen eltrovis komunan posedecon de la tero en Ruslando, Maurer pruvis ke ĝi estis la socia fondaĵo el kiu ĉiuj teŭtonaj rasoj ekkomencis en historio, kaj, iom poste, oni trovis ke vilaĝaj komunumoj estas, aŭ estis, la primitiva formo de la socio ĉie, de Hindujo ĝis Irlando. La interna organizo de tiu primitiva komunista socio estis nudigata, en sia tipa formo, per la fina eltrovo de Morgan, pri la reala naturo de la familiego (angle, gens) kaj ĝia rilato al la gento. Je la dissolvo de tiuj praaĵ komunumoj, la socio komencas esti diferencigata en apartajn kaj fine antagonismajn klasojn. Mi provis ree sekvi tiun ĉi dissolvadon en: “Der Ursprung der Familie, des Privateigenthums und des Staats”, dua eldono, Stuttgart, 1886.
– [Tiu ĉi lasta libro ekzistas en Esperanto. Frederiko Engelso: La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2010.]
- 3 Gildmajstro, tiu estas plena membro de gildo, majstro en, ne estro de, gildo.

Manifesto de la Komunista Partio el angla traduko Esperantigita de Arturo Baker

bataladon, kiu ĉiufoje finiĝis, aŭ en revolucia rekonstruado de la socio ĝenerale, aŭ en la komuna ruiniĝo de la batalantaj klasoj.

En la pli fruaj epokoj de la historio, ni trovas preskaŭ ĉie komplikigitan aranĝon de la socio en diversajn klasojn, multoblan gradigadon de socia viceco. En antikva Romo sin trovis patricioj, kavaliroj, plebejoj, sklavoj; en la mezepokoj, feŭdismaj sinjoroj, vasaloj, gildmajstroj, metiistoj, metilernantoj, servutuloj; en preskaŭ ĉiuj el tiuj klasoj, ree, estis filiaj gradigoj.

La moderna kapitalista socio kiu estas ekkreskinta el la ruinoj de la feŭda socio, ne estas foriginta klasajn antagonismojn. Ĝi nur starigis novajn klasojn, novajn statojn de subpremado, novajn formojn de batalado anstataŭ la malnovaj.

Nia epoko, la epoko de la kapitalistaro, posedas, tamen, tiun ĉi distingan econ – ĝi estas simpliginta la klasajn antagonismojn. La socio kiel tuto estas pli kaj pli sin dividanta en du grandajn malpacajn kampojn, en du grandajn klasojn rekte fronto fronton: kapitalistaro kaj proletariaro.

De la servutuloj de la mezepokoj ekkreskis la enrajtigitaj burĝoj de la unuaj urboj (*towns*). El tiuj ĉi burĝaroj la unuaj elementoj de la kapitalistaro kreskadis.

La eltrovo de Ameriko, la ĉirkaŭpaso de la Promontoro, malfermis freŝan teron al la supreniĝanta kapitalistaro. La orient-india kaj ĥina komercejoj, la koloniigado de Ameriko, interkomerco kun la kolonioj, la kreskado de la rimedoj de interŝanĝo kaj de komercaĵoj ĝenerale, donis al komerco, al marveturado, al industrio, antaŭenpuŝon neniam antaŭe konatan, kaj per tio donis ankaŭ al la revolucia elemento en la ŝanceliĝanta feŭda socio rapidan disvolviĝon.

La feŭda sistemo de industrio, sub kiu la industria pro-

MANIFESTO DE LA KOMUNISTA PARTIO

duktado estis monopoligita nun ne plu sufiĉas al la kreskantaj bezonoj de la novaj komercaj kampoj. La fabrikada sistemo prenis ĝian lokon. La gildmajstroj estis flanken ŝovitaj de la fabrikanta mezklaso; divido de laboro inter la diversaj enkorpigitaĵoj gildoj estis anstataŭita per divido de laboro en ĉiu memstaranta laborejo.

Meztempe, la vendejaroj daŭre kreskis, la postuloj ĉiam pligrandigis. Eĉ la fabriko ne plu sufiĉis. Tiam, la vaporo kaj la maŝinaro revoluciigis la industrian produktadon. La fabrikado cedis lokon al la giganto, Moderna Industrio, kaj la industriaj mezklasoj estis anstataŭigitaj de industriaj milionuloj, estroj de tutaj industriaj armeoj, la moderna kapitalistaro.

Moderna industrio starigis la tutmondan vendejaron, al kiu la eltrovo de Ameriko pavimis la vojon. Tiu ĉi vendejaro estas doninta grandegan disvolviĝon al komerco, al marveturado, kaj al komunikado surtera. Tiu ĉi disvolviĝo, en sia vico, reagis al la etendado de industrio; kaj proporcio kiel industrio, komercado, marveturado kaj fervojoj etendiĝis, laŭ tiu sama proporcio la kapitalistaro kreskadis, pligrandigis sian kapitalon, kaj puŝis en la malantaŭon ĉiun klason restantan el la mezepokoj.

Ni vidas, tial, kiel la moderna kapitalistaro mem estas la produktaĵo de longa kurso de kreskado, de serio da revolucioj en la metodoj de produktado kaj interŝanĝo.

Ĉiu paŝo en la kreskado de la kapitalistaro estis akompanata de responda politika antaŭeniro de tiu klaso. Jen subpremata klaso sub la regado de la feŭda nobelaro, jen armita kaj mem-reganta klaso en la mezepoka komunumo¹,

1 "Commune" estas la nomo alprenita, en Francujo, de la naskiĝantaj urboj eĉ antaŭ ol ili pervenkis de siaj feŭdaj sinjoroj kaj regantoj lokan memregadon kaj politikajn rajtojn kiel "La Tria Etato". Ĝenerale parolante, rilate al la ekonomia disvolviĝo de la kapitalistaro, Anglujo estas tie ĉi alprenata kiel la tipa lando,

Manifesto de la Komunista Partio el angla traduko
Esperantigita de Arturo Baker

jen sendependa urba respubliko (kiel en Italujo kaj Germanujo), jen impostebla “tria etato” de la monarĥaĵo (kiel en Francujo), poste, dum la vera periodo de fabrikado, servante aŭ al la duon-feŭda aŭ al la absoluta monarĥaĵo kiel kontraŭbalancilo kontraŭ la nobelaro, kaj, laŭfakte, kiel la angul-ŝtonego de la grandaj monarĥaĵoj ĝenerale, la kapitalistaro estas fine, post la starigo de Moderna Industrio kaj la tutmonda vendejo, venkinta por si mem, en la moderna reprezenta ŝtato, ekskluzivan¹ politikan regadon. La registaro de la moderna ŝtato estas nur komitato por administri la komunajn aferojn de la tuta kapitalistaro.

La kapitalistaro ludis, rilate al la historio, plej revolucionan rolon.

La kapitalistaro, kie ajn ĝi atingis la superecon, finigis ĉiujn feŭdajn, patriarkajn, idiliajn rilatojn. Ĝi senkompate disrompis la multekarakterajn feŭdajn ligilojn kiuj ligis la homon al liaj “naturaj superuloj” kaj lasis restanta nenian alian ligilon inter homo kaj homo ol nuda mem-intereso, ol kala “kontanta pago”. Ĝi dronigis la plej ĉielajn ekstazojn de religia fervoro, de kavalira entuziasmo, de filistra sentimentalismo, en la glacia akvo de egoista kalkulado. Personan indon ĝi ŝanĝis en komercan valoran, kaj anstataŭ la sennombraj neforpreneblaj alrajtigataj liberecoj, ĝi starigis tiun solan, senrezonecan liberaĵon – Liberan Interkomercadon. En unu vorto, por ekspluatado, vualita per religiaj kaj politikaj iluzioj, ĝi anstataŭis senhontan, nudan, rektan, brutan ekspluatadon.

La kapitalistaro estas devestinta je ĝia lumkrono ĉiun okupon ĝisnune honoritan kaj alrigarditan kun reverenca respekto. Ĝi ŝanĝis la fizikiston, la leĝiston, la pastron, la

kaj rilate al ĝia politika disvolviĝo, Francujo.

1 en la originalo: ... ezsklusivan ... -vl

MANIFESTO DE LA KOMUNISTA PARTIO

poeton, la scienciston, je siaj dungataj porsalajraj¹ laborantoj.

La kapitalistaro devestis de la familio ĝian vualon sentimental, kaj reduktiis la familian rilaton ĝis nur mona rilato.

La kapitalistaro estas elmontrinta kiel okazis ke tiu bruta elmonro de fortegeco en la mezepoko, kiun la reakcianoj tiel multe admiras, trovis sian taŭgan komplementon en la plej granda mallaboremeco. Ĝi estas la unua kiu montris kion povas okazigi la homa agemo. Ĝi faris miraĵojn grande superajn al egiptaj piramidoj, romaj akvokondukiloj kaj gotaj katedraloj; ĝi faris militirojn kiuj metis sub ombron ĉiujn antaŭajn elirojn de nacioj kaj krucmilitirojn.

La kapitalistaro ne povas ekzisti, ne konstante revoluciante la rimedojn de la produktado, kaj per tio la rilatojn de produktado, kaj kun ili la tutaj rilatojn de la socio. La konservado de la antikvaj metodoj de produktado en neŝanĝita formo estis, kontraŭe, la unua kondiĉo por la ekzistado de ĉiuj pli fruaj industriaj klasoj. Konstanta revoluciado de produktado, seninterrompa maltrankviligo de ĉiuj sociaj statoj, ĉiama necerteco kaj agitado, distingas la kapitalistan epokon de ĉiuj pli fruaj. Ĉiuj fiksitaj, alglaciigitaj rilatoj, kun sia sekvantaro de antikvaj kaj respektindaj antaŭjuĝoj kaj opinioj, forbalaiĝas, ĉiuj nove formitaj antikviĝas antaŭ ol ili povas malmoliĝi. Ĉio solida forfluidiĝas en aeron, ĉio sankta profaniĝas, kaj ĉe la fino la homo estas devigata stari kun sobraj sentoj antaŭ siaj realaj kondiĉoj de vivado, kaj siaj rilatoj kun sia gento.

La bezono de konstante etendiĝanta vendejo por siaj produktaĵoj ĉasas la kapitalistaron laŭ la tuta supraĵo de la terglobo. Ĝi devas nestiĝi ĉie, enlokiĝi ĉie, starigi interrilatojn ĉie.

1 en la originalo: porsalaraj. -vl

Manifesto de la Komunista Partio el angla traduko Esperantigita de Arturo Baker

Per sia ekspluatado de la komerca kampo la kapitalistaro estas doninta kosmopolitan karakteron al produktado kaj konsumado en ĉiu lando. Je la granda ĉagreno de la reakcianoj, ĝi fortrenis el sub la piedoj de industrio la naciecan teron sur kiu ĝi staris. Ĉiuj jamlonge staritaj naciaj industrioj estas aŭ jam detruitaj aŭ nun ĉiutage detruataj. Ili estas elŝovitaj de novaj industrioj, kies enprenado fariĝas afero de vivo aŭ morto al ĉiuj civilizitaj nacioj, de industrioj kiuj ne plu ellaboras enlandan krudan materialon, sed krudan materialon entiritan el plej malproksimaj terzonoj; industrioj kies produktaĵoj estas konsumataj ne sole hejme, sed en ĉiu parto de la mondo. Anstataŭ la malnovaj bezonoj, satigataj de la produktaĵoj de la lando, ni trovas novajn bezonojn, postulantajn por sia satado la produktaĵojn de malproksimaj landoj kaj klimatoj. Anstataŭ la malnova loka kaj nacia memsufiĉeco, ni havas interrilatojn en ĉiun direkton, universalan interdependecon de nacioj. Kaj kiel en la materia, tiel ankaŭ en la intelekta produktado. La intelektaj kreaĵoj de individuaj nacioj fariĝas komuna propraĵo. Nacia unuflankeco kaj mallarĝanimeco fariĝas pli kaj pli multe neeblaj, kaj el la multaj naciaj kaj lokaj literaturoj leviĝas unu tutmonda literaturo.

La kapitalistaro, per la rapida plibonigo de ĉiuj iloj de produktado, per la grandege faciligitaj rimedoj de komunikado, entiras ĉiujn, eĉ la plej barbarajn naciojn, en civilizon. La malaltaj prezoj de siaj komercaĵoj estas la multepeza artilerio per kiu ĝi disbategas ĉiujn ĥinajn murojn, per kiu ĝi igas kapitulacii la treege obstinan malammon de la barbaroj al fremduloj. Ĝi devigas ĉiujn naciojn, je puno per ekstermo, alpreni la kapitalistan metodon de produktado; ĝi devigas ilin enkonduki en sian mezon tion kion ĝi nomas civilizo, t. e. fariĝi mem kapitalisma. Unuvorte, ĝi kreas mondon laŭ sia propra figuro.

La kapitalistaro submetis la kamparon al la regado de la

MANIFESTO DE LA KOMUNISTA PARTIO

urboj. Ĝi kreis grandegajn urbojn, treege pligrandigis la loĝantaron urban rilate la kamparan, kaj tiamaniere estas elsavinta konsiderindan parton de la popolo el la idiotismo de kampara vivado. Ĝuste kiel ĝi igis la kamparon dependa de la urboj, tiel same ĝi igis barbarajn kaj duon-barbarajn naciojn dependaj de la civilizitaj, naciojn da kamparanoj dependaj de nacioj da kapitalistoj, la orienton de la okcidento.

La kapitalistaro daŭrigas pli kaj pli forigi la dissemitan staton de la loĝantaro, de la rimedoj de produktado, kaj de posedaĵo. Ĝi aglomeris la loĝantaron, centrigis la rimedojn de produktado, kaj koncentrigis la posedaĵojn en malmultajn manojn. La necesa sekvo de tio ĉi estis politika centrigo. Sendependaj, aŭ neforte kunligitaj provincoj, kun apartaj interesoj, leĝoj, registaroj kaj sistemoj de impostado, kune amasiĝis en unu nacion, kun unu registaro, unu sistemo de leĝoj, unu nacia klasa intereso kaj unu sistemo de enportaj impostpagoj.

La kapitalistaro, dum sia apenaŭ centjara regado, estas kreinta pli masivajn kaj pli kolosajn produktantajn povojn ol kreis ĉiuj antaŭaj generacioj entute. Subjugado de la povoj de naturo al la homoj, maŝinaro, la aplikado de la ĥemio al la industrio kaj la terkulturo, vapora marveturado, la fervojoj, elektra telegrafo, la pretigado de tutaj kontinentoj al kulturado, kanalligo de riveroj, tutaj loĝantaroj elsorĉigitaj el la tero – kiu antaŭa centjaro havis eĉ antaŭsenton ke tiaj produktemaj povoj dormis en la patrino teno de la socia laboro?

Ni vidas do: la rimedoj de produktado kaj interŝanĝado sur kies fondaĵo la kapitalistaro sin elkonstruis estis naskitaj en la feŭda socio. Ĉe difinita punkto en la disvolviĝo de tiuj rimedoj de produktado kaj interŝanĝado, la kondiĉoj sub kiuj la feŭda socio produktis kaj interŝanĝis, la feŭda organizo de terkulturado kaj la fabrika industrio, unuvorte

Manifesto de la Komunista Partio el angla traduko
Esperantigita de Arturo Baker

la feŭdaj¹ rilatoj de propreco, fariĝis ne plu kunigeblaj kun la jam disvolvitaj produktaj povoj; ili fariĝis tiom multe da katenoj. Ili devegis esti disrompitaj; ili estis disrompitaj.

En iliajn lokojn ekpaŝis libera konkurado, akompanata de socia kaj politika konstitucio alfarita al ĝi, kaj de la ekonomia kaj politika regado de la kapitalista klaso.

Simila movado nun estas okazanta antaŭ niaj propraj okuloj. La moderna kapitalista socio kun siaj rilatoj de produktado, de interŝanĝado kaj de posedeco, socio kiu elsorĉigis tiel gigantajn rimedojn de produktado kaj de interŝanĝado, similas sorĉiston, kiu ne plu povas kontroli la povojn de la suba mondo kiujn li suprenvokis per siaj sorĉaĵoj. Dum multaj jardekoj estintaj la historio de industrio kaj komercado estis nur la historio de la ribelado de modernaj produktantaj povoj kontraŭ la modernaj kondiĉoj de produktado, kontraŭ la posedaj rilatoj kiuj estas la kondiĉoj por la ekzistado de la kapitalistaro kaj por ĝia regado. Estas sufiĉe citi la komercajn krizojn, kiuj per sia perioda reveno metas al juĝo, ĉiufoje pli minace, la ekziston de la tuta kapitalista socio. En tiuj ĉi krizoj, granda parto ne sole de la ekzistantaj produktaĵoj, sed ankaŭ de la antaŭe kreitaj produktantaj povoj, periode detruigis. En tiuj krizoj, ekdisvastiĝas epidemio, kiu en ĉiuj pli fruaj epokoj, estus ŝajninta absurdaĵo – la epidemio de troprodukteco. La socio subite sin trovas remetita en staton de momenta barbarismo; ŝajnas kvazaŭ malsufiĉeco de nutraĵo, universala milito detruigada, forfermis la provizon de ĉiu rimedo de nutrado; industrio kaj komerco ŝajnas detruitaj; kaj kial? Ĉar estas tro multe da civilizacio, tro multe da vivrimedoj, tro multe da industrio, tro multe da komerco. La produktantaj povoj je la dispono de la socio ne plu sin direktas al la disvolvigo de la kondiĉoj de kapitalista posedeco; kontraŭe, ili estas fariĝintaj tro povaj por tiuj ĉi kondiĉoj, per kiuj ili

1 originale: feŭda. -vl

MANIFESTO DE LA KOMUNISTA PARTIO

estas katenataj, kaj tuj kiam ili demetas tiujn ĉi katenojn ili alportas malordon al la tuta kapitalista socio, endanĝerigante la ekziston de kapitalista propreco. La kondiĉoj de kapitalista socio estas tro mallarĝaj por enteni la riĉaĵon de ĝi kreitan. Kaj kiamaniere la kapitalistaro trapasas tiujn krizojn? Unuflanke, per la perfortigata detruo de amaso da produktantaj povoj; je la alia flanko, venkante novajn vendejojn, kaj pli plene ekspluatante la malnovajn. Tio estas, pavimante la vojon al pli grandaj kaj pli detruaj krizoj, kaj plimalgrandigante la rimedojn per kiuj la krizoj estas malhelpataj.

La armiloj per kiuj la kapitalistaro faligis teren la feŭdismon nun estas turnataj kontraŭ la kapitalistaro mem.

Sed ne sole estas la kapitalistaro forĝinta la armilojn kiuj alportas la morton al ĝi mem; ĝi ankaŭ vokis en ekziston la homojn kiuj tiujn armilojn estas uzontaj – la modernan laborklason – la proletariojn.

Proporcie kiel la kapitalistaro, t. e., la kapitalo, disvolviĝas, laŭ tiu sama proporcio disvolviĝas la proletario, la moderna laborklaso, klaso de laboristoj, kiuj vivas nur tiel longe kiel ili trovas laboron, kaj kiuj trovas laboron nur tiel longe kiel ilia laboro kreskigas kapitalon. Tiuj laboristoj, kiuj devegas sin vendi pece, estas komercaĵo, kiel ĉiu alia komercaĵo, kaj sekve estas almetataj al ĉiuj malfacilaĵoj de la konkurado, al ĉiuj ŝanĝoj de la vendejaj prezoj.

Sekve de la vasta uzado de la maŝinaro kaj de la divido de laborado, la laboro de la proletarioj estas perdinta ĉian individuan karakteron, kaj ĉian ĉarmon por la laboristo. Li fariĝas pendaĵo de la maŝino, kaj nur la plej simpla, plej unutona, kaj plej facile akirebla lertaĉo estas postulata de li. De tio, la kosto por produkti laboriston estas limigata, preskaŭ tute, al la rimedoj de vivado kiujn li postulas por sia subtenado, kaj por la daŭrigado de sia raso. Sed la prezo de ia komercaĵo, kaj ankaŭ de la laboro, estas egala

Manifesto de la Komunista Partio el angla traduko
Esperantigita de Arturo Baker

kun ĝia kosto de produktado. Laŭ proporcio, tial, kiel la malagrablegeco de la laboro pligrandiĝas, la salajro mal-kreskas. Ne, plu; proporcie kiel la uzado de maŝinoj kaj la dividado de laboro kreskas, laŭ tiu sama proporcio la ŝarĝo de laboro ankaŭ kreskas, ĉu per plilongigo de la labortempo, per pligrandigo de la laboro farata en certa tempo, ĉu per pligrandigita rapido de maŝinaro, k.c.

La moderna industrio estas elŝanĝinta la malgrandan laborejon de la patriarka majstro je la granda fabrikejo de la industria kapitalisto. Aroj da laboristoj, amasigitaj en la fabrikejon, organiziĝas kiel soldatoj. Kiel soldatoj de la industria armeo, ili estas metataj sub la komando de vera hierarĥio de oficiroj kaj serĝentoj. Ne nur ili estas sklavoj de la kapitalista klaso, kaj de la kapitalista ŝtato; ili estas ĉiutage kaj ĉiuhore sklavigitaj de la maŝino, de la superulo, kaj, super ĉiuj, de la individua kapitalista fabrikanto mem. Ju pli malkaŝe tiu ĉi despotismo proklamas la profiton kiel sian celon, des pli malgrandaĉa, des pli malaminda kaj pli maldolĉiganta ĝi estas.

Ju pli malmulte da lerteco kaj laboro aŭ forto estas postulata en mana laboro, alivorte, ju pli multe la moderna industrio disvolviĝas, des pli multe la laboro de viroj estas anstataŭata de tiu de virinoj. Diversecoj de aĝo kaj sekso ne plu havas klaran socian efikecon por la laboranta klaso. Ĉiuj estas iloj de laboro, pli aŭ malpli multekostaj por uzi, laŭ aĝo kaj sekso.

Tuj kiam la ekspluatado de la laboristo sub la manoj de la fabrikanto atingas finon ĝis tiu grado kie li ricevas sian pagon en kontanto, li estas atakata de la aliaj sekcioj de la kapitalistaro, la domluanto, la magazinisto, la pruntisto, k. t. p.

La malsupra tavolo de la meza klaso – la negrandaj komercistoj, vendejistoj, kaj ekŝiĝintaj komerculoj ĝenerale,

MANIFESTO DE LA KOMUNISTA PARTIO

la metiistoj kaj farmistoj – ĉiuj ĉi tiuj grade malleviĝas en la proletariaron, parte ĉar ilia eta kapitalo ne estas sufiĉa por la skalo laŭ kiu la moderna industrio estas administrata, kaj subiĝas en la konkurado kun la grandaj kapitalistoj; parte ĉar ilia specialigita lerteco estas farata senvalora per novaj metodoj de produktado. Tiel la proletariato rekrutiĝas el ĉiuj klasoj de la popolo.

La proletariato trapasas diversajn gradojn de disvolviĝo. De ĝia naskiĝo komencas ĝia batalado kontraŭ la kapitalistaro. Unue, la konkuro estas subtenata de individuaj laboristoj, poste de la gelaborantoj en ia fabrikejo, tiam de la metiistoj de unu metio, en unu loko, kontraŭ la individua kapitalisto kiu rekte ilin ekspluatas. Ili direktas siajn atakojn ne kontraŭ la kapitalismaj kondiĉoj de produktado, sed kontraŭ la iloj mem de produktado; ili detruas enportitajn komercaĵojn kiuj konkuras kun ilia laboro, ili pece rompegas maŝinojn, ili ekbruligas fabrikejojn; ili provas restarigi perforte la malaperintan staton de la laboristo de la mez-epoko.

Ĉe tiu ĉi grado la laboristoj ankoraŭ formas neinterligitan mason, dissematan tra la tuta lando, kaj disrompatan per sia reciproka konkurado. Se ie ili kuniĝas por formi pli kompaktajn korpojn, tiu ĉi ne estas ankoraŭ la sekvo de ilia agema unuiĝo, sed de la unuiĝo de la kapitalistaro, kiu klaso, por atingi siajn proprajn politikajn celojn, devegiĝas ekmovigi la tutan proletariaron, kaj plue, ankoraŭ dum kelka tempo povas tiel fari. Ĉe tiu ĉi punkto, tial, la preletarioj ne atakas siajn malamikojn, sed la malamikojn de siaj malamikoj, la restaĵojn de absoluta monarĥeco, la terposedantojn, la neindustrian kapitalistaron, la kapitaletulojn. Tiel la tuta historia movado koncentriĝas en la manojn de la kapitalistaro; ĉiu venko tiel atingata estas venko por la kapitalistaro.

Sed kun la disvolviĝo de la industrio la proletariato ne

Manifesto de la Komunista Partio el angla traduko
Esperantigita de Arturo Baker

sole kreskadas nombre; ĝi koncentriĝas en pli grandajn masojn, ĝia povo kreskas, kaj ĝi sentas tiun povon pli multe. La diversaj interesoj kaj statoj de vivado inter la vicoj de la proletario pli kaj pli multe egaliĝas, proporcie kiel la maŝino neniigas ĉiujn distingojn de laboro, kaj preskaŭ ĉie mallevas salajrojn ĝis la unu malalta nivelo. La kreskanta konkurado inter la kapitalistoj, kaj la rezultantaj komercaj krizoj, igas la salajron de la laboristoj ĉiam pli ŝanĝemaj. La senĉesa plibonigo de la maŝinaro, ĉiam pli rapide disvolviĝante, igas ilian vivrimedojn pli kaj pli necertaj; la kolizioj inter individuaj laboristoj kaj individuaj kapitalistoj prenas pli kaj pli multe la karakteron de kolizioj inter du klasoj. Tiaokaze, la laboristoj komencas formi kombinaĵojn (metiaj unuiĝoj) kontraŭ la kapitalistoj; ili kune klubiĝas por subteni la salajrajn prezojn; ili fondas daŭrajn asociojn por fari antaŭtempe provizojn por tiuj ĉi okazaj ribeloj. Tie ĉi tie la konkuro elrompas kiel malordegoj.

Kelkafoje la laboristoj venkas, sed nur dum iom da tempo. La efektiva frukto de iliaj bataloj konsistas ne en la tuja rezultato, sed en ia ĉiame vastiĝanta unuiĝo de la laboristoj. Tiu ĉi unuiĝo estas helpata de la plibonigataj rimedoj de komunikado kreataj de la moderna industrio, kiuj metas la laboristojn de diversaj lokoj en reciprokan kontakton. Precize tiu ĉi kontakto estis bezonata por centriĝi la multenombrajn lokajn batalojn, ĉiuj de la sama karaktero, en unu nacian bataladon inter klasoj. Sed ĉiu klasa batalado estas politika batalado. Kaj tiun unuecon, por kies atingo la burĝoj de la mezepokoj, kiun siaj malbonegaj vojoj, postulis jarcentojn, la modernaj proletarioj, dankon al fervojoj, atingas en kelke da jaroj.

Tiu ĉi organizado de la proletarioj en klason, kaj sekve en politikan partion, estas konstante ree renversata per konkurado inter la laboristoj mem. Sed ĝi ĉiam releviĝas, pli forta, pli fortika, pli povega. Ĝi devigas leĝfaran kon-

MANIFESTO DE LA KOMUNISTA PARTIO

feson de specialaj interesoj de la laboristoj, kaptante helpo el la dividoj inter la kapitalistaro mem. Tiel, la dek-hora leĝo en Anglujo estis farata.

Tute, la koliziojn inter la du klasoj de la malnova socio antaŭenigas, laŭ multaj manieroj, la kurso de disvolviĝo de la proletariaro. La kapitalistaro sin trovas envolvita en konstanta batalo. Unue, kontraŭ la aristokrataro; poste, kontraŭ tiuj porcioj de la kapitalistaro mem, kies interesoj fariĝis kontraŭaj al la progreso de industrio; ĉiame, kontraŭ la kapitalistaro de fremdaj landoj. En ĉiuj ĉi tiuj bataloj ĝi sin trovas devigata petegi al la proletariaro, peti ĝian helpo, kaj tiel treni ĝin en la politikan arenon. La kapitalistaro mem, provizas al la proletariaro siajn proprajn elementojn de politika kaj ĝenerala edukado, alivorte, ĝi provizas al la proletariaro armilojn por batalado kontraŭ la kapitalistaro.

Plue, kiel ni jam vidis, tutaj sekcioj de la regantaj klasoj estas, per la antaŭenirado de la industrio, ekpuŝataj en la proletariaron, aŭ almenaŭ minacataj en siaj kondiĉoj de vivado. Tiuj samaj ankaŭ provizas al la proletariaro freŝajn elementojn de klerigado kaj progresado.

Fine, dum tempoj kiam la klasa batalado alproksimiĝas la horon decidan, la dissolvado okazanta en la reganta klaso, laŭvere en la tuta vicaro de la malnova socio, prenas sur sin tiel bataleman, helegan karakteron ke malgranda sekcio de la reganta klaso detranĉas sin kaj aliĝas al la revoluciema klaso, la klaso, kiu tenas en siaj manoj la estontaĵojn. Ĝuste kiel, tial, en pli frua periodo, sekcio el la nobelaro alpasis al la kapitalistaro, tiel nun porcio el la kapitalistaro transpasas al la proletariaro, kaj, speciale, porcio el la kapitalismaj teorigoj, kiuj estas sin levintaj al nivelo de teoria kompreno de la historiaj movoj kiel tuto.

El ĉiuj la klasoj kiuj staras vizaĝo ĉe vizaĝo kun la kapitalistaro hodiaŭ, la proletariaro sole estas revoluciema

Manifesto de la Komunista Partio el angla traduko
Esperantigita de Arturo Baker

klaso. La aliaj klasoj velkas kaj fine malaperas antaŭ la marŝo de moderna industrio; la proletariato estas ĝia aparta kaj esenca produktaĵo.

La malsupra mezklaso, la malgranda fabrikanto, la vendejisto, la metiisto, la kamparano, ĉiuj ĉi tiuj batalas kontraŭ la kapitalistaro por savi de estingo sian ekziston kiel fraksioj de la meza klaso. Ili tial ne estas revoluciaj, sed konservativaj. Ne, plue, ili estas reakciaj, ĉar ili provas ruligi malantaŭen la radon de la historio. Se per ŝanco ili estas revoluciemaj, ili estas tiaj nur je la vido al sia okazonta transmeto en la proletarianon; ili tial defendas ne siajn nunajn, sed siajn estontajn interesojn; ili forlasas sian propran vidpunkton por sin meti en la proletarianan.

Tiu “danĝera klaso”, la socia feĉaĉo, tiu malageme putranta maso forĵetata de la plej malsupraj tavoloj de la malnova socio, eble, tie ĉi tie, estos enbalaata en la movadon de proletaria revolucio; ĝiaj vivkondiĉoj, tamen, tre pli multe ĝin preparas por rolo de dungita ilo de reakcia intrigo.

En la kondiĉoj de la proletariato, tiuj de malnova socio ĝenerale estas jam praktike submetitaj. La proletario estas sen propraĵo; lia rilato kun sia edzino kaj infanoj havas ne plu ion komunan kun la kapitalistaj familiaj rilatoj; moderna industria laboro, moderna submetado al kapitalo, tiel same en Anglujo kiel en Francujo, en Ameriko kiel en Germanujo, estas nudigintaj lin je ĉia signeto de nacia karaktero. Leĝo, moraleco, religio, estas por li tiom multaj kapitalistaj antaŭjuĝoj, post kiuj embuskiĝas ĝuste tiom da kapitalistaj intereso.

Ĉiuj antaŭirantaj klasoj kiuj atingis la superecon, provis fortikigi sian jam atingitan staton per la submetado de la ĝenerala socio al siaj kondiĉoj de alproprigado. La proletarioj ne povas fariĝi mastroj de la produktantaj povoj de la

MANIFESTO DE LA KOMUNISTA PARTIO

socio, escepte per forigo de sia propra antaŭa metodo de alproprigado, kaj per tio ankaŭ de ĉiu alia antaŭa metodo de alproprigado. Ili havas nenion propran por gardi kaj fortikigi; ilia funkcio estas detrui ĉiujn antaŭajn gardilojn kaj certigilojn de individua propreco.

Ĉiuj ĝisnunaj movadoj historiaj estis movadoj de malplimultoj, aŭ por la intereso de malplimultoj. La proletaria movado estas la memkonscia, nedependa movado de la grandega plimulto. La proletariato, la plej malsupra tavolo de nia nuna socio, ne povas ekmovi, ne povas sin levi ne ĵetante aeren la tutan superkuŝantan tavolon de la oficiala socio.

Kvankam ne laŭ substanco, tamen laŭ formo, la batalado de la proletariato kun la kapitalistaro estas, komence, nacia batalado. Unue el ĉio, la proletariato de ĉiu lando devegas, kompreneble, fini aferojn kun sia propra kapitalistaro.

Elmontrante la plej ĝeneralajn fazojn de la disvolviĝo de la proletariato, ni montris la pli aŭ malpli vualatan internan militon, okazantan en ekzistanta socio, ĝis punkto kie tiu milito elrompas en malkaŝatan revolucion, kie la perforta renverso de la kapitalistaro preparas la fondaĵon por la regado de la proletariato.

Ĝisnune, ĉiu formo de la socio estas fondita, kiel ni jam vidis, sur la antagonismo inter subpremantaj kaj subpremataj klasoj. Sed por subpremi klason, certaj kondiĉoj devegas esti certigataj al ĝi, laŭ kiuj ĝi povas almenaŭ daŭrigi sian sklavan ekziston. La servutulo, dum la periodo de servuteco, sin levis al membriĝo en la komunumo, ĝuste kiel la kapitaletulo, sub la jugo de la feŭda absolutismo, disvolviĝis en kapitaliston. Male, la moderna laboristo, anstataŭ leviĝi kun la progreso de la industrio, malleviĝas pli kaj pli profunde sub la kondiĉoj de ekzistado de sia propra klaso. Li fariĝas senhavulo, kaj senhaveco kreskas pli rapide ol la loĝantaro kaj riĉeco. Kaj tie ĉi evidentiĝas ke

Manifesto de la Komunista Partio el angla traduko
Esperantigita de Arturo Baker

la kapitalistaro ne taŭgas esti iel plu la reganta klaso en la socio, kaj altrudi siajn kondiĉojn de ekzistado al la socio kiel superrajdanta leĝo. Ĝi ne taŭgas por regadi, ĉar ĝi ne povas certigi al sia sklavo ekzistadon en lia sklaveco, ĉar ĝi ne povas malhelpi lian malleviĝon en tian staton ke ĝi devegas lin nutri, anstataŭ esti nutrata de li. La socio ne plu povas vivi sub tiu ĉi kapitalistaro; alivorte, ĝia ekzistado ne plu kongruas kun la socio.

La esenca kondiĉo por la ekzistado, kaj por la regado de la kapitalista klaso, estas la kreado kaj kreskado de kapitalo; la kondiĉo por la kapitalo estas dungata laboro. Dungata-laboro staras ekskluzive sur konkurado inter la laboristoj. La antaŭeniro de la industrio, kies nevola puŝanto estas la kapitalistaro, anstataŭas la izolecon de la laboristoj, la sekvo de konkurado, per ilia nevola kuniĝo, la sekvo de asociado. La disvolviĝo de la moderna industrio, tial, detrenas de sub ĝiaj piedoj eĉ la fondaĵon sur kiu la kapitalistaro produktas kaj alproprigas produktaĵojn. Tial, tio kion la kapitalistaro produktas estas, antaŭ ĉio, ĝiaj propraj tombistoj. Ĝia falo kaj la venko de la proletariaro estas egale neeviteblaj.

II. PROLETARIOJ KAJ KOMUNISTOJ

En kia rilato staras la komunistoj al la proletarioj kiel tuto?

La komunistoj ne estas aparta partio opozicianta aliajn laborklasajn partiojn.

Ili havas neniajn sektajn interesojn apartajn el tiuj de la tuta proletario.

Ili ne starigas sektajn principojn siajn laŭ kiuj formi kaj modeli la proletarian movadon.

La komunistoj estas distingataj el la aliaj laborklasaj partioj nur per tiu ĉi: 1. En la naciaj bataladoj de la proletarioj de diversaj landoj, ili elmontras kaj portas al la fronto la komunajn interesojn de la tuta proletario, nedepende de ĉia nacieco. 2. En la diversaj gradoj de disvolviĝado tra kiuj la batalado de la laborklaso kontraŭ la kapitalistaro devegvas pasi, ili ĉiam kaj ĉie reprezentadas la interesojn de la movado kiel unu tuto.

La komunistoj tial estas, unuflanke, praktike la plej antaŭa kaj decidema sekcio el la laborklasaj partioj en ĉiu lando, tiu sekcio kiu puŝas antaŭen ĉiujn aliajn; aliflanke, teorie, pli ol la granda masego de la proletario ili posedas tiun ĉi helpilon – ili klare komprenas la vojon de la marŝo, la kondiĉojn, kaj la finajn ĝeneralajn rezultatojn de la proletaria movado.

La tuja celo de la komunistoj estas tia sama kiel tiu de ĉiuj aliaj proletariaj partioj: formado de la proletario en klason, renverso de kapitalista supereco, ekkapto de politika povo de la proletario.

La teoriaj konkludoj de la komunistoj neniel estas fondat-

Manifesto de la Komunista Partio el angla traduko
Esperantigita de Arturo Baker

aj sur ideoj aŭ principoj kiuj estas elpensitaj, aŭ eltrovitaj, de unu aŭ alia kiu volas esti universala reformisto.

Ili nur esprimas, en ĝeneralaj terminoj, efektivajn rilatojn kreskantajn el ekzistanta interklasa batalado, el historia movado okazanta vere antaŭ niaj okuloj. La forigo de ekzistantaj proprecaj rilatoj tute ne estas distinga karakter-aĵo de komunismo.

Ĉiuj proprecaj rilatoj estintaj estas ĉiam regitaj de historia ŝanĝo, sekve de la ŝanĝado en historiaj kondiĉoj.

La Franca Revolucio, ekzemple, forigis feŭdan proprecon, anstataŭigante kapitalistan proprecon.

La distinganta eco de komunismo ne estas la forigo de propreco ĝenerale, sed la forigo de kapitalista propreco. Sed moderna kapitalista privata propraĵo estas la fina kaj plej perfekta esprimo de la sistemo por la produktado kaj alproprigo de produktaĵoj, fondita sur klasaj antagonismoj, la ekspluatado la multajn de la malmultaj.

Laŭ tiu ĉi senco la teorio de la komunistoj povas sumiĝi en unu frazo: Forigo de privata propreco.

Ni komunistoj estas riproĉitaj je la deziro forigi la rajton de la individua akirado de posedaĵo kiel la frukto de la propra laboro de homo, kiu posedaĵo, oni pretendas, estas la fondaĵo de ĉia persona libereco, agemo kaj sendependeco.

Malfacile-gajnita, persone akirita, mem perlaborita posedaĵo! Ĉu vi priparolas la propraĵon de la malgranda metiisto kaj de la farmisto, formon de posedaĵo kiu antaŭ-datas la kapitalistan formon? Ne estas bezone tiun forigi; la disvolviĝo de la industrio jam estas ĝin detruinta, laŭ granda mezuro, kaj ankoraŭ ĉiutage ĝin detruas.

Aŭ ĉu vi priparolas modernan kapitalistan posedaĵon?

MANIFESTO DE LA KOMUNISTA PARTIO

Sed ĉu dungata laboro kreas ian proprajon por la laboristo? Ne unu peceton. Ĝi kreas kapitalon, t. e., tiun specon de posedaĵo kiu ekspluatas dungatan laboron, kaj kiu ne povas kreski sen la kondiĉo ke ĝi ricevu novan provizon da dungata laboro por freŝa ekspluatado. Posedaĵo, en sia nuna formo, fondiĝas sur la antagonismo inter kapitalo kaj salajra laboro. Ni ekzamenu ambaŭ flankojn de tiu ĉi antagonismo.

Esti kapitalisto, estas havi ne sole tute personan, sed socian etaton en produktado. Kapitalo estas kolektiva produktaĵo, kaj nur per la kuna agado de multaj membroj – ne, je la fina analizo, nur per la kuna agado de ĉiuj membroj de la socio – ĝi povas moviĝi.

Kapitalo, tial, ne estas persona, ĝi estas socia povo.

Tial, kiam kapitalo ŝanĝiĝas al komuna posedaĵo, al la propraĵo de ĉiuj membroj de la socio, persona posedaĵo ne estas tial aliformita al socia posedaĵo. Nur la socia karaktero de la posedaĵo estas ŝanĝata. Ĝi perdas sian klasan karakteron.

Ni nun konsideru dungan laboron.

La meza prezo de dunga laboro estas la minimuma salajro, t. e. tiu kvanto de la rimedoj de nutrado kiu estas absolute necesa por subteni la laboriston en nura ekzistado kiel laboristo. Tial, tio kion la laboristo alproprigas al si per sia laboro, nur sufiĉas por daŭrigi kaj reprodukti nuran ekzistadon. Ni neniel intencas forigi tiun ĉi personan alproprigadon de la produktaĵoj de laboro, alproprigado kiu estas farata por la subtenado kaj reproduktado de homa vivo, kaj kiu lasas nenian restaĵon per kiu ordoni al si la laboron de aliaj. Ĉio kion ni deziras forigi estas la mizeran karakteron de tiu ĉi alproprigado, laŭ kiu la laboristo vivadas nur por pligrandigi kapitalon, kaj estas permesata vivi nur tiel multe kiel la intereso de la reganta klaso ĝin pos-

Manifesto de la Komunista Partio el angla traduko
Esperantigita de Arturo Baker

tulas.

En kapitalista socio, vivanta laboro estas nur rimedo por pligrandigi amasigitan laboraĵon. En komunista socio, amasigita laboraĵo estas nur rimedo por plilarĝigi, riĉigi, promocii la ekziston de la laboristo.

En kapitalista socio, tial, la estinteco kontrolas la estant-econ; en komunista socio la estanteco kontrolas la estint-econ. En kapitalista socio kapitalo estas nedependa kaj havas individuecon.

Kaj la forigo de tiu ĉi stato de aferoj estas nomata de la kapitalistaro: forigo de individueco kaj libereco! Kaj prave tiel. La forigo de kapitalista individueco, kapitalista nedependeco, kaj kapitalista libereco certe estas alcelata.

Per “libereco” estas signataj, sub la nunaj kapitalistaj kondiĉoj de produktado, libera komercado, liberaj vendado kaj aĉetado.

Sed se la vendo kaj aĉeto malaperas, liberaj vendado kaj aĉetado ankaŭ malaperas. Tiu ĉi dirado pri liberaj vendado kaj aĉetado, kaj la aliaj “bravaj vortoj” de nia kapitalistaro pri libereco ĝenerale, havas signifon, se ian, nur per kontrasto kun la limigitaj vendado kaj aĉetado, kun la katenitaj komercistoj de la mezepokoj, sed havas nenian signifon rilate la komunistan forigon de la vendo kaj aĉeto, de la kapitalistaj kondiĉoj de produktado, kaj la kapitalistaro mem.

Vi estas terurigata de nia intenco forigi la privatan propraĵon. Sed en via ekzistanta socio, privata propraĵo jam estas forigita al naŭ dekonoj de la loĝantaro; ĝia ekzisto por la malmulto estas sole ŝuldata al ĝia neekzisto en la manoj de tiuj naŭ dekonoj. Vi nin riproĉas, tial, je la intenco forigi formon de propraĵo, la necesa kondiĉo por kies ekzistado estas la neekzistado de ia propraĵo por la granda plimulto

MANIFESTO DE LA KOMUNISTA PARTIO

de la socio.

Unuvorte, vi riproĉas nin je la intenco forigi vian propr-aĵon. Precize tiel; tio estas ĝuste kion ni intencas.

De tiu momento kiam laboro ne plu povas esti ŝanĝata en kapitalon, monon, lupagon, en socian povon kiu estas monopoligebla, t. e., de la momento kiam individua propr-aĵo ne plu povas esti aliformigata en kapitalistan propr-aĵon, en kapitalon, de tiu momento, vi diras, individueco malaperas.

Vi devas, tial, konfesi ke per “individuo” vi parolas pri neniu alia persono ol la kapitalistaro, ol la mezklasa posedanto de propr-aĵo. Tiu ĉi persono ja devas esti forbalaata de la vojo, kaj nebligata.

Komunismo deprenas de neniu homo la povon alproprigi la produktaĵojn de la socio; ĉio kion ĝi faras estas depreni de li la povon subjugigi la laboron de aliaj personoj per tia alproprigo.

Estas kontraŭdirite, ke je la forigo de privata propreco ĉia laboro ĉesos, kaj universala mallaboremo nin kaptos.

Laŭ tiu ĉi, kapitalista socio jam longe antaŭe devis “iri al la hundoj” per tuta mallaboremo; ĉar tiuj el ĝiaj anoj kiuj laboras, nenion akiras, kaj tiuj kiuj ion akiras, ne laboras. La tuto de tiu ĉi kontraŭdiro estas nur alia esprimo de la ripetaĵo: ke ne povos esti plu ia salajra laboro, kiam ne plu estos iom da kapitalo.

Ĉiuj kontraŭdiroj farataj kontraŭ la komunista metodo por la produktado kaj alproprigado de materiaj produktaĵoj, sammaniere estas faritaj kontraŭ la komunistaj metodoj por produkti kaj alproprigi intelektajn produktaĵojn. Ĝuste kiel, al la kapitalistaro, la malapero de klasa propreco estas la malapero de produktado mem, tiel la malapero de klasa kulturo estas por ili identa kun la malapero de ĉia kulturo.

Manifesto de la Komunista Partio el angla traduko Esperantigita de Arturo Baker

Tiu kulturo, kies perdon li tiel multe bedaŭras, estas, por la granda plimulto, nur dresado por agi kiel maŝino.

Sed ne malpacu kun ni tiel longe kiel vi aplikas al nia intencata forigo de kapitalista propreco la mezurilon de viaj kapitalistaj ideoj pri la libereco, la kulturo, la leĝo, k. t. p. Eĉ viaj ideoj estas nur la elkreskaĵo el la kondiĉoj de via kapitalista produktado kaj kapitalista propreco, ĝuste kiel via juĝsistemo estas nur la volo de via klaso enleĝigitaj por ĉiuj, volo kies esenca karaktero kaj direkto estas determinataj per la ekonomiaj kondiĉoj de ekzisto de via klaso.

La egoista malkompreno kiu logas vin aliformigi en eternajn leĝojn de naturo kaj rezono la sociajn formojn elkreskantajn el via nuna metodo de produktado kaj formo de propriaĵo – historiaj rilatoj kiuj aperas kaj malaperas en la progreso de produktado – tiun malkomprenon vi havas kune kun ĉiu reganta klaso kiu iris antaŭ vi. Tion kion vi klare vidas rilate al antikva propreco, kion vi konfesas rilate al feŭda propreco, vi kompreneble estas malpermesata konfesi pri via propra kapitalista propreco.

Forigo de la familio! Eĉ la plej radikalaj ekkoleriĝas je tiu ĉi malhonorega propono de la komunistoj.

Sur kia fondaĵo estas la nuntempa familio, la kapitalista familio, fondata? Sur kapitalo, sur privata gajno. En ĝia plene disvolvita formo tiu ĉi familio ekzistas nur inter la kapitalistaro. Sed tiu stato de aferoj trovas sian komplementon en la praktika neesto de la familio inter la proletarioj, kaj en publika prostituado.

La kapitalista familio malaperos, estas kompreneble, kiam ĝia komplemento malaperos, kaj ambaŭ malaperos je la malapero de kapitalo.

Ĉu vi ŝarĝas nin je la deziro ĉesigi la ekspluatadon de infanoj de iliaj gepatroj? Tiun ĉi krimon ni konfesas.

MANIFESTO DE LA KOMUNISTA PARTIO

Sed, vi diros, ni detruas la plej sanktajn rilatojn, kiam ni anstataŭas la hejman edukadon per la socia.

Kaj via edukado! Ĉu tiu ankaŭ ne estas socia, kaj determinata de la sociaj kondiĉoj sub kiuj vi edukadas, kaj per la interveno, senpera aŭ pera, de la socio per lernejoj, k.t.p.? La komunistoj ne elpensis la intervenon de la socio en edukadon; ili nur provas ŝanĝi la karakteron de tiu interveno, kaj savi edukadon el la influo de la reganta klaso.

La kapitalista sensencaĵo pri la familio kaj edukado, pri la sanktigitaj kunrilatoj de la gepatroj kaj infanoj, iĝas tute ju pli naŭza, des pli, per la agado de Moderna Industrio, ĉiuj familiaj ligoj inter la proletarioj estas disrompataj, kaj iliaj infanoj aliformigataj je simplajn aĵojn de komerco kaj ilojn de laboro.

Sed vi komunistoj ekstarigus komunecon je virinoj! ĥore kriegas la tuta kapitalistaro.

La kapitalisto vidas je sia edzino nur ilon de produktado. Li aŭdas ke la iloj de produktado estas ekspluatataj komune, kaj, nature, povas atingi nenian konkludon alian ol ke la sorto de la komuneco al ĉiuj simile estos lotumata al la virinoj.

Li eĉ ne suspektas, ke la punkto efektive alcelata estas la forigo de la etato de la virinoj kiel nuraj iloj de produktado.

Pri la restaĵo, nenio estas pli ridinda, ol la virta indigno de nia kapitalistaro je la komuneco de virinoj, kiu, ili pretendas, estas malkaŝe kaj oficiale starigota de la komunistoj. La komunistoj havas nenian bezonon enigi komunecon de la virinoj. Ĝi jam ekzistas preskaŭ de tempo nememorebla.

Nia kapitalistaro, ne kontenta havante la edzinojn kaj filinojn de la proletariato je sia dispono, ne priparoli pri ordinaraj komunulinoj, havas la plej grandan plezuron

Manifesto de la Komunista Partio el angla traduko
Esperantigita de Arturo Baker

delogante unu la edzinon de alia.

Kapitalista edzeco estas efektive sistemo de edzinoj en komuneco, kaj tiel, la plejmulto je kiu la komunistoj eble povus esti riproĉataj estas, ke ili deziras enporti, anstataŭ hipokrite kaŝata, malkaŝe legitimatan komunecon de virinoj. Pri la restaĵo, estas memevidente, ke la forigo de la nuntempa sistemo de produktado devegus kunporti kun si la forigon de la komuneco de virinoj elkreskantan el tiu sistemo, t. e., la forigon de la prostituado, ambaŭ publika kaj privata.

La komunistoj estas plue riproĉataj je la deziro forigi la landojn kaj la naciecojn.

La laboristoj havas nenian landon. Oni ne povas forpreni de ili tion kion ili ne posedas. Ĉar la proletario, unue el ĉio, devas akiri politikan superecon, devas leviĝi ĝis ĝi estos la plej antaŭa klaso el la nacio, devas starigi sin kiel la nacio, ĝi estas, tiel multe, nacia, kvankam ne laŭ la kapitalista senco de la vorto.

Naciaj diferencoj, kaj antagonismoj inter popoloj, ĉiutage pli kaj plimulte malaperas, sekve de la disvolviĝo de la kapitalistaro, de la libereco de komerco, de la tutmonda vendejgo, de unuformeco en la metodo de produktado kaj en la kondiĉoj de vivo respondaj al tio.

La supereco de la proletariato igos ilin malaperi pli kaj pli rapide. Kuna agado, almenaŭ de la plej antaŭaj civilizitaj nacioj, estas unu el la unuaj kondiĉoj por la liberigo de la proletariato.

Proporcio kiel la ekspluatado de unu individuo de alia finiĝos, la ekspluatado de unu nacio de alia estos ankaŭ finata. Proporcio kiel la antagonismo inter klasoj interne de la nacio malaperas, la malamikeco de unu nacio kontraŭ la alia atingos sian finon.

MANIFESTO DE LA KOMUNISTA PARTIO

La kulpigoj kontraŭ komunismo farataj de religia, filozofia, kaj ĝenerale de teorista vidpunkto, ne meritas seriozan ekzamenon.

Ĉu profunda komprenemo necesas por kompreni ke la ideoj, vidoj, kaj ideigoj de la homo, unuvorte, la konscieco de la homo ŝanĝas kun ĉiu ŝanĝo en la kondiĉoj de lia materia ekzistado, en liaj sociaj rilatoj kaj en lia socia vivo?

Kion alian pruvas la historio de ideoj, ol ke la intelekta produktado ŝanĝiĝas laŭ karaktero proporcie kiel la materia produktado estas ŝanĝata? La regantaj ideoj de ĉiu epoko estis ĉiam la ideoj de ĝia reganta klaso.

Kiam oni priparolas ideojn kiuj revoluciigas la socion, ili nur esprimas la fakton, ke interne de la malnova socio, estas kreitaj la elementoj de¹ nova, kaj ke la dissolvado de la malnovaj ideoj egale progresas kun la dissolvado de la malnovaj kondiĉoj de ekzistado.

Kiam la antikva mondo estis en siaj mortdoloregoj, la antikvaj religioj estis venkataj de kristanismo. Kiam kristanaj ideoj cedis en la dekoka jarcento al racionalismaj ideoj, la feŭda socio faris sian mortbatalon kontraŭ la tiame revolucia kapitalistaro. La ideoj pri religia libereco kaj libereco de la konscienco nur esprimis la regadon de libera konkurado en la regionoj de la scio.

“Sendube”, estos dirate, “religiaj, moralaj, filozofiaj kaj juĝsciencaj ideoj estas ŝanĝitaj laŭ la kurso de historia disvolviĝado. Sed la religio, la moralo, la filozofio, la politika scienco, konstante postvivis tiun ŝanĝon.”²

“Ekzistas, cetere, eternaj veroj, tiaj kiaj Libereco, Justeco, k. c., kiuj komunas je ĉiuj statoj de la socio. Sed komunismo forigas eternajn verojn, ĝi forigas ĉian religion kaj ĉian moralecon, anstataŭ restarigi ilin sur novan fondaĵon;

1 en la originalo: „... ne ...”. -vl

2 en la originalo mankas la citilo fine de la paragrafo. -vl

Manifesto de la Komunista Partio el angla traduko
Esperantigita de Arturo Baker

ĝi tial agas kontraŭe al ĉia estinta historia sperto.”

Al kio tiu ĉi kulpigo sin redukcias? La historio de la tuta estinta socio konsistis el la kreskado de klasaj antagonismoj, de antagonismoj kiuj prenis sur sin diversajn formojn dum diversaj epokoj.

Sed, kian ajn formon ili estas prenintaj, unu fakto komunas je ĉiuj estintaj epokoj, t.e., la ekspluatado de unu parto de la socio sub la alia. Ne mirinde estas, do, ke la socia konscieco de estintaj epokoj, spite la ĉioma multobl-eco kaj diverseco kiun ĝi elmontras, movas laŭ certaj komunaj formoj, formoj, aŭ ĝeneralaj ideoj, kiuj ne povas tute malaperi sen la tuta malapero de klasaj antagonismoj.

La komunista revolucio estas la plej radikala rompo de tradiciaj proprecaj rilatoj; ne estas mirinde ke ĝia kreskado envolvas la plej radikalan rompon de tradiciaj ideoj.

Sed ni finu pri la kapitalistaj kontraŭdiroj kontraŭ komunismo.

Ni vidis supre, ke la unua paŝo en la revolucio de la laborklaso estas levi la proletarion al la pozicio de reganta klaso, venki en la batalo de la demokratio.

La proletariaro uzos sian politikan superecon por forpreni, grade, la tutan kapitalon de la kapitalistaro; centrigi ĉiujn rimedojn de produktado en la kontrolon de la ŝtato, t. e., de la proletariaro organizita kiel la reganta klaso; kaj kreskigi la tuton de produktantaj povoj kiel eble plej rapide.

Kompreneble, je la komenco tiu ĉi ne povas efektiviĝi escepte per despotaj trudoj al la rajtoj de propreco kaj al la kondiĉoj de kapitalisma produktado; per rimedoj, do, kiuj ŝajnas ekonomie nesufiĉaj kaj neteneblaj, sed kiuj, laŭ la kurso de la movado, preterpasas sin mem, necesigante pluajn trudojn al la malnova socia ordo, kaj estas neeviteblaj kiel rimedoj por la plena revoluciado de la metodo de

MANIFESTO DE LA KOMUNISTA PARTIO

produktado.

Kompreneble, tiuj ĉi rimedoj diferencos en diversaj landoj.

Tamen, en la plej antaŭaj landoj la sekvantaj estos tute ĝenerale alfareblaj:

1. Forigo de propreco de tero kaj uzado de ĉiuj lupagoj je la tero por bezonoj publikaj.

2. Peza progresanta aŭ gradigita renta imposto.

3. Forigo de ĉiuj rajtoj de heredo.

4. Ŝtata ekpreno de la posedaĵo de ĉiuj elmigrantoj kaj ribelantoj.

5. Alcentrigo de la kredito al kontrolo de la ŝtato, per nacia banko havanta ŝtatan kapitalon kaj ekskluzivan monopolon.

6. Alcentrigo de la rimedoj de interkomunikado kaj transportado al la kontrolo de la ŝtato.

7. Vastigado de fabrikejoj kaj iloj de produktado posedataj de la ŝtato; la submeto al kulturo de dezertaj teroj, kaj la plibonigo de la tero ĝenerale laŭ komuna plano.

8. Egala devedo de ĉiuj labori. Starigo de industriaj armeoj, speciale por la terkulturado.

9. Kunligo de la terkulturo kun fabrikaj industrioj; laŭgrada forigo de la distingo inter urbo kaj kamparo, per pli egala disloĝiĝo de la popolo tra la kamparo.

10. Senpaga edukado por ĉiuj infanoj en publikaj lernejoj. Forigo de enfabrikeja laboro de infanoj laŭ ĝia nuna formo. Kunigo de edukada laboro kun industria produktado, k. c., k. c.

Kiam, laŭ la kurso de disvolviĝado, klasaj distingoj estos

Manifesto de la Komunista Partio el angla traduko
Esperantigita de Arturo Baker

malaperintaj, kaj ĉia produktado koncentriĝinta en kontrolon de vasta asocio konsistanta el la tuta nacio, la publika povo perdos sian politikan karakteron. Politika povo, prave tiel nomata, estas nur la organizita povo de unu klaso por subpremi alian. Se la proletariaro, dum sia batalo kun la kapitalistaro, estas devegata, per la povo de cirkonstancoj, sin organizi kiel klaso; se, per revolucio, ĝi igas sin la reganta klaso, kaj, kiel tia, forbalaas perforte la malnovajn kondiĉojn de la produktado, tiam, kune kun tiuj kondiĉoj, ĝi estos forbalainta la kondiĉojn por la ekzistado de klasaj antagonismoj, kaj de klasoj ĝenerale, kaj estos foriginta tiele sian propran superecon kiel klaso.

Anstataŭ la malnova kapitalista socio kun ĝiaj klasoj kaj klasaj antagonismoj, ni havos asocion, en kiu la libera kreskado de ĉiu estas la libera kondiĉo por la kreskado de ĉiuj.

III

SOCIALISTA KAJ KOMUNISTA LITERATURO

1. *Reakcia Socialismo*

a. Feŭda Socialismo

Pro ilia historia situacio, fariĝis la okupo de la aristokrat-aroj de Francujo kaj Germanujo verki pamfletojn kontraŭ la moderna kapitalista socio. En la franca revolucio de Julio, 1830, kaj dum la angla reforma agitado, tiuj ĉi aristokrat-aroj ree cedis al la malaminda elsaltulo. De tiam, serioza politika konkuro estis tute ekster la eblaĵoj. Literatura batalado sole restis ebla. Sed eĉ en la regejo de la literaturo la malnovaj krioj de la *restoration*'a¹ tempo fariĝis neebblaj.

Por veki simpatian, la aristokrataro devegis meti for la zorgon, ŝajne, pri siaj propraj intereso, kaj formuli sian kulpigon kontraŭ la kapitalistaro por la intereso sole de la ekspluatata laborklaso. Tiel la aristokrataro devegis, por revenĝo, kanti satiraĵojn kontraŭ sia nova reganto, kaj paroleti en liajn orelojn minacajn profetaĵojn pri venonta katastrofo.

Tiamaniere ekleviĝis la feŭda socialismo: duone ploraĵo, duone satiraĵo; duone eĥo el la estinteco, duone minaco al la estonteco; kelkfoje per sia maldolĉa, sprita kaj akra kritiko frapante la kapitalistaron ĝis la internaĵo de la koro, sed ĉiam rideginda je siaj rezultatoj, pro tuta nekapableco

1 Ne la angla "Restoration" 1660 ĝis 1689, sed la franca "Restoration" 1814 ĝis 1830.

Manifesto de la Komunista Partio el angla traduko Esperantigita de Arturo Baker

kompreni la marŝon de la moderna historio.

La aristokrataro, por varbi al si la homojn, flirtigis ĉe la fronto la proletarian almozo-saketon kiel standardon. Sed la popolo, tiel ofte kiel ĝi aliĝis ilin, vidis sur iliaj postaĵoj la malnovajn feŭdajn blazonŝildojn, kaj forlasis ilin kun laŭta kaj neriverenca ridado.

Unu sekcio el la francaj Legitimistoj, kaj “Juna Anglujo” prezentis tiun spektaklon.

Elmontrante ke ilia metodo de ekspluatado diferencis je tiu de la kapitalistaro, la feŭdistoj forgesis ke ili ekspluatis laŭ cirkonstancoj kaj kondiĉoj kiuj estis tute malsamaj, kaj kiuj nun estas antikviĝintaj. Montrante, ke sub sia regado la moderna proletariaro neniam ekzistis, ili forgesis ke la moderna kapitalistaro estas la necesa elkreskaĵo de ilia propra formo de socio.

Rilate al la aliaj, tiel malmulte ili kaŝas la reakcian karakteron de sia kritiko, ke ilia ĉefa kulpigo kontraŭ la kapitalistaro sumiĝas jene: ke sub la kapitalista regado klaso estas kreskigata, kiu estas destinata eltranĉi radikon kaj branĉon de la malnova formo de la socio.

Tio je kio ili kulpigas la kapitalistaron ne estas tiom ke ĝi kreas proletarion kiom ke ĝi kreas revolucion proletarion.

En la politika praktiko, tial, ili aliĝas al ĉiuj perfortaj agadoj kontraŭ la laborklaso; kaj en la privata vivo, malgraŭ siaj belsonaj frazoj, ili kliniĝas por ekpreni la orajn pomojn falintajn el la arbo de la industrio, kaj por intermarĉandi la veron, la amon, kaj la honoron por la komercado je lano, betsukero, kaj spirituso terpoma.¹

1 Tiu ĉi rilatas precipe Germanujon, kie la bona aristokrataro kaj nobelaĉuloj kulturigas por sia propra kalkulo grandajn porciojn da siaj bienoj, per administrantoj, kaj estas, plue, pograndaĵoj betsukeraĵaj fabrikantoj kaj distilantoj de spirituso terpoma. La

MANIFESTO DE LA KOMUNISTA PARTIO

Kaj kiel la pastro ĉiam marŝis mano en mano kun la bienulo, tiel ankaŭ marŝis pastrara socialismo kun feŭda socialismo.

Nenio estas pli facila ol doni al kristana asketicismo socialistan nuancon. Ĉu ne kristanismo deklamis kontraŭ la privata propraĵo, kontraŭ la edzeco, kontraŭ la ŝtato? Ĉu ĝi ne predikis anstataŭ tiuj ĉi almozdonadon kaj malriĉecon, fraŭlecon kaj subpremado de la "karno", la monaĥejan vivadon kaj eklezion patrinan? Kristana socialismo estas nur la sankta akvo per kiu la pastro dediĉas kordolorojn de la aristokrato.

b. Kapitaletula Socialismo

La feŭda aristokrataro ne estis la sola klaso ruinigata de la kapitalistaro, ne la sola klaso kies kondiĉoj de ekzistado forvelkis kaj pereis en la atmosfero de la nuntempa kapitalista socio. La mezepokaj burĝoj kaj la malgrandaj farmistaj kapitalistoj, estis la antaŭuloj de la moderna kapitalistaro. En tiuj landoj, kiuj estas nur malmulte disvolviĝintaj, industrie kaj komerce, tiuj du klasoj ankoraŭ kreskadas flanko flankon kun la leviĝanta kapitalistaro.

En landoj kie la moderna civilizacio estas plene kreskinta, nova klaso de kapitaletuloj estas formita, ŝanceliĝante inter proletariato kaj kapitalistaro, kaj ĉiam sin renovigante kiel aldonatan parton de la kapitalista socio. La individuaj membroj de tiu ĉi klaso, tamen, estas konstante ĵetataj malsupren en la proletariaron per la agado de la konkuro, kaj, dum la moderna industrio kreskas, ili eĉ vidas alproksimiĝanta la momenton kiam ili tute malaperos kiel nedependa sekcio de la moderna socio, anstataŭote, en la

pli riĉaj britaj aristokratoj estas ankoraŭ iom pli altaj ol tio; sed ili, ankaŭ, scias kiel sin rekompenci por malpligrandigantaj rentoj per la prunto de siaj nomoj al iniciatoroj de pli malpli "mallumaj" akci-kompanioj.

Manifesto de la Komunista Partio el angla traduko
Esperantigita de Arturo Baker

fabrikado, la terkulturo kaj la komerco, de superuloj, administrantoj kaj laborestroj.

En tiaj landoj kia Francujo, kie la farmistoj estas multe pli ol duono da la loĝantaro, estis nature ke la verkistoj, kiuj staras kun la proletario kontraŭ la kapitalistaro uzas, en sia kritiko pri la kapitalista regado, la mezurilon de la farmisto kaj kapitaletulo, kaj de la vidpunkto de tiuj intermezaj klasoj eklevas la bastonegojn por la laborklaso. Tiel leviĝis la kapitaletula socialismo. Sismondi estis la estro de tiu ĉi anaro, ne sole en Francujo, sed ankaŭ en Anglujo.

Tiu ĉi skolo de la socialismo dispecigis kun granda komprenemo la kontraŭaĵojn en la kondiĉoj de moderna produktado. Ĝi nudigis la hipokritajn apologiojn de ekonomistoj. Ĝi pruvis, nekontraŭdireble, la katastrofajn rezultatojn de la maŝinaro kaj la divido de laboro; la koncentrigo de la kapitalo kaj la tero en malmultajn manojn; troproduktado kaj krizoj; ĝi elmontris la neeviteblan ruinigon de la kapitaletulo kaj farmisto, la mizeron de la proletario, la anarĥion en la produktado, la treegajn neegalecojn en la distribuado de riĉeco, la industrian bataladon de ekstermo inter nacioj, la dissolvon de malnovaj moralaj ligoj, familiaj rilatoj kaj naciecoj.

Laŭ siaj pozitivaj celoj, tamen, tiu ĉi speco de socialismo aspiras aŭ restarigi la malnovajn rimedojn de produktado kaj interŝanĝado, kaj kun ili la malnovajn proprecajn rilatojn, kaj la malnovan socion, aŭ premadi la modernajn rimedojn de produktado kaj interŝanĝado en la kadro de la malnovaj proprecaj rilatoj, kiuj estis, kaj destiniĝis esti, tiele eksplodigitaj. Iaokaze, ĝi estas ambaŭ reakcia kaj utopia.

Ĝiaj lastaj vortoj estas: enkorpigitaĵ gildoj por la fabrikado; patriarkaj rilatoj en la terkulturo.

Fine, kiam obstinaj historiaj faktoj estis dispelintaj ĉiujn

MANIFESTO DE LA KOMUNISTA PARTIO

ebriigantajn efikaĵojn de memtrompo, tiu ĉi speco de socialismo finiĝis per mizera atako de malespero.

[c.] Germana aŭ “Vera” Socialismo

La socialista kaj komunista literaturo de Francujo, literaturo kiu komenciĝis sub la premado de kapitalistaro en regado, kaj kiu estis la esprimo de la batalado kontraŭ tiu ĉi povo, enportiĝis en Germanujon dum tempo kiam la kapitalistaro, en tiu lando, estis ĵus komencinta sian konkuron kun la feŭda absolutismo.

Germanaj filozofoj, mem-nomitaj filozofoj kaj *beaux esprits* (belmensuloj), avide ekkaptis tiun ĉi literaturon, nur forgesante, ke kiam la diritaj skribaĵoj enmigris de Francujo en Germanujon, francaj sociaj kondiĉoj ne enmigris kune kun ili. Tuŝante germanajn sociajn kondiĉojn, tiu ĉi franca literaturo tute perdis sian rektan praktikan signifon, kaj alprenis tute literaturan ŝajnon. tiel, al la germanaj filozofoj de la dekoka jarcento, la postuloj de la unua Franca Revolucio estis nenio pli ol la postuloj de la “praktika rezono” ĝenerale, kaj la eldiroj de la volo de la revoluciema franca kapitalistaro signifis, laŭ iliaj opinioj, la leĝojn de la pura volo, de la volo kiel ĝi devegas esti, de la vera homa volo ĝenerale.

La laboro de la germanaj verkistoj konsistis tute en la harmoniigo de la novaj francaj ideoj kun ilia antikva filozofia konscienco, aŭ pli ĝuste, en la alprenado de la francaj ideoj, ne forlasante ilian propran filozofian vidpunkton.

Tiu ĉi alpreno fariĝis sammaniere kiel fremda lingvo estas alproprigata, nome per traduko.

Estas bone konate kiel la monaĥoj skribis sensencajn biografiojn de katolikaj sanktuloj super la manuskriptoj sur

Manifesto de la Komunista Partio el angla traduko
Esperantigita de Arturo Baker

kiuj la klasikaj verkoj de antikvaj idolanoj estis skribitaj. La germanaj verkistoj maligis tiun ĉi procedon je la nereligia franca literaturo. Ili skribis sian filozofian sensencaĵon *sub* la franca originalo. Ekzemple, sub la franca kritiko pri la ekonomiaj funkcioj de la mono, ili skribis “Fremdiĝo de l’ Homaro”, kaj sub la franca kritiko pri la kapitalista ŝtato ili skribis “La Detronigo de la Kategorio de la Ĝenerala”, kaj tiel plu.

La enigo de tiuj ĉi filozofiaj frazoj ĉe la posto de la francaj historiaj kritikoj ili nomis “La Filozofio de l’ Agado”, “Vera Socialismo”, “La Germana Scienco de la Socialismo”, “La Filozofia Fondaĵo de Socialismo” kaj tiel plu.

La franca socialista kaj komunista literaturo tiel estis tute senfortigita. Kaj, ĉar ĝi ĉesis, en la manoj de la germano, esprimi la bataladon de unu klaso kontraŭ la alia, li sentis sin konscia ke li venkis la “francan unuflankecon” kaj ke li reprezentis, ne verajn postulojn, sed la postulojn de la vero; ne la interesojn de la proletario, sed la interesojn de la homa naturo, de la homo ĝenerale, kiu apartenas al nenia klaso, havas nenian realecon, kiu ekzistas nur en la nuba regiono de filozofa fantazio.

Tiu ĉi germana socialismo, kiu pripensis sian lerneja-knaban taskon tiel serioze kaj solene, kaj laŭdegis siajn maltaŭgajn komercaĵojn tiel ĉarlatane, samtempe grade perdis sian pedantan naivecon.

La batalo de la germana, kaj speciale de la prusa kapitalistaro, kontraŭ feŭda aristokrataro kaj absoluta monarĥaĵo, alivorte la libera movado, fariĝis pli serioza.

Per tio, la de longe dezirata okazo sin prezentis, por ke “vera socialismo” kontraŭstaru la politikan movadon per la socialistaj postuloj, ke ĝi ĵetegu la tradiciajn malbenojn kontraŭ la liberalismo, kontraŭ la reprezenta registaro, kontraŭ kapitalista konkurado, kapitalista libereco de

MANIFESTO DE LA KOMUNISTA PARTIO

presado, kapitalista leĝfarado, kapitalista libereco kaj egaleco; kaj ke ĝi prediku al la amasoj ke ili povas nenion gajni kaj ĉion perdi per la dirita kapitalista movado. La germana socialismo forgesis, ĝustatempe, ke la franca kritiko, kies sensenca eĥo ĝi estas, antaŭsupozas la ekziston de moderna kapitalista socio, kun ĝiaj respondaj ekonomiaj kondiĉoj de ekzistado, kaj la politika konstitucio adaptata al ĝi – precize la aferojn kies atingo estis la celo de la minacanta batalado en Germanujo.

Al la aŭtokrataj registaroj, kun ilia sekvantaro de pastroj, profesoroj, kamparaj nobeletuloj kaj oficistoj, ĝi servis kiel bonvena korvtimigilo kontraŭ la minacanta kapitalistaro.

Estis dolĉa fino post la acidaj piloloj el vipadoj kaj kugloj kiujn, ĝuste en tiu tempo, tiuj samaj registaroj dozdonis al germanaj laborklasaj ekstariĝoj.

Dum tiu ĉi “vera” socialismo tiel servis al la registaroj kiel armilo por batali kontraŭ la germana kapitalistaro, ĝi samtempe rekte reprezentis reakcian intereson la intereson de la germanaj filistroj. En Germanujo la kapitaletula klaso, antikvaĵo de la dekseca jarcento, kaj post tiam konstante reaperante en diversaj formoj, estas la reala socia fondaĵo de la ekzistanta stato de aferoj.

Daŭrigi tiun ĉi klason estas daŭrigi la ekzistantan staton de aferoj en Germanujo. La industria kaj politika supereco de la¹ kapitalistaro minacas ĝin je certa detruo; unuflanke, per la koncentrigo de la kapitalo; aliflanke, per la kreskado de revolucia proletariaro. “Vera” socialismo ŝajnis mortigi tiujn ĉi du birdojn per unu ŝtono. Ĝi dissemiĝis kiel epidemio.

La robo el spekulaciaj araneaĵoj, brodita per floroj de retoriko, trempita en la roso de naŭza sentimentaleco, tiu ĉi supernatura robo en kiu la germanaj socialistoj envolvis

1 en la originalo, p. 55: „... le ...”. -vl

Manifesto de la Komunista Partio el angla traduko Esperantigita de Arturo Baker

siajn maltaŭgajn “eternajn veraĵojn”, tute el haŭto kaj ostoj, mirinde pligrandigis la vendadon de ilia komercaĵo inter tia publiko.

Kaj siavice, la germana socialismo rekonis, pli kaj pli multe, sian propran mision kiel la bruega reprezentanto de la kapitaletulaj filistroj.

Ĝi proklamis ke la germana nacio estas la modela nacio, kaj ke la germana eta filistro estas la tipa homo. Al ĉiu fripona malgrandanimeco de tiu ĉi modela homo ĝi donis kaŝatan, pli altan, socialistan tradukon, la rektan kontraŭaĵon de ĝia reala karaktero. Ĝi alvenis al la ekstrema limo, rekte kontraŭstarante la “brute detrueman” inklinon de komunismo, kaj proklamante sian plejan kaj nepartian malestimon al ĉiuj interklasaj bataladoj. Kun tre malmultaj esceptoj, ĉiuj tiel-nomataj socialistaj kaj komunistaj eldon-aĵoj kiuj nun (1847) dissemiĝas en Germanujo apartenas al la kampo de tiu ĉi malpura kaj sennerviganta literaturo.

2. Konservativa aŭ Kapitalista Socialismo

Parto de la kapitalistaro deziras korekti sociajn maljustaĵojn, por certigi la daŭrantan ekzistadon de la kapitalista socio.

Al tiu sekcio apartenas ekonomiistoj, filantropoj, homaristoj, plibonigantoj de la kondiĉo de la laborklaso, organizantoj de bonfarado, anoj de societoj por la malpermesado de kruelaĵoj al bestoj, malebriecaj fanatikuloj, “truaĵ kaj angulaĵ” reformistoj de ĉiu priimagebla speco. Tiu ĉi formo de socialismo estas, plue, ellaborita en plenajn sistemojn.

Ni povas citi la de Proudhon *Philosophie de la Misère*¹ kiel ekzemplon de tiu ĉi formo.

1 en la originalo: *Misere*. -vl

MANIFESTO DE LA KOMUNISTA PARTIO

La socialista kapitalistaro deziras ĉiujn la profitojn de modernaj sociaj statoj, sen la bataladoj kaj danĝeroj necese rezultantaj de ĝi. Ili deziras la nun-ekzistantan staton de la socio sen ĝia revoluciaj kaj disigantaj elementoj. Ili deziras kapitalistaron sen proletariaro. La kapitalistaro nature opinias ke la mondo en kiu ĝi regas estas la plej bona; kaj kapitalista socialismo ellaboras tiun ĉi komfortan opinion en diversajn pli aŭ malpli plenajn sistemojn. Postulante ke la proletariaro plenumu tian sistemon, kaj tiel marŝu rekte en la socian Nov-Jerusalemmon, ĝi efektive nur postulas ke la proletariaro restu interne la limojn de la nunekzistanta socio, sed ke ĝi forĵetu ĉiujn siajn malamajn ideojn pri la kapitalistaro.

Dua kaj pli praktika, sed malpli sistema formo de tiu ĉi socialismo klopodis maltaŭgigi en la opinioj de la laborklaso ĉiun revolucion movadon, montrante ke nenio nure politika reformo, sed nur ŝanĝo en la materiaj kondiĉoj de la ekzistado, en la ekonomiaj rilatoj, povus porti al ili ian profiton. Per ŝanĝoj de la materiaj kondiĉoj de la ekzistado, tamen, tiu ĉi formo de socialismo neniel intencas la forigon de la kapitalistaj rilatoj de la produktado, forigo kiu povas efektiviĝi nur per revolucio, sed administraciajn reformojn, fondatajn sur la daŭriganta ekzistado de tiuj ĉi rilatoj; reformojn, tial, kiuj neniel influas la rilatojn inter la kapitalo kaj la laboro, sed, en la ekstrema okazo, malpligrandigas la koston kaj simpligas la administracian laboron de kapitalista regado.

Kapitalista socialismo atingas adekvatan esprimon, kiam, kaj nur kiam, ĝi fariĝas nura figuro el vortoj.

Libera komercado – por la profito de la laborklaso. Protektaj limimpostoj – por la profito de la laborklaso. Karcereja reformado – por la profito de la laborklaso. Jen estas la lasta vorto kaj la sola serioze intencata vorto de kapitalista socialismo.

Manifesto de la Komunista Partio el angla traduko
Esperantigita de Arturo Baker

Ĝi sumiĝas per la frazo: la kapitalisto estas kapitalisto – por la profito de la laborklaso.

3. Kritika-Utopia Socialismo kaj Komunismo

Ni ne tie ĉi priparolas pri tiu literaturo, kiu en ĉiu granda moderna revolucio, donis voĉon al la demandoj de la proletariaro – tia kia la verkoj de Babeuf kaj aliaj.

La unuaj rektaj penadoj de la proletariaro por atingo siajn proprajn celojn, farataj dum tempoj de universala ekscito, kiam la feŭda socio renversiĝas, tiuj ĉi penadoj necese malsukcesis, pro la tiama kruda stato de la proletariaro, tiel bone kiel pro la neĉeesto de la ekonomiaj kondiĉoj por ĝia liberigo, kondiĉoj kiuj ankoraŭ devos esti produktataj, kaj povos esti produktataj nur per la venonta kapitalista epoko. La revoluciema literaturo kiu akompanis tiujn ĉi unuajn movadojn de la proletariaro necese havis reakcian karakteron. Ĝi instruis universalan asketismon kaj socian ebenigon en ĝia plej kruda formo.

La socialistaj kaj komunistaj sistemoj prave tiel nomataj, tiuj de St. Simon, Fourier, Owen kaj aliaj, naskiĝis dum la frua kruda periodo, supre priskribita, de la batalado inter la proletariaro kaj kapitalistaro (vidu sekcion *Ian*, *Bourgeoisie and Proletariat*).

La fondintoj de tiuj ĉi sistemoj vidas, ja, la klasajn antagonismojn, tiel bone kiel la agadon de la disrompigantaj elementoj en la reganta formo de la socio. Sed la proletariaro, ankoraŭ en ĝia infaneco, ŝajnas al ili klaso sen historia iniciativo aŭ ia nedependa historia movado.

Ĉar la kreskado de la klasa antagonismo faras egalajn paŝojn kun la disvolviĝo de la industrio, la ekonomia stato, kiel ili ĝin trovas, ne ankoraŭ prezentas al ili la materiajn kondiĉojn por la liberigo de la proletariaro. Ili tial serĉas

MANIFESTO DE LA KOMUNISTA PARTIO

novan socian sciencon, novajn sociajn leĝojn, kiuj estas kreontaj tiajn kondiĉojn.

La historia agado estas cedonta al ilia persona elpens-ema agado, historie kreataj kondiĉoj por liberigo al kondiĉoj fantaziaj, kaj la laŭgrada, spontanea klasa organizado de la proletariaro cedos al organizo de la socio speciale al-laborata de tiuj ĉi elpensistoj. La estonta historio solvas sin, laŭ iliaj opinioj, en la propagandon kaj la praktikan plenum-on de iliaj sociaj planoj.

En la formado de siaj planoj, ili konscias ke ili zorgas precipe pri la laborklaso, kiel la plej suferanta klaso. Nur kiel ili ĝin rigardas kiel la plej suferantan klason havas la laborklaso por ili ian ekziston.

La kruda stato de la interklasa batalado, tiel multe kiel iliaj propraj ĉirkaŭaĵoj, igis socialistojn de tiu speco sin opinii alte superaj de ĉiuj klasaj antagonismoj. Ili deziras plibonigi la staton de ĉiu membro de la socio, eĉ tiun de la plej favorata. De tio, ili kutime adresas la socion ĝenerale, sen distingo pro klaso; ne, prefere, la regantan klason. Ĉar kiel povas la popolo, kiam ili komprenos ilian sistemon, eviti vidi en ĝi la planon kiel eble plej bonan por la stato kiel eble plej bona de la socio.

Tial, ili malakceptas ĉian politikon, kaj speciale ĉian revolucion agadon; ili volas atingi siajn celojn per pacaj rimedoj, kaj penadas, per malgrandaj eksperimentoj, nece-se sortigataj al malsukceso, kaj per la potenco de ekzemplo, pavimi la vojon al la nova socia evangelio.

Tiaj fantaziaj penetraĵoj de la estonta socio, pentrataj en tempo kiam la proletariaro ankoraŭ estas en tre kruda stato, kaj havas nur fantazian ideon pri sia propra etato, respondas al la unuaj instinktaj sopiradoj de tiu klaso por ĝenerala rekonstruado de la socio.

Sed la diritaj socialistaj kaj komunistaj eldonaĵoj enhavas

Manifesto de la Komunista Partio el angla traduko Esperantigita de Arturo Baker

ankaŭ kritikan elementon. Ili atakas ĉiun principon de la ekzistanta socio. Tial ili estas plenaj je la plej multvaloraj materialoj por la klerigado de la laborklaso. La praktikaj rimedoj en ili proponataj, tiaj kia la forigo de la distingo inter la urboj kaj la kamparo, de la familio, de la administrado de industrioj por la profito de privataj individuoj, kaj de la salajra sistemo, la proklamo de socia harmonio, la ŝanĝo de la funkcioj de la ŝtato en nuran administradon de produktado, ĉiuj ĉi tiuj proponoj celas sole al la malapero de klasaj antagonismoj kiuj estas, en tiu tempo, nur ekaperantaj, kaj kiuj estas, en tiuj ĉi eldonaĵoj, rekonataj sole en siaj plej fruaj, instinktaj kaj nedifinitaj formoj. Tiuj ĉi proponoj havas, tial, karakteron pure utopian.

La signifo de la kritika-utopia socialismo kaj komunismo havas inversan rilaton al historia disvolviĝado. Laŭ proporcio kiel la interklasa batalado disvolviĝas, kaj alprenas difinitan formon, tiu ĉi fantazia forstaro de la konkuro, tiuj ĉi fantaziaj atakoj kontraŭ ĝi, perdas ĉian praktikan valoron kaj ĉioman teoriantpravecon. Tial, kvankam la elpensintoj de tiuj ĉi sistemoj estis, en multaj manieroj, revoluciaj, iliaj sekvantoj en ĉiu okazo, fariĝas nur reakciaj sektoj. Ili forte tenas la originalajn opiniojn de siaj regantoj, opozicie al la progesa historia kreskado de la proletariaro. Ili tial penadas, konforme al siaj teorioj, mildigi la interklasajn antagonismojn. Ili ankoraŭ revas pri la eksperimentanta realigon de siaj sociaj utopioj, pri la fondado de izolataj “falansterioj”, la kreado de “hejmaj kolonioj”, pri ekstarigo de “Malgranda Ikario”¹ – miniaturaj eldonaĵoj² de la Nov-Jeruzalemo, kaj por realigi ĉiujn ĉi tiujn “kastelojn en la aero” ili devegigas sin turni al la sentoj kaj monujoj de la kapitalistaro. Ili grade malleviĝas en la kategorion de la reakciaj konser-

1 Falansterioj estas socialistaj kolonioj laŭ la plano de Karolo Fourier; Ikario estas la nomo donita de Kabet al sia utopio kaj, poste, al sia amerika komunista kolonio.

2 en la originalo: „... eldonaĵaj ...”. -vl

MANIFESTO DE LA KOMUNISTA PARTIO

vativaj socialistoj pli supre priskribataj, diferencante de tiuj ĉi nur per pli sistema pedanteco, kaj per sia fanatika kaj superstiĉa kredo al la miraklaj efikaĵoj de sia socia scienco.

Tial, ili treege kontraŭstaras ĉian politikan agadon faratan de la laborista klaso; tia agado, laŭ ilia diro, povus deveni nur de blinda malkredemo al la nova evangelio.

La Owen'anoj en Anglujo, kaj la Fourier'anoj en Francujo, siavice kontraŭstaras la Ĉartistojn kaj la "Reformistojn".

IV

SINTENADO DE LA KOMUNISTOJ RILATE AL LA DIVERSAJ EKZISTANTAJ PARTIOJ OPOZICIAJ

Sekcio IIa klarigis la rilatojn de la komunistoj al la ekzistantaj laborklasaj partioj, tiaj kiaj la Ĉartistoj en Anglujo kaj la Terdividaj Reformantoj en Ameriko.

La komunistoj batalas por la atingo de la tujaj celoj, por la realigo de la momentaj interesoj de la laborklaso; sed en la movado nuntempa, ili ankaŭ reprezentas kaj zorgas pri la estontaĵojn de tiu movado. En Francujo la komunistoj kunigas sin kun la socia-demokratoj,¹ kontraŭ la konservativa kaj radikala kapitalistaroj, rezervante, tamen, la rajton alpreni kritikan sintenadon rilate al frazoj kaj iluzioj hereditaj de la granda revolucio.

En Svislando ili kunhelpas la radikalojn, ne perdante la vidon al la fakto ke tiu ĉi partio konsistas el elementoj kontraŭaj, parte el demokrataj socialistoj, laŭ la franca senco, parte el radikalaj kapitalistoj.

En Polujo ili aliĝas al tiu partio kiu insistas pri terdivida revolucio, kiel la unua kondiĉo por nacia liberiĝo, tiu partio kiu instigis la ribelon ĉe Krakovo en 1846.

En Germanujo ili kunbatalas kun la kapitalistaro kiam ĝi agadas revolucie, kontraŭ la absoluta monarĥaĵo, la feŭda nobeletaro kaj la kapitaletularo.

1 Tiu partio tiam reprezentata de Ledru-Rollin en parlamento, de Louis Blanc en literaturo, de la Reforme en la ĉiutaga ĵurnalaro. La nomo de Socia Demokratio signifis, al tiuj ĉi, siaj elpensintoj, sekcion de la demokrata aŭ respublika partio pli malpli nuancita de socialismo.

MANIFESTO DE LA KOMUNISTA PARTIO

Sed ili neniam, eĉ unu momenton, ĉesas lernigi al la laborklaso la kiel eble plej klaran komprenon de la malpac-emaj antagonismoj inter la kapitalistaro kaj proletario, por ke la germanaj laborantoj povu tuj uzi, kiel tiom da bataliloj¹ kontraŭ la kapitalistaro, la sociajn kaj politikajn kondiĉojn kiujn la kapitalistaro necese devegigas starigi kune kun sia supereco, kaj por ke, post la falo de la reakciaj klasoj en Germanujo, la batalo kontraŭ la kapitalistaro mem povu tuj komenci.

La komunistoj direktas sian atenton precipe al Germanujo, ĉar tiu lando estas ĉe la antaŭtago de kapitalista revolucio, destinita esti efektivigata laŭ la pli antaŭaj statoj de eŭropa civilizacio, kaj kun grande pli disvolviĝinta proletario, ol tiu de Anglujo en la deksepa, kaj de Francujo en la dekoka jarcento, kaj ĉar la kapitalista revolucio en Germanujo estos nur la antaŭludo al la tuje sekvonta proletaria revolucio.

Unuvorte, la komunistoj ĉie subtenadas ĉian revolucionan movadon kontraŭ la nun-ekzistanta socia kaj politika ordo de la aferoj.

En ĉiuj ĉi tiuj movadoj ili portas al la fronto, kiel la plej gravan demandon en ĉiu, la demandon propraĵan, kia ajn estas ĝia grado de disvolviĝo en tiu tempo.

Fine, ili ĉie laboradas por la unuiĝo kaj interkonsento de la demokrataj partioj de ĉiuj landoj.

La komunistoj rigardas kiel malinda la kaŝadon de siaj opinioj kaj celoj. Ili malkaŝe proklamas ke siaj celoj povos atingiĝi nur per la perforta renverso de ĉiuj nun-ekzistantaj

1 en la originalo „... bataliloj...”. -vl

